


EL POPOLA ĈINIO

N-ro 5 Majo 1968

Vortoj de Prezidanto Maŭ

Mi diris, ke ĉiuj laŭdire potencaj reakciuloj estas nur papertigroj. La kialo estas, ke ili izoliĝas de la popolo. Vidu, ĉu Hitler ne estis papertigro? Ĉu li ne estis faligita? Mi diris ankaŭ, ke la caro estis papertigro, la ĉina imperiestro estis papertigro, la japana imperiismo estis papertigro, kaj jen ili ĉiuj falis. La usona imperiismo ankoraŭ ne falis kaj cetere havas atombombojn. Sed mi kredas, ke ankaŭ ĝi falos, ankaŭ ĝi estas papertigro.

Parolado ĉe la Moskva Kunveno de Komunistaj kaj Laboristaj Partioj (18 novembro 1957)



En novembro de 1965, Prezidanto Maŭ akceptis Anna Louise Strong.

Interparolo kun Usona Ĵurnalistino Anna Louise Strong*

(Aŭgusto 1946)

Maŭ Zedong

Demandis Strong: Ĉu vi pensas, ke por la problemo de Ĉinio, estas espero de politika solvo, de paca solvo en la proksima estonto?

Respondis Maŭ: Tio dependas de la sinteno de la usona registaro. Se la usona popolo retenas la manojn de la usonaj reakciuloj, kiuj helpas Ĉiang Kajŝek entrepreni enlandan militon, estas espero por paco.

D: Kiom longe Ĉiang Kajŝek povos daŭrigi la militon, se Usono ne plu donos helpon al li krom la jam donita[1]?

R: Pli ol unu jaron.

D: Ĉu Ĉiang Kajŝek povos persisti tiom longe ekonomie?

R: Povos.

D: Se Usono deklaros, ke en la estonto ĝi ne plu donos helpon al Ĉiang Kajŝek?

R: Estas nun ankoraŭ nenia signo montranta ke la usona registaro kaj Ĉiang Kajŝek havas ian ajn deziron ĉesigi la militon en mallonga tempo.

D: Kiom longe la Komunista Partio povos persisti?

R: Laŭ nia propra deziro eĉ unu tagon ni ne volas militi. Sed se la situacio devigos nin militi, ni povos militi ĝisfine.

D: Se la usona popolo demandos kial la Komunista Partio militas, kiel mi respondu?

R: Ĉar Ĉiang Kajŝek volas amasbuĉi la ĉinan popolon, kaj se la popolo volas vivi, ĝi devas sin defendi. Tion la usona popolo povas kompreni.

D: Kiel vi opinias pri tio, ĉu estas ebleco por Usono lanĉi kontraŭsovetunian militon?

R: La propagando pri kontraŭsovetunia milito enhavas du flankojn. Unuflanke, la usona imperiismo efektive preparas kontraŭsovetunian militon, la nuna propagando pri kontraŭsovetunia milito same kiel alia kontraŭsovetunia propagando ja estas politika preparo por kontraŭsovetunia milito. Aliflanke, tia propagando estas fumvualo farita de la usonaj reakciuloj por kovri multajn efektivajn kontraŭdirojn kiujn la usona imperiismo rekte alfrontas. Tiuj estas la kontraŭdiroj inter la usonaj reakciuloj kaj la usona popolo kaj la kontraŭdiroj de la usona imperiismo kun ceteraj kapitalismaj landoj kaj kun la landoj koloniaj kaj duonkoloniaj. La nuna efektiva signifo de la usona slogano de kontraŭsovetunia milito estas subpremo al la usona popolo kaj ekspansio de sia agresa forto en la kapitalisma mondo. Vi scias, ke Hitler kaj liaj kunuloj la japanaj militaristoj dum longa tempo prenis la kontraŭsovetunian sloganon kiel pretekston por sklavigi sian enlandan popolon kaj agresi aliajn landojn. Ĝuste tiel same agas la usonaj reakciuloj.

Por entrepreni militon, la usonaj reakciuloj unue devas ataki la usonan popolon. Ili jam estas atakantaj la usonan popolon, ili subpremas la usonajn laboristojn kaj demokratajn elementojn politike kaj ekonomie, kaj preparas praktiki faŝismon en Usono. La usona popolo devas leviĝi por rezisti la atakon de la usonaj reakciuloj. Mi kredas, ke ĝi tion faros.

Inter Usono kaj Sovetunio kuŝas ege vasta zono, kie troviĝas multaj landoj kapitalismaj kaj landoj koloniaj kaj duonkoloniaj de Eŭropo, Azio kaj Afriko. Antaŭ ol subigi tiujn landojn estas ne

---

**La "Interparolo kun Usona Ĵurnalistino Anna Louise Strong" estas tre grava parolo de kamarado Maŭ Zedong ne longe post la fino de la Dua Mondmilito pri la internacia situacio kaj enlanda situacio. En tiu ĉi interparolo kamarado Maŭ Zedong elmetis sian faman tezon "Ĉiuj reakciuloj estas paperaj tigroj". Tiu ĉi tezo armis la penson de nia popolo, plifortigis ĝian fidon pri la venko kaj ludis en la Popola Liberiga Milito treege grandan rolon. Kiel Lenin rigardis imperiismon "koloso kun argilaj kruroj", tiel kamarado Maŭ Zedong rigardis imperiismon kaj ĉiujn reakciulojn paperaj tigroj, ambaŭ laŭ ilia esenco. Tio ĉi estas fundamenta strategia penso de revolucia popolo. Ekde la periodo de la Dua Enlanda Revolucia Milito kamarado Maŭ Zedong jam plurfoje montris, ke la revoluciuloj nepre devas strategie, en la tuto, malestimi la malamikojn, kuraĝi batali kontraŭ ili, kuraĝi batalakiri venkon, samtempe taktike, manovre kaj je ĉiu parto, je ĉiu problemo de konkreta batalo, serioze trakti la malamikojn, alpreni sintenon prudentan, zorgi pri la arto de batalo, alpreni taŭgajn formojn de batalo laŭ malsamaj tempoj, lokoj kaj kondiĉoj, por paŝon post paŝo izoli kaj ekstermi la malamikojn. Je la 1-a de decembro, 1958, en la Kunveno de la Politika Buroo de la Centra Komitato de la Komunista Partio de Ĉinio okazigita en Vuĉang kamarado Maŭ Zedong montris:*

> *"Kiel ĉio en la mondo havas duoblan naturon (t. e. la leĝo de unueco de kontraŭaĵoj), tiel imperiismo kaj ĉiuj reakciuloj havas ankaŭ duoblan naturon, ili estas veraj tigroj kaj ankaŭ paperaj tigroj. En la historio, antaŭ ol ili prenis la ŝtatpotencon kaj en la komenca periodo post tio, la sklavposedantaro, la feŭda bienularo kaj la burĝaro estis vivplenaj, estis revoluciuloj, estis progresemuloj, estis veraj tigroj. En la poste sekvinta periodo, ĉar iliaj kontraŭaj flankoj, la sklavaro, kamparanaro kaj proletaro, paŝon*

eble por la usonaj reakciuloj paroli pri atako al Sovetunio. Nun Usono superregas en Pacifiko pli multajn lokojn ol la pasinta tuta influsfero de Britio, ĝi superregas Japanion, Ĉinion regatan de Kuomintango, duonon de Koreio kaj la Sudan Pacifikon; ĝi superregas jam de longe Mezan kaj Sudan Amerikon; kaj ĝi volas superregi ankaŭ la tutan Britan Imperion kaj Okcidentan Eŭropon. Sub diversaj pretekstoj Usono faras grandskalan militan aranĝon kaj starigas militajn bazojn en multaj landoj. La usonaj reakciuloj diris, ke ĉiuj militaj bazoj de ili starigitaj kaj starigotaj tra la mondo estas por kontraŭi Sovetunion. Vere, tiuj militaj bazoj estas direktitaj kontraŭ Sovetunio. Sed nun, usonan agreson suferas unue ne Sovetunio, sed la landoj, kie la militaj bazoj estas starigitaj. Mi kredas, ke tiuj landoj ekkonos post ne longe, kiu vere subpremas ilin, Sovetunio aŭ Usono. Fine venos la tago kiam la usonaj reakciuloj trovos sin opoziciataj de la tutmondaj popoloj.

Kompreneble, mi ne volas diri, ke la usonaj reakciuloj ne intencas ataki Sovetunion. Sovetunio estas defendanto de mondpaco, estas fortega faktoro malhelpanta la starigon de monda superrego de usonaj reakciuloj, pro la ekzisto de Sovetunio la ambicioj de la reakciuloj en Usono kaj en la mondo absolute ne povas efektiviĝi. Tial la usonaj reakciuloj treege malamas Sovetunion kaj vere revas detrui tiun ĉi socialisman ŝtaton. Sed la fakto ke nun, ne longe post la fino de la Dua Mondmilito, la usonaj reakciuloj tiel laŭte distrumpetante akcentas usona-sovetunian militon venenante la atmosferon, devigas nin ekrigardi ilian efektivan celon. Pruviĝas ke sub la kovro de kontraŭsovetunia slogano ili freneze atakas la usonajn laboristojn kaj demokratajn elementojn kaj turnas ĉiujn landojn, kiuj estas celaĵoj de usona ekstera ekspansio, en dependaĵojn de Usono. Mi opinias, ke la usona popolo kaj la popoloj de ĉiuj landoj, kiuj estas minacataj de usona agreso, devas

---

post paŝo kreskis en forto kaj batalis kontraŭ ili kaj fariĝis pli kaj pli timindaj, ili do paŝon post paŝo turniĝis en la malon, en reakciulojn, en postiĝintojn, en paperajn tigrojn kaj fine estis aŭ estos renversitaj de la popolo. La klasoj reakciaj, postiĝintaj kaj putriĝintaj ankoraŭ havas tian duoblan naturon eĉ en sia lasta vivmorta batalo kontraŭ la popolo. Unuflanke, vera tigro, homojn manĝanta, milionojn, dekmilionojn da homoj manĝanta. La afero de la popola batalado trapasis periodon de malfaciloj kaj penoj, kaj survoje estiĝis multaj zigzagoj. Por forigi la regadon de imperiismo, feŭdismo kaj burokrat-kapitalismo en Ĉinio, la ĉina popolo elspezis tempon de pli ol cent jaroj, oferis ĉirkaŭ kelkdek milionojn da homvivoj kaj nur tiam akiris la venkon de 1949. Vidu, ĉu ili ne estis vivaj tigroj, feraj tigroj kaj veraj tigroj? Tamen ili fine turniĝis en paperajn tigrojn, mortajn tigrojn kaj fabkazeajn tigrojn. Tio estas historiaj faktoj. Ĉu tiajn faktojn oni ne vidis kaj aŭdis? Ja milojn kaj dekmilojn! Milojn kaj dekmilojn! Tial laŭesence, laŭ longperioda vidpunkto kaj laŭ strategia vidpunkto oni nepre devas rigardi imperiismon kaj ĉiujn reakciulojn paperaj tigroj kiel ili fakte estas. Sur tio ni devas formi nian strategian penson. Aliflanke, ili estas vivaj, feraj kaj veraj tigroj, ili povas manĝi homojn. Sur tio ni devas formi nian manovran penson kaj taktikan penson."

Pri la problemo ke oni devas strategie malestimi la malamikojn kaj taktike serioze trakti la malamikojn, vidu la 6-an sekcion de la 5-a ĉapitro de la artikolo "La Strategia Problemo de la Ĉina Revolucia Milito" en la unua volumo de la "Elektitaj Verkoj de Maŭ Zedong" kaj la unuan parton de la artikolo "Pri Kelkaj Gravaj Problemoj en la Nuna Politiko de la Partio" en la kvara volumo de la sama libro.

unuiĝi kaj kontraŭbatali la atakojn de la usonaj reakciuloj kaj ĝiaj lakeoj en tiuj landoj. Nur kiam tiu ĉi batalo venkos, tria mondmilito povos esti evitita, alie ĝi estos neevitebla.

D: Tio estas tre bona klarigo. Tamen se Usono uzos atombombon? Se Usono bombos Sovetunion de siaj militaj bazoj en Islando, Okinaŭa kaj Ĉinio?

R: Atombombo estas papera tigro uzata de la usonaj reakciuloj por timigi homojn; timinda en aspekto, sed fakte ne. Kompreneble, atombombo estas armilo por grandskala amasbuĉado, sed tio, kio decidas la venkon aŭ malvenkon de milito, estas la popolo, sed ne unu aŭ du novtipaj armiloj.

Ĉiuj reakciuloj estas paperaj tigroj. En aspekto la reakciuloj estas timindaj, fakte ili ne havas forton eksterordinaran. Rigardate el longperioda vidpunkto, vere potenca forto apartenas ne al la reakciuloj, sed al la popolo. Antaŭ la rusa Februara Revolucio en 1917, kiu flanko en Rusio havis veran forton? Rigardate supraĵe, la tiama caro estis forta; sed unu ekblovo da vento de la Februara Revolucio jam la caron forblovis. En la fina analizo, la forto de Rusio estis en la flanko de la sovetoj de la laboristoj, kamparanoj kaj soldatoj. La caro estis nur papera tigro. Ĉu Hitler ne estis rigardata kiel tre forta? Sed la historio pruvis, ke li estis papera tigro. Tia estis ankaŭ Mussolini, kaj tia estis ankaŭ la japana imperiismo. Kontraŭe, la forto de Sovetunio kaj la popoloj de ĉiuj landoj kiuj amas demokration kaj liberon estas multe pli granda ol oni antaŭvidis.

Ankaŭ Ĉiang Kajŝek kaj liaj subtenantoj, la usonaj reakciuloj, ĉiuj estas paperaj tigroj. Parolante pri la usona imperiismo oni sentas ŝajne, ke ĝi estas terure forta, kaj la ĉinaj reakciuloj estas uzantaj la "fortecon" de Usono por timigi la ĉinan popolon. Tamen estos pruvite ke same kiel ĉiuj reakciuloj en la historio, ankaŭ la usonaj reakciuloj ne havas multe da forto. En Usono estas aliaj homoj, kiuj estas vere fortaj, t. e. la usona popolo.

Prenu la kazon de Ĉinio, tio, sur kio ni nin apogas estas nur la milio plus fusiloj, sed la historio fine pruvos, ke la milio plus fusiloj estas pli forta ol la aeroplanoj plus tankoj de Ĉiang Kajŝek. Kvankam ankoraŭ multaj malfaciloj sin trovas antaŭ la ĉina popolo, kaj ĝi longe spertos suferojn sub la kunigita atako de la usona imperiismo kaj la ĉinaj reakciuloj, tamen fine venos la tago, kiam la reakciuloj fiaskos kaj ni venkos. La kaŭzo estas nenio alia ol tio, ke la reakciuloj reprezentas reakcion kaj ni reprezentas progreson.

KLARIGO

[1] Por subteni Ĉiang Kajŝek lanĉi kontraŭpopolan enlandan militon la usona imperiismo donis al la registaro de Ĉiang Kajŝek grandegan helpon. Ĝis junio de 1946 Usono ekipis 45 diviziojn de la Kuomintang-a armeo. Ĝi trejnis por Kuomintango militan personaron el 150,000 homoj de ter-, mar- kaj aer-armeoj, sekretaj agentoj, komunikaj policanoj, stabaj oficiroj, militaj kuracistoj, proviantistoj ktp. Per militŝipoj kaj aeroplanoj Usono transportis 14 armekorpusojn (sume 41 divizioj) de la Kuomintang-a armeo kaj 8 regimentojn de komunikaj policanoj, sume pli ol 540,000 armeanojn al la frontoj por ataki la liberigitajn regionojn. La usona registaro surterigis en Ĉinion maran infanterion el 90,000 soldatoj por okupi la gravajn urbojn Ŝanhajo, Kingdaŭ, Tiangin, Bejping kaj Kinhuangdaŭ, kaj protekti en norda Ĉinio komunikajn liniojn por Kuomintango. Laŭ materialo malkovrita en *Usonaj Rilatoj kun Ĉinio* (la Blanka Libro) publikigita de la Ŝtata Departemento de Usono je la 5-a de aŭgusto, 1949, komence de la Kontraŭjapana Rezistmilito ĝis 1948 la totala valoro de diversaj specoj de usona helpo al la registaro de Ĉiang Kajŝek atingis pli ol 4,500 milionojn da dolaroj (ankaŭ la plejparto de la usona helpo al la kuomintang-a registaro dum la Kontraŭjapana Rezistmilito estis rezervita de Kuomintango por entrepreni kontraŭpopolan enlandan militon poste). Tamen fakte la sumo de la usona helpo al Ĉiang Kajŝek ja estis multe pli granda ol tio. La usona Blanka Libro konfesis, ke la usona helpo egalas al "pli ol 50% de la monaj elspezoj" de la registaro de Ĉiang Kajŝek kaj estis "proporcie pli granda en rilato al la budĝeto de tiu registaro, ol Usono provizis iun ajn landon de Okcidenta Eŭropo depost la fino de la milito".

La Papertigreco de la Usona Imperiismo Vidita en la Brilaj Venkoj de la Sudvjetnama Popolo dum la Printempa Festo

DE la Printempa Festo, la sudvjetnama popolo kaj ĝiaj armitaj fortoj brave batalis kontinue preskaŭ 30 tagnoktojn, lanĉis unu post alia plenampleksajn ofensivojn kontraŭ la uson-pupa kliko kaj jam akiris mondskuajn brilajn venkojn kaj kreis senprecedence bonegan situacion sur la vjetnama batalkampo. La popoloj de la tuta mondo estas forte ĝojigitaj kaj kuraĝigitaj de tio, dum la imperiistoj, reviziistoj kaj reakciuloj falis en panikon kaj teruron. La brilaj venkoj de la sudvjetnama popolo kaj ĝiaj armitaj fortoj montris elokvente al la tuta mondo, ke la nacisava rezistmilito de la vjetnama popolo kontraŭ la usona imperiismo jam disvolviĝis ĝis tre alta nivelo kaj kreis miraklon en la historio de naciliberigaj militoj de la tuta mondo. La ŝajne potenca usona imperiismo refoje malkaŝis en tio sian papertigrecon.

En sia telegramo al Prezidanto de la Prezidantaro de la Centra Komitato de la Sudvjetnama Naciliberiga Fronto Nguyen Huu Tho por esprimi la plej varman gratulon pro la 7-a datreveno de la fondiĝo de la Fronto la granda gvidanto de la ĉina popolo Prezidanto Maŭ Zedong diras: **"Ja bonege vi batas! Sub ekstreme malfacilaj kondiĉoj, vi apogas vin sur la propraj fortoj kaj batas la usonan imperiismon, la plej ferocan en la mondo, tiel ke ĝi trovas por si neniun elirejon kaj estas en plena embaraso. Tio estas granda venko. La ĉina popolo salutas vin. Via venko ankoraŭfoje montras ke ĉiu lando, granda aŭ malgranda, povas venki ĉiun ajn potencan malamikon, se nur ĝi plene mobilizas sian popolon, firme apogas sin sur sia popolo kaj faras popolan militon. Per sia nacisava milito kontraŭ la usona imperiismo sub la saĝa gvidado de la granda gvidanto Prezidanto Ho Chi Minh, la vjetnama popolo starigis brilan ekzemplon por la subpremataj popoloj kaj subpremataj nacioj de la tuta mondo batalantaj por sia liberiĝo."**

MALAMIKAJ TRUPOJ DISFALIS KVAZAŬ VELKAJ FOLIOJ

De la suda bordo de Benhai-rivero ĝis Kamaŭpromontoro, de montregionoj ĝis ebenejoj, de urboj ĝis kamparoj, bone interligiĝis la sudvjetnama popolo kun siaj armitaj trupoj, la urboj kun la vilaĝoj, la loĝantaroj kun la trupoj atakantaj de ekstere, kio formis gigantan ofensivan forton kaj donis tiel solidajn batojn al la malamikaj trupoj en dekoj da provincaj ĉefurboj kaj urbegoj, centoj da guberniaj urboj kaj urbetoj, dekoj da

aerodromoj kaj vilaĝaj apogpunktoj, ke ili disfalis kvazaŭ velkaj folioj en aŭtuna vento. Kaj Chasson, oficiro de la usonaj agresaj trupoj kontraŭ Vjetnamio estis devigita konfesi, malĝoje frapante la pupitron dum ĵurnalista intervjuo: "Mi devas konfesi, ke la atako de 'Vjet-Kong' estas ekster nia atendo." Kaj li kriis de teruro: "La perfekteco de la kunagadoj, la furiozeco kaj la aŭdaceco de la atakoj atingis mirindecon."

La bravecon kaj lertecon de la sudvjetnama popolo kaj ĝiaj armitaj fortoj kaj la facile-venkebleco de la usonaj kaj pupaj trupoj estas klare videblaj en la batalo de la bone kunagantaj popolamasoj kaj trupoj de suda Vjetnamio por sieĝeksterma do de la uson-pupaj trupoj ĉe Hue.

La malnova parto de la urbo Hue, kie sidas stabo de la malamiko, dividiĝas en kvar kvartaloj, nome Mangca, Tayloc, Dainoi kaj Dongba. Ĉirkaŭ tiu ĉi nesto de la malamiko estas du ĉirkaŭmuroj, plus la multnombraj apogpunktoj, gardejoj kaj redutoj kiuj formis la t. n. fortikan defendan sistemon de la malamiko.

30 minutojn post la dua en la frua mateno de la 31-a de januaro, popolaj liberigaj armitaj fortoj lanĉis atakon kontraŭ Mangca, trafe bombardante la starejon de la malamiko. En kunagado de



Supre maldekstre:
Sub atako de la armeo kaj popolo de suda Vjetnamio, la usonaj armeanoj en Khesanh panike serĉas ĉie sekurecon, trovante nek vojon al la ĉielo, nek pordon al subtero.

Sube maldekstre:
Vunditaj en batalo en Khesanh la usonaj piratoj revenas venkite.

Johnson, la ĉefo de la usona imperiismo, en konfuzo

memdefendaj taĉmentoj de Hue, batala grupo sub la gvido de batalanto Mach de la popolaj liberigaj armitaj fortoj sin puŝis antaŭen al Chantay-pordego. La eksplodigistoj rapide detruis la dratbarilojn antaŭ la pordego unun post alia. Kaj subplotono sub la gvido de alia batalanto Hung sturmis tuj antaŭen kaj starigis la venkan standardon de la Naciliberiga Fronto de Suda Vjetnamio sur tiun pordegon de la antikva urbo. La batalantoj de la sturmaj taĉmentoj kaj miloj kaj dekmiloj da popolanoj de Hue tajde fluis en la antikvan urbon.

Baldaŭ post la komenco de sia batalo ĉe la norda flanko de la interna urbo, batalgrupo sub la gvido de Hien konkeris redutojn de la malamiko kaj, rompinte la kontakton inter Mangca kaj la aliaj kvartaloj, rekte atakis la komandejon de la Unua Divizio de la pupa armeo.

En la sudo de la interna urbo, la batalantoj antaŭenpuŝiĝis laŭ urbomuro, transiris Nhihakanalon kaj komencis furioze ataki la sudorientan parton de Mangca-kvartalo.

Dume, alia trupo de la popolaj liberigaj armitaj fortoj lanĉis atakon kontraŭ la aŭtoparko de la malamiko en Mangca. Post 15-minuta batalo, la popolaj liberigaj armitaj fortoj jam ekstermis la malamikojn en la ĉirkaŭaĵo de tiu kvartalo, puŝiĝis en ĝian centron, dispecigis la malamikajn trupojn kaj ilin ekstermis unun post alia. Sub la komando de la politika direktoro Nguyen Xuan Han, batalantoj penetris en la loĝkvartalojn de la puparmeaj stabanoj kaj "laborantoj de psikologia milito". La malamikoj konfuziĝis de tiu surprizatako kaj plenigis la terenon per kadavroj. Iuj obstinuloj el ili intencis fuĝi al la centra parto de

La liberigaj armeanoj de suda Vjetnamio atakas usonajn kaj pupajn armeanojn disvolvante la grandan potencon de popola milito.



la komandejo por obstine rezisti en fortikaĵo. Sed la popolaj batalantoj persekutis ilin ĉe ilia kalkanumo, plene ilin ekstermis kaj detruis multajn militajn veturilojn. La tuta aŭtoparko tuj ekflamis kun ruliĝantaj fumkolonoj.

La trupoj atakantaj Huu-pordegon ankaŭ plene ekstermis la gardantajn malamikojn kaj konkeris la fortikaĵojn tieajn. Grupo da batalantoj sub la gvido de la rotestro Nam sturmis antaŭen laŭ la bordo de Nhiha-kanalo, disduigis Tayloc-aerodromon kiel akra tranĉilo, kaj poste furioze atakis kaj ekstermis la malamikojn en la tereno de la tenejo de militaj provizaĵoj. La grupo sub la gvido de Duc penetris en la aerodromon tra la orienta pordo, pelis la malamikojn al la centro de la aerodromo kaj ilin plene ekstermis. Kaj sekve, transmarŝinte Nhiha-kanalon la batalantoj en kunagado kun la frata trupo ekstermis la malamikojn en la tereno de la tenejo de militaj provizaĵoj. Samtempe kun tio, ankaŭ grupo sub la gvido de Tuan puŝiĝis en Tayloc-aerodromon, sieĝekstermis ĉiujn malamikojn kaj krome detruis dekojn da aviadiloj. Sub la potenca bato de la popolaj liberigaj armitaj fortoj, la postvivantaj malamikoj sin retiris trans Nhiha-kanalon unuj post aliaj kaj fuĝis al la tereno de la tenejo de militaj provizaĵoj. La tuta Tayloc-aerodromo dronis en incendio.

Nun la urbaj pordegoj ĉiuj estis trarompitaj. La popolaj liberigaj armitaj fortoj sin dividis en tri kolonoj, marŝis en ĉiuj direktoj tra la antikva interna urbo, furioze atakis la ĉeforganojn de la malamiko kaj rapide okupis la terenon kie sidis la administraj institucioj de la malamiko. Multaj el la altrangaj oficistoj de la pupa reĝimo en Hue aŭ kaptiĝis aŭ kapitulacis.

Dum la furioza atakado al la kvartaloj Mangca kaj Tayloc, la popolaj liberigaj armitaj fortoj dissendis trupojn al la urbaj pordegoj Ngomon, Hiennhan kaj Chuongduc, ekstermis la gardantajn malamikojn, okupis tiujn pordegojn, ĉirkaŭis la malamikojn en kvartalo Dainoi kaj furioze atakis kaj ekstermis rekognoskan roton en Dienhongkazerno. La restantaj malamikoj disfuĝis por sin savi, kaj iuj el ili eĉ rampis en kloakon sed ankaŭ estis eltrenitaj de popolanoj kaj membroj de la memdefendaj taĉmentoj.

La malamiko tamen ne volas ĉesi post la fiasko. De post kiam la standardo de la Naciliberiga Fronto kun ora stelo kaj ruĝa kaj blua koloroj fiere ekflirtis super Hue, la uson-pupa armeo organizis unun post alia plurajn senesperajn reatakojn. Sed kio rezultiĝis el tio? Usonaj agresantoj kaj okcidentaj novaĵagentejoj donis plej bonan respondon al tio: "Terura" estas la multeco de la vunditoj kaj mortigitoj el la marinfanterio de Usono ĉe Hue.

LA SENFORTAJ SINJORIDAJ SOLDATOJ

Sub la potenca ofensivo de la heroa popolo de suda Vjetnamio kaj ĝiaj armitaj fortoj la usona agresa armeo perdis multajn el siaj homoj pro morto kaj vundo kaj ĝiaj trupoj kolapsiĝis. La hazarde postvivantaj jankioj sur la batalejoj aŭ svenis aŭ ploraĉis de teruro, vidinte ke iliaj kunuloj subite trafis morton unuj post aliaj. Iuj el ili preĝis al Dio por protekto surgenue dum aliaj perdis sian prudenton kaj fariĝis frenezuloj. Artikolo sur la londona ĵurnalo *Daily Mirror* de la 19-a de februaro raportis: "Unu el la problemoj vaste diskutataj en la usona armeo en suda Vjetnamio estas kiel supervivi la tagon kaj la nokton". Tio reliefe bildigis la papertigrecon de la usona imperiismo. La t. n. "atuta armeo" de la usona imperiismo estas efektive nur fabkazea molaĵo, kies malforteco facile malkaŝiĝas post bato. Jen vidu la teruritecon de la usonaj trupoj ĉe Khesanh priskribitan de raportisto de la usona gazeto *Newsweek*:

"Elaviadiliĝo ĉe Khesanh similas al desalto de sur malrapide moviĝanta ŝarĝvagonaro. La gigantaj transportaj aviadiloj de la usona aera forto, kiuj navedas tien kaj reen al la tendejo dekdu aŭ dekkvin fojojn ĉiutage, neniam tute haltas. Se ili tion farus, ili fariĝus sidantaj anasoj por la kanonistoj de la 'nordvjetnamoj' (t. e. la Popola Liberiga Armeo de Suda Vjetnamio), kiuj de tempo al tempo bombardas la bazon. Por tion eviti, la aviadiloj malfermas siajn vostpordojn kaj elĵetas personojn kaj provizaĵojn dum ili ankoraŭ glitas. Tri minutojn post surteriĝo, la pilotoj jam refunkciigas la maŝinon kaj deflugigas supren en 45-grada angulo por eviti la kanonpafojn.

"La usonaj marinfanterianoj ĉe Khesanh disvolvis apartan karakterizaĵon sub la kontinua kanonado de la vjetnamaj komunistoj. Bombardite, marinfanterianoj ĉiuj estas en streĉega animstato. Neniu piediras. Kontraŭe, ĉiu moviĝas kurante kun unu okulo malfermita por serĉi eblan ŝirmon. Eĉ personoj stirantaj veturilojn per unu mano tenas la radon, per la alia ili tenas la veturilpordon duonfermita, por ke ili povu forsalti ĉe la unua alarmo de ĝeno. Nur post kiam forpasis la konsterno la tendejo revenas al normala stato. Nur tiam

la marinfanterianoj malrapidigas siajn movojn kaj la sulkoj pro timo sur iliaj vizaĝoj ŝajnas malaperi.

"... Terura siblo transflugis super kapo. Tuj poste, kanona obuso falis kun muĝo ien malantaŭ mi. ... Mi ekaŭdis la konatan doloran krion: 'Kadavro-portantojn! Kadavro-portantojn.' En la sama momento, iu marinfanteriano kaŭranta en fendita tranĉeo dekstre de mi ekkriegis: 'Ne svarmu, disiĝu...'

"... La raketoj rekte trafis la tranĉeon de kolonelo David Lownds, la komandanto de la marinfanteria bazo ĉe Khesanh. Tiu kolonelo-komandanto el Florida ne estis tie. Sed sur la vojo antaŭ la tranĉeo kuŝis oficiro de la mara infanterio, lia kontraŭkugla ĵako estis duone forŝirita, formiĝis sangmarĉeto apud lia korpo... Oni povas konstati laŭ la okuloj de la kadavro-portantoj, ke li jam mortis. Li estis unua leŭtenanto, kiu atingis Khesanh nur antaŭ 24 horoj por anstataŭiĝi kiel regimenta adjutanto.

"... Iu marinfanteriano murmuris al si kun levita kapo per postobservada diro kutima al personoj en milito: 'Vi neniam scias, kiam la Morto venos al vi.'"

TERURIĜO DE LA ĈEFOJ EN LA BLANKA DOMO

Kvazaŭ printempa tondro, la printempa ofensivo de la sudvjetnama popolo kaj ĝiaj armitaj fortoj forte skuis Pentagonon ĉe la transa bordo de Pacifiko. Johnson, la ĉefo de la usona imperiismo kaj liaj konsilantoj tuj perdis sian aplombon kaj malkvietiĝis kvazaŭ formikoj sur varma kaldrono. La okcidentgermana ĵurnalo *Neue Rhein-Zeitung* diris tute malkaŝe: "Konsterniĝo, ekscitiĝo, maltrankvilego, timo, senelireco, preskaŭ-senesperiĝo — jen estas la reakcio al la informoj el Vjetnamio". Tio ĉi estas vere majstra priskribo pri la forta konfuziteco de Johnson kaj liaj similuloj.

Tamen Johnson, preskaŭ perdinta siajn saĝon kaj prudenton sub la bato de la sudvjetnama popolo kaj ĝiaj armitaj fortoj, ne volas konfesi sian fiaskon kaj vane klopodas trompi sin mem kaj aliajn kovrante sian malgajan vizaĝon per rideta masko.

Okcidentaj gazetaro kaj novaĵagentejoj raportis, ke Johnson freneze kriis: "Ne, ne, ne, tio ne estas vera", tuj kiam la Blanka Domo ricevis la informon, ke Sajgono, kaj precipe lokoj kiaj la usona "ambasadorejo" kaj la pupa "prezidanta domo", kiuj estis rigardataj de la usonaj imperiistoj kiel ekstreme bone gardataj, ricevis surprizatakon de sudvjetnamaj popolanoj kaj armitaj fortoj. Kaj poste li falis sur sofon kvazaŭ balono ellasinta la gason.

Por ellabori intrigan planon por daŭrigi sian baraktadon, Johnson havis oftegajn kontaktojn kun siaj militaj kaj politikaj ĉefoj, vane klopodante trovi vivsavan pajlon. Sed dum Johnson kaj liaj konsilantoj kaprompadis sensukcese, la sudvjetnama popolo kaj ĝiaj armitaj fortoj denove lanĉis sinsekve ofensivojn kaj donis al la ankoraŭ timtremantaj uson-pupaj armeanoj tiel solidan draŝadon, ke ili lasis kadavrojn ĉie sur la batalejoj. Vizaĝe al tiu mortiga bato, la usona ĵurnalo *Chicago Sun and Times* veis en sia artikolo "Kio estos la Sekva Paŝo de Johnson en Vjetnamio?" aperinta en la 12-a de februaro, ke eĉ Johnson mem "jam havas malmultajn rimedojn elekteblajn". Johnson en la agresa milito kontraŭ Vjetnamio estas komparebla kun la fremda "azeno kun malmultaj saĝo kaj rimedo" en ĉina antikva fablo.

Por "trankviligi la publikon", vidu, Johnson asertis absurde por trompi sin mem kaj la publikon, ke la plenampleksa ofensivo de la sudvjetnama popolo kaj ĝiaj armitaj fortoj estas sensignifa en la milito kaj jam "plene fiaskis". Sed Dean Rusk kaj R. S. McNamara diris deprimite, ke la afero "certe ne tiel estas", kio donis al li plaŭdan vangfrapon. Ke la mensogoj de Johnson ne nur ne povis "trankviligi la publikon", sed eĉ kaŭzis reciprokan riproĉadon inter la ĉefoj de la reganta kliko de la usona imperiismo anstataŭ ilin iom konsoli, montras ke ĉiam pli larĝiĝis la fendoj en la reganta kliko de la usona imperiismo.

Eugene McCarthy, senatano de la Demokratia Partio riproĉis Johnson dirante, ke la disvolviĝo de la situacio en suda Vjetnamio pruvas ke la raporto de la Johnson-registaro pri la tie akiritaj "antaŭenpuŝiĝoj" estas nur "produktaĵo por memtrompo". George W. Romney, ŝtatestro de Michigan diris: "Estas mireginde kaj malĝojige, ke nia propra registaro aŭ ne volas aŭ ne povas diri al ni la veron." Kaj Richard M. Nixon plendis, ke Johnson "preskaŭ jam perdis sian tutan kapitalon".

La diversaj riproĉoj kaj atakoj venantaj el la reganta kliko de Usono faris Johnson ankoraŭ pli "laca kaj strečita" kaj ankoraŭ pli "ĉagrena kaj maltrankvila". La novaĵagentejo *Associated Press* montris en sia informo je la 17-a de februaro, ke Johnson antaŭe intencis "limigi la debaton pri la milito en Vjetnamio", sed "nun aperas ĉiam pli



La batalanto de la liberigaj armitaj fortoj de suda Vjetnamio brave embuskas la malamikojn.

multaj konfliktoj en Vaŝingtono". Eĉ la oficiala institucio de Usono la Usona Informa Servo devigite konfesis: "Oni elmetadas nun neniam montritajn dubojn pri la politikoj de Johnson en Vjetnamio".

LA TUTMONDAJ POPOLOJ AKLAMAS LA BRILAJN VENKOJN

La brilaj venkoj de la sudvjetnama popolo kaj ĝiaj armitaj fortoj dum la Printempa Festo forte kuraĝigis la revolucian batalon de la tutmondaj popoloj, multe levis la batalspiriton de ili kaj donis fortegan baton al la aroganteco de la usona imperiismo kaj ĉiuj reakciularoj. La popoloj de la mondo deklaras kun varmaj ĝojkrioj, ke la brilaj venkoj de la sudvjetnama popolo estas giganta kontribuo al la kontraŭimperiisma batalo de la tutmondaj revoluciaj popoloj, starigis brilan ekzemplon por la tutmondaj popoloj batalantaj por liberigo kaj plene pruvis, ke senfine potenca estas la penso de nia granda gvidanto Prezidanto Maŭ pri popola milito, kaj ke la liberigaj armitaj fortoj naskitaj en la flamo de batalo sub la gvido de la Naciliberiga Fronto de Suda Vjetnamio estas la fidinda garantio por la vjetnama popolo por akiri finan venkon en ĝia nacisava rezistmilito kontraŭ la usona imperiismo.

La albana gazeto *Zëri i Popullit* publikigis redakcian artikolon, kiu skribas, ke la popolaj liberigaj armitaj fortoj de la suda Vjetnamio lanĉis kun neniam antaŭe montritaj fortegoj potencegan ofensivon kontraŭ la uson-pupa kliko. Tio montras, ke la iniciativo sur la sudvjetnama batalkampo delonge jam estas en la manoj de la sudvjetnama popolo kaj ĝiaj armitaj fortoj. Kaj la atakoj montris krome, ke la sudvjetnama popolo kaj ĝiaj armitaj fortoj havas gigantajn fortojn por atako, perfektan organizitecon kaj flekseblajn taktikojn. La liberiga milito de la sudvjetnama popolo jam leviĝis ĝis pli alta nivelo. Pro la brilaj venkoj akiritaj de la sudvjetnama popolo kaj ĝiaj armitaj fortoj apartan ĝojon sentas la laosa popolo, kiu estas kondukanta sangan batalon kontraŭ la usonaj agresantoj kaj iliaj lakeoj. Revuante la eventon, Radio de Pathet Lao montris: La fakto, ke la sudvjetnama popolo kaj ĝiaj armitaj fortoj samtempe surprizatakis dekojn da urboj kaj urbetoj, multajn stabejojn, apogpunktojn kaj postfrontservajn bazojn metante la usonan imperiismon kaj ĝiajn lakeojn en ĥaoson kaj defensivon, montras la potencajn fortojn kaj rapidan kreskadon de la sudvjetnama popolo kaj ĝiaj armitaj fortoj marŝantaj al la plena venko. La venkoj de la sudvjetnama popolo kaj ĝiaj armitaj fortoj estas efektiva subteno kaj granda stimulo al la patriotaj popolanoj kaj armitaj fortoj de Laoso kun firma decido frakasi ĉiajn militajn aventurojn de la usona imperiismo kaj ĝiaj lakeoj!

Ĵurnaloj, gazetoj kaj popolaj organizoj de nombro da afrikaj landoj publikigis revuojn kaj deklarojn unuj post aliaj por laŭdi la brilan kontribuon de la sudvjetnama popolo en batalo kontraŭ la usona imperiismo, kaj montris, ke la usona imperiismo certe cindriĝos en la incendio de popola milito. En sia revuo, la tanzania gazeto *Naciisto* skribas: "Usono plene fiaskos en Vjetnamio. Tio estos la fino de la tirana usona imperiismo." *Kongolanda Laboristo*, organo de la Sindikata Federacio de Kongolando (B.) montras en la artikolo


"Neniu Elirejo por la Jankioj en Vjetnamio" aperinta en ĝia lasta numero: "La venkoj de la vjetnama popolo plene pruvas, ke popola milito estas la plej bona rimedo kontraŭ la agreso de la usona imperiismo. Certe cindriĝos finfine la usona imperiismo en la incendio de popola milito." La Plenuma Buroo de la Tutlanda Laborista Federacio de Malio deklaris, ke la potenca ofensivo lanĉita de la popolaj liberigaj armitaj fortoj de suda Vjetnamio sendube signifas malvenkon de la agreso de imperiismo. Dum pli ol sep jaroj la brava vjetnama popolo luktanta kontraŭ la kolosa militaparato de la imperiistoj senĉese akiris brilajn venkojn, ĉar justa estas ĝia batalo.

Ankaŭ la Konstanta Buroo de Aziaj kaj Afrikaj Verkistoj kaj la Sekretariejo de la Asocio de Aziaj kaj Afrikaj Ĵurnalistoj montris en siaj respektivaj deklaroj, ke nek la modernaj armiloj de la usona imperiismo nek la pli ol miljon armeanoj en la uson-pupaj trupoj en suda Vjetnamio povas savi ĝin de fiasko. La bravaj popolaj liberigaj armitaj fortoj de suda Vjetnamio jam pruvis, ke imperiismo kun Usono ĉe la kapo estas nur papertigro. La venkoj de la sudvjetnama popolo estas ankaŭ peza frapo sur la sovetunia reviziismo, kiu estas kolportanta la trompan "pactraktadon" en koluzio kun la usona imperiismo.


La granda venko de la sudvjetnama popolo en la printempa ofensivo forte kuraĝigis la sepcentmiljonan ĉinan popolon kiu profunde komprenas, ke la batalo de la vjetnama popolo estas ankaŭ batalo de la ĉina popolo, kaj la venko de la vjetnama popolo estas ankaŭ venko de la ĉina popolo. La ĉina popolo kaj la Ĉina Popola Liberiga Armeo armitaj per la penso de Maŭ Zedong kaj harditaj en la granda proletara kultura revolucio ĉiam firme tenas en sia koro la instruon de Prezidanto Maŭ: **"La sepcentmiljona ĉina popolo estas potenca apogilo por la vjetnama popolo, kaj la vasta teritorio de Ĉinio estas fidinda postfronto de la vjetnama popolo."** La sepcentmiljona ĉina popolo firme subtenos la vjetnaman popolon batali ĝis la fina venko, ĝis kiam ĉiuj usonaj agresantoj estos senescepte forpelitaj el Vjetnamio.



Usonaj agresantoj ekstermitaj en Sajgono de la Liberiga Armeo de suda Vjetnamio



La usonaj aviadiloj turniĝis en rubojn.





(Supre) *La ĉina kaj korea popoloj kune batalas por frakasi la agresan armeon de Usono.*

(Malsupre) *Grandnombraj usonaj agresaj armeanoj kaj iliaj britaj komplicoj estas kaptitaj kaj eskortataj al la postfronto.*

Solida Batado Imperiismo

HU HIUDAŬ — *unuaklasa batalheroo el*

MI batalis kontraŭ la usona imperiismo unuafoje en novembro de 1952, en la kampanjo ĉe Sangkamriong en Koreio. Tiam mi estis nur iom pli ol 17-jara nova batalanto, kiu surmetis al si soldatan uniformon nur antaŭnelonge. Subplotonestro Li Feng, mi mem kaj alia nova batalanto Teng Tuŝeng firme gardis triope antaŭpostenon sur la 597-a altaĵo de Sangkamriong. Direktate de la komandantoj kaj subtenate de la intensa kaj potenca kanonado de nia armeo, nia trupo sur la 597-a altaĵo, de la tagiĝo ĝis la vesperiĝo, rebatis 41 sturmojn lanĉitajn de tutaj plotonoj kaj batalionoj de la uson-pupa armeo ŝirmataj de kanonoj, tankoj kaj aviadiloj, kaj ekstermis pli ol 280 malamikojn. La batalejo plenis de kadavroj el la uson-pupaj trupoj, sed ĉi tiuj neniam sukcesis transpasi nian batalpozicion eĉ je unu sola paŝo.

KUN APLOMBO KAJ KURAĜO NI VENKIS EN LA UNUAJ DU BATALOJ

La 5-an de novembro, 1952 estis tago en Usono por elekti la prezidanton. Por akiri iom da "politika negoc-fonduso" sur la korea batalkampo, la usona imperiismo sendis sian militan ĉefon James A. Van Fleet kaj la sudkoreian marioneton Singman Ri sur la frontlinion, ke ili persone aranĝu por lanĉi sian prifanfaronitan "la plej furiozan ofensivon en la jaro" kontraŭ Sangkamriong. La gravita punkto de ilia atako estis ĝuste la plej alta montpinto de la 597-a altaĵo en la dekstra parto de Sangkamriong. Kaj nia subplotono estis asignita ĝuste al gardado de la antaŭposteno de tiu altaĵo. Tie estis tri pozicioj: la 9-a en la fronto, la 10-a en la malantaŭo, la 3-a en la maldekstro, kun negrandaj distancoj inter si. Subplotonestro Li Feng, mi mem kaj Teng Tuŝeng firme gardis la 3-an pozicion. Tie ne troviĝis tranĉeo kaj la subplotonestro ordonis, ke mi min loku sub roko kies duono estis disrompita de malamikaj obusoj, por ke mi observu la malamikon sub ĝia ŝirmo.

Je la tagiĝo, salvoj de la malamika pozicio ekatakis nin kaj baldaŭ la bombardado etendiĝis post nin. Mi elŝovis la kapon, ĵetis rigardon malsupren kaj trovis, ke nigraj grupoj de malamikoj grimpas supren al ni. Mi tuj raportis tion al la subplotonestro. Li neniom konsterniĝis kaj diris senhaste: "Restu aplomba, ekpafu nur laŭ mia ordono." Kiam la malamikoj estis ĉirkaŭ 40 metrojn for de ni, jen la subplotonestro ekkriegis: "Ekbatu, Hu Hiudaŭ!" Mi ĵetis mangrenadojn kaj poste eksplodigajn stangojn, mi ne scias kiom da ili mi ĵetis. Post intensa batalo la malamikoj

al la Papertigra Usona sur Sangkamriong

la Ĉinaj Volontuloj por kontraŭbatali Usonon kaj helpi Koreion

estis puŝitaj malsupren. Tiam mi ĵetis rigardon malsupren kaj vidis, ke la malamikoj jam forfuĝis postlasinte arojn da kadavroj sur la montdeklivo. Tiam la subplotonestro ordonis, ke ni resumu la sperton de la unua batalo ordigante la kartoĉojn. Li diris: "Triope ni gardas la pozicion kaj rebatis la dekkelkoble pli multajn malamikojn. Jen la taktiko instruita de Prezidanto Maŭ venki multon per malmulto. En batalo oni nepre devas esti aplomba kaj kuraĝa, ne timi enlasi la malamikon por surprize ĝin ataki poste kaj bati solide." Kaj li aldonis: "Estas malfacile alporti municion de malsupre, do bone celu kaj ne malŝparu ĝin."

Dume, la malamiko denove ekkanonis. Ĉifoje pli furioze. La subplotonestro ordonis, ke mi tuj atente esploru. Ĉifoje mi klare vidis, ke ĉirkaŭ du plotonoj de la malamiko sur la manoj kaj piedoj rampas supren per ĉiuj siaj fortoj. Sed ju pli supren ili venis, des pli ili kunpremiĝis unuj al aliaj pro timo. Mi raportis tion al la subplotonestro. Poste, mi kaj li bone celis niajn pafilojn, unu al la antaŭirantoj, la alia al la postirantoj, kaj pafadis tiel, ke la malamikoj povis nek antaŭeniri nek retiriĝi; ili konfuziĝis kaj malordiĝis. Neniu el ili sukcesis elsavi sian vivaĉon. Mi tiel ĝojiĝis, ke mi volis stariĝi por manklaki kaj krii. La subplotonestro haste ektiris min je la kruro kaj detenis min severe dirante: "Estas bone, ke vi batalas brave, sed ni ne devas perdi la singardemon kaj fali en kaptilon de la malamiko." Apenaŭ forsonis la vortoj de la subplotonestro, de la malamika pozicio alflugis bruligaj obusoj. Nia posteno tuj kovriĝis de sufoka densa fumo. Profitante tion, la malamikoj rampis supren. Ĉifoje, ŝanĝinte sian taktikon, ili formis triangulon kun la pinto malantaŭen kaj svarme antaŭenpuŝiĝis al ni en tri kolonoj. "Jen ankaŭ rimedo por ilin rebati," diris la subplotonestro. "Vi batu la maldekstran kolonon, mi la dekstran, kaj ilin eksterminte ni kune batu la mezan." Dank' al ĝustatempa subteno de nia baterio, ĉifoje ni denove tiel solide batis la malamikojn, ke ili forfuĝis en paniko postlasante multajn kadavrojn dise sur la batalejo.

PLENA EKSTERMO DE USONAJ AGRESANTOJ

Sub la komando de la subplotonestro, ni klopodis perfektigi la batalarton dum la luktado kaj fariĝis ĉiam pli lertaj. Ni ŝanĝadis nian taktikon laŭ la manovroj de la malamikoj kaj konkursis kun ili kaj en kuraĝo kaj en saĝo. Ni rebatis la malamikojn en ĝiaj dekkelkaj atakoj. Tiam la naŭa pozicio falis en krizon kaj la rotestro ordonis, ke la subplotonestro ĝin helpu. La subplotonestro ordonis, ke mi prenu la trian pozicion sub mian komandon kaj ripetfoje diris al mi kaj Teng Tuŝeng: "Nepre bone gardu la pozicion, kaj ne lasu la malamikon veni supren." Mi kaj Teng Tuŝeng diris al li unuvoĉe: "Ni ne perdos la pozicion, se nur ni vivos; ni persiste batalos ĝis la fino!" Kiam la subplotonestro foriris, mi iom maltrankviliĝis. Sed tiam mi pensis, ke mi nepre devas bone plenumi la taskon, se mi ĝin ricevis. Kvankam la pozicio estis malgranda, tamen post ĝi ja troviĝis centmiljonoj da laborantaj popolanoj. Mi ekmemoris pri alia volontulo Liu Hingven batalanta kontraŭ la usonaj agresantoj por helpi Koreion. Ankaŭ li estis nova batalanto kaj tamen povis elstari en kriza momento por direkti la batalon kaj finfine venkis la usonajn diablojn atakantajn. Nemalproksime de nia pozicio troviĝis la loko, kie la granda revolucia batalanto Huang Giguang oferis sian vivon por ŝtopi malamikan maŝinpafilan aperturon en kontraŭatako. Kuraĝon mi ricevis de iliaj heroaĵoj. Mi faris firman decidon eĉ oferi mian vivon por tenadi la pozicion, se estos necese. Do mi transiris al la komanda pozicio de la subplotonestro kaj diris, ke Teng Tuŝeng observadu la malamikon ĉe la loko kie mi kaŭris antaŭe. Ni kuraĝigis unu la alian, ke ni bone pristudu la aktivadon de la malamikoj kaj batalu aplombe. Tiam la kanonoj de la malamikoj ektondris denove kaj alflugis pezaj obusoj. Kiam la kanonado ĉesis, mi eletendis la kapon por rigardi kaj vidis, ke grandaj aroj da malamikoj plumpe grimpas supren. Mi rimarkis, ke iu el la malamikoj esploris supren tra binoklo sidante

sur la genuoj. Li ekmalkaŝis sian vizaĝon kaj montris, ke li estas usona nazegulaĉo. Mi tuj ekfumis de indigno kaj ĵetis al li mangrenadon, ĉe kies tondra eksplodo malaperis tiu diablo. Ankaŭ la aliaj usonaj soldatoj rampintaj ĝis la monttalio malordiĝis kaj konfuze kriaĉadis. Mi kaj Teng Tuŝeng tuj ekpafadis per mitraloj kaj ilin ĉiujn ekstermis ĉe la monttalio. En tiu batalo ni havis vere kontentigan elverŝon de nia malamo.

LA PAPERTIGRO ESTAS NEMALFACILE VENKEBLA

Ni firme gardadis la pozicion. La malamikoj lanĉis pli ol 40 atakojn, sed fiaskis ĉiufoje kaj finfine devis sin helpi per aviadiloj kaj tankoj. La malamikoj veturigis pli ol 20 tankojn en la valon kaj rekte bombardadis nian postenon. Iliaj aviadiloj ĉirkaŭflugadis tiel malalte, ke la aloj preskaŭ ektuŝis la montpinton, kaj mitraladis plenpove. Ni nin kaŝis post ŝirmaĵoj, havigis al ni municion kaj preparis nin por plej furioza batalo. Sed ne tre longe arogantis la tankoj kaj aviadiloj ĝis ili ricevis meritatajn punojn. Mi vidis propraokule, ke malamikaj aviadiloj ekbrulas trafite de niaj pafoj, kaj mi ankaŭ vidis propraokule, ke malamikaj tankoj falis en ĉirkaŭbaton de niaj ŝrapneloj kaj ne havas elirejon. La malamikoj ne volis akcepti sian fiaskon kaj elsendis infanterianojn por sturmi supren 3-5-ope. Sed ĉifoje ili ricevis atakon de ni en duoblo: surmonte ni pafadis al la proksimaj celaĵoj dum nia baterio trafe eksplodigadis obusojn meze de la malamikaj grupoj. Kaj la batalo de tiu tago finiĝis per la plena malvenko de la papertigra usona imperiismo.

Materialo

Naskiĝo kaj Kresko en Batalado

—pri la Popolaj Liberigaj Armitaj Fortoj de Suda Vjetnamio

La 15-an de februaro 1961, unuiĝis la liberigaj armitaj fortoj de la heroa popolo de suda Vjetnamio en diversaj lokoj. Tion efektivigis, en tiu brila dato antaŭ sep jaroj, la Naciliberiga Fronto de Suda Vjetnamio — la glora standardoportanto de ĝia popolo, laŭ la bezonoj de la revolucia situacio, por plue venki la usonan imperiismon kaj ĝiajn lakeojn. Dank' al tio, la nacisava batalo de la sudvjetnama popolo kontraŭ la usona imperiismo eniris en novan etapon kun koncentra gvidado kaj unueca organizo.

La popolaj liberigaj armitaj fortoj de suda Vjetnamio ja naskiĝis, kreskis kaj potenciĝis en la revolucia fajro de la nacisava batalo kontraŭ la usona imperiismo. Ekde la jaro 1959 la sudvjetnama popolo jam amase organizis memdefendajn trupojn kaj heroe batalis kontraŭ la malamiko armite per simplaj kaj primitivaj armiloj, kiaj sabroj, lancoj, pafarkoj kaj loke faritaj pafiloj. Kaj ĝuste el tiuj memdefendaj trupoj naskiĝintaj en la revolucia fajro devenis la nunaj popolaj liberigaj armitaj fortoj de suda Vjetnamio.

La popolaj liberigaj armitaj fortoj de suda Vjetnamio estas heroa revolucia armeo, kiu venas el la popolo kaj batalas por ĝi. La popolo profunde amas kaj subtenas ilin. En la pasintaj sep jaroj, sub la gvidado de la Naciliberiga Fronto de Suda Vjetnamio, ili konkeris multajn malfacilojn kaj rapide kreskis en sangaj bataloj el malgrandaj gerilaj taĉmentoj en nevenkeblajn potencajn fortojn konsistantajn el ĉefaj trupoj, lokaj trupoj kaj milicaj taĉmentoj gerilaj.

Dum la sep jaroj, kreive aplikante la nekompareble potencan magian rimedon — popolan militon, la heroe batalantaj popolaj liberigaj armitaj fortoj de suda Vjetnamio akiris brilajn venkojn unuj post aliaj kaj levis la popolan militon de Vjetnamio al pli alta nivelo. Laŭ nekompleta statistiko, en la sep jaroj ĝis la 13-a de decembro 1967, ili jam ekstermis kaj diserigis malamikan armeon de preskaŭ 1,500,000 anoj, inkluzive de pli ol 300,000 usonaj agresaj armeanoj kaj alilandaj kunkrimaj armeanoj, komplete ekstermis 181 batalionojn kaj 932 rotojn de la usonaj kaj pupaj trupoj, faligis kaj detruis 8,590 malamikajn aviadilojn; detruis pli ol 15,800 malamikajn militajn veturilojn. Precipe depost la Printempa Festo de la kuranta jaro, kune kun la vasta popolo, ili formis gigantan atakforton per kombino de armeo kaj popolo, de urboj kaj vilaĝoj kaj de interno kaj ekstero, por fari nekontraŭstareblan, plenampleksan atakon kontraŭ la malamiko kun impeteco de lavango, kaj akiris mondskuan, senkompare brilan venkon. Nur en proksimume 30 tagoj, de la nokto de la 29-a de januaro ĝis la fino de februaro, ili ekstermis pli ol 90,000 malamikajn armeanojn, inkluzive de pli ol 20,000 usonaj agresaj armeanoj kaj alilandaj kunkrimaj armeanoj, diserigis pupan armeon de pli ol 200,000 anoj kaj detruis pli ol 1,800 malamikajn aviadilojn. La granda printempfesta venko de la armeo kaj popolo de suda Vjetnamio, kiuj fariĝas ĉiam pli fortaj en bataloj, montras ke la iniciativo sur la batalkampo en suda Vjetnamio estas firme tenata en iliaj manoj, dum la usona imperiismo iras al kompleta fiasko en pli rapida ritmo.

Brila Tezo, Giganta Potenco

ĜANG GIHUJ — *batalheroo de la antaŭaj Ĉinaj Popolaj Volontuloj*

PRINTEMPON de la jaro 1968, en la sonado de triumfa kanto de la ĉiuflanka venko de la granda proletara kultura revolucio de nia lando, venis la informo pri la brila venko de la plenampleksa atako fare de la heroaj popolaj liberigaj armitaj fortoj de suda Vjetnamio. Bele batalis la heroaj armeo kaj popolo de suda Vjetnamio! La ĉina popolo kaj revoluciaj popoloj de la tuta mondo ĉiuj ĝojegas pro tiu granda venko, dume la sinjoroj de Vašingtono terurite lamentas en ĥaoso.

La granda printempa venko de la armeo kaj popolo de suda Vjetnamio ankoraŭfoje pruvas elokvente la senkomparan eminentecon kaj ĝustecon de la fama aserto de Prezidanto Maŭ — **"Ĉiuj reakciuloj estas paperaj tigroj"** kaj montras la grandan potencon de lia brila penso de popola milito.

Antaŭlonge, en 1946, nia granda gvidanto Prezidanto Maŭ jam faris la eminentan aserton, ke **"Ĉiuj reakciuloj estas paperaj tigroj"**. Tiam nia Liberiga Milito troviĝis ankoraŭ en sia komenca periodo. Apogante sin sur la tutfortan subtenon de la usonaj imperiistoj kaj sian reakcian armeon kun 8,000,000 soldatoj plene armitaj per usonaj ekipaĵoj, Kuomintango arogante lanĉis grandskalan kontraŭkomunisman, kontraŭpopolan kaj kontraŭrevolucian enlandan militon por ataki niajn liberigitajn regionojn. Antaŭ la ĝisdente armitaj malamikoj, la eminenta aserto de Prezidanto Maŭ multe kuraĝigis la popolon por gajni kun fido la venkon de la Liberiga Milito. En malpli ol tri jaroj, ni plene ekstermis la banditajn trupojn de Ĉiang Kajŝek, forpelis la usonajn rabistojn, kaj gajnis la grandan venkon de la Liberiga Milito.

Sed la usona imperiismo, kiu ne volontis esti venkita, lanĉis en 1950 barbaran agresan militon al Koreio. Kiom impertinentaj estis tiam la usonaj imperiistoj! Ili brue fanfaronis pri sia "superreco" en tio kaj ĉi tio, intencante timigi la revoluciajn popolojn al submetiĝo. Sed tion ne timis la ĉina popolo armita per la penso de Maŭ Zedong. Laŭ la ordono de la granda ĉefkomandanto Prezidanto Maŭ, la Ĉinaj Popolaj Volontuloj brave kaj kuraĝe transiris Jalu-riveron por forte bati la usonajn lupojn kaj plene venkis la usonan imperiismon kune kun la korea popolo sur la fronto kontraŭ la usona agreso. La rezulto ankoraŭfoje pruvas, ke antaŭ la ĉina popolo armita per la penso de Maŭ Zedong, la aroganta usona imperiismo estas nur papera tigro.

Ni povas ankoraŭ bone memori, kiom freneze impertinentaj siatempe estis la usonaj imperiistoj, kiuj havis multajn aeroplanojn kaj altan teknikon, precipe la usonaj aeraj banditoj, kiuj havis batalsperton en la Dua Monda Milito. Tiam al ni ĉinaj junaj aeraj batalantoj, kiuj flugis per jetoj nur kelkdek horojn, tute mankis sperto de efektiva batalo. Sed, laŭ la eminenta instruo de Prezidanto Maŭ malestimi strategie ĉiujn malamikojn, sed taktike trakti ilin serioze, ni decide donis

fortajn batojn al la paperaj tigroj. En iu batalo, mi renkontis Davis, la "atutan piloton" de Usono. Kvankam li estis ruza, tamen li timis morton kaj ne povis elteni niajn impetegajn atakojn, nur post du renkontiĝoj ni jam sukcesis eksplodigi lian aeroplanon en la aero, kaj Davis, la tiel nomata "atuta piloto", ricevis sian indan punon de morto.

Hodiaŭ, la usonaj imperiistoj, havantaj neniun elirejon sub la batoj de la revoluciaj popoloj de la mondo, faras sian antaŭmortan barakton kaj sin okupas pri pli granda milita aventuro. Intense plivastigante la agresan militon al Vjetnamio, ili sencêse faris militajn provokojn al nia lando. Sed ili ricevis fojo post fojo pezajn batojn de niaj heroaj aeraj fortoj. Sole en la pasinta jaro, ni faligis 11 diversspecajn aeroplanojn de Usono. La fakto refoje pruvas elokvente, ke homo armita per la penso de Maŭ Zedong estas plej potenca batalforto; posedante la penson de Maŭ Zedong, oni povas konkeri la aeron kaj venki ĉion.

Nia granda gvidanto Prezidanto Maŭ instruas al ni: **"Armiloj estas grava faktoro en milito, sed ne la decida faktoro; tio, kio decidas, estas homoj sed ne objektoj."** En la historio de popola revolucio ĉiam tiel okazis, ke revolucia popolo kun malplenaj manoj venkis reakciulojn kun novtipaj armiloj, kaj revoluciaj trupoj malbone ekipitaj venkis kontraŭrevoluciajn trupojn kun superaj ekipaĵoj. Ĉiuj aspekte fortaj reakciuloj estas nur paperaj tigroj, ĉar ili sin apartigis de la popolo. Same kiel la jam faligitaj germanaj, japanaj kaj italaj faŝistoj, ankaŭ la usonaj imperiistoj estas reprezentantoj de la putrianta kaj dekadencanta monopola kapitalo. Por protekti la interesojn de monopolaj kapitalistoj, la usonaj imperiistoj etendas sian manon al Azio, Afriko, Latinameriko kaj la tuta mondo por ĉie rabadi. Aspekte ili estas timindaj, sed ĉar ili subpremas popolojn, tial ili ĉie renkontas rebaton. Sur la batalkampo de suda Vjetnamio kaj en trancêoj en Laoso, plenaj de kanonfajro kaj pulvofumo, sur afrika kontinento envolvita de revolucia tajdo, en ĝangaloj de Latinameriko, kie sonas batalaj klarionoj, ĉie la popoloj krias la saman sloganon batalan: "For la usonan imperiismon!" Oni povas aserti: rezulte de la heroa batalo de la tutmondaj popoloj kontraŭ la kruelaj malamikoj — la usona imperiismo, moderna reviziismo estrata de sovetunia reviziisma gvidanta kliko kaj diverslandaj reakciuloj, **"la mondo nepre apartenos al la popolo. Ĉiuj demonoj estos senescepte ekstermitaj."**

La Potenco

— Rakonto pri ia Heroa

LA Heroa Eskadro de Aer-soldatoj de iu trupo de la aer-armeo de PLA estas heroa trupo senlime fidela al Prezidanto Maŭ, la penso de Maŭ Zedong kaj la proletara revolucia linio de Prezidanto Maŭ.

"Lasu, ke la penso de Maŭ Zedong okupu ĉiun parton profunde de la animo."

"Uzu la penson de Maŭ Zedong por direkti ĉiun colon da milita aviado."

Jen estas la ŝtala ĵuro de tiu ĉi heroa kolektivo kaj ankaŭ ĝia brila praktiko.

Dum la pasintaj dekkelkaj jaroj, kun la heroa spirito subigi ĉiujn malamikojn, ili faligis kaj difektis dek kvar malamikajn aviadilojn kaj akiris brilajn venkojn en sia batalo por defendi la grandan socialisman patrion kaj doni pezan baton al la agresantoj de la usona imperiismo. En 1966 la Ministerio de Nacia Defendo donis al ili la honoran titolon "Heroa Eskadro de Aer-soldatoj".

I

La Heroa Eskadro de Aer-soldatoj kreskis sub la brila gvido de la penso de Prezidanto Maŭ pri la konstruado de la armeo kaj en la batalado kontraŭ la agresantoj de la usona imperiismo kaj la burĝara linio pri la konstruado de la armeo.

Ĉiuj aviadistoj de tiu ĉi eskadro ja havis mizeran vivon en sia infaneco kaj ne estas multe edukitaj. Ĉe la komenco de ilia lernado ili trafis jen "principon" jen "leĝon" de flugado, kiujn ili neniam antaŭe aŭdis. La ĉina Ĥruŝĉov kaj la kontraŭrevolucia reviziisto Peng Dehuaj flirtigis la nigran flagon de "tekniko en la unua loko", plenenergie kontraŭstaris la proletaran linion de Prezidanto Maŭ pri la konstruado de la armeo kaj malhelpis

de la Penso de Maŭ Zedong en la Ĉielo

Eskadro de Aer-soldatoj de iu trupo de la aer-armeo

la junajn aviadistojn flugi en la aeron kaj ekstermi la malamikon. Kelkaj burĝaraj akademiaj "aŭtoritatuloj", kiuj donis la instruon, diris, ke tiuj lernantoj havas nur malaltan nivelon de edukiteco, tial ili absolute ne povos mastri la komplikan teknikon de flugado. Ĝaŭ Dean, kiu la unua funkciis kiel estro de tiu ĉi eskadro, ne bone surterigis sian aviadilon en la komenca periodo de sia flugado, tial ili asertis, ke li ne povos fariĝi aviadisto. Tiam la plej grava demando kuŝanta antaŭ la aviadistoj estis, sur kio ili devis sin apogi por flugi en la ĉielon. Ĉu ili elstarigos la militan teknikon aŭ la proletaran politikon — la penson de Maŭ Zedong? Kion ili metos sur la unuan lokon, teknikon aŭ homon? Tio estas vivmorta batalo rilate al la demando, ĉu oni persistos ĉe la proletara linio de Prezidanto Maŭ pri la konstruado de la armeo. La instruo de Prezidanto Maŭ pri la konstruado de la armeo per politiko donis neelĉerpeblan forton al la junaj aviadistoj. K-do Ĝaŭ Dean ne rezignis, kaj kun firma volo li esprimis al la partio sian senton: "Prezidanto Maŭ alvokis, ke ni konstruu fortan popolan aer-armeon. Mi nepre sukcesigos mian flugon, kaj mi havigos sperton al la konstruado de la popola aer-armeo, eĉ se mi falos morta!" Dum la fluglernado, li estis tre diligenta, montris malcedemon kaj fortan persistemon, konkeris multajn malfacilojn kaj fine sukcesigis sian flugon. Li ne nur flugis laŭ la postulo de la ĝeneralaj ekzercoj, sed li ĉiam la unua hakis la vojon por plenumi malfacilajn ekzercojn. Kiam batalo leviĝis, li ĉiam postulis, ke li la unua flugu en la ĉielon. Foje, utiligante la kompleksajn veterajn kondiĉojn de densa nubo kaj pluvo, kelkaj malamikaj aviadiloj enŝteliĝis por fari atakon. En tiu ĉi batalo por defendi la teritorian aeron de la patrio, Ĝaŭ Dean kondukis sian grupon por la kontraŭofensivo, rompis la ordinaran rutinon, lerte uzis sian saĝecon kontraŭ la ruzaĵo de la malamiko, lanĉis surprizan atakon kaj multege konsternis la malamikon, kaj tiel ili faligis du kaj difektis unu el la malamikaj aviadiloj. Post tio li plurfoje kondukis sian grupon, akiris multajn venkojn kaj faris unu post alia meritplenajn kontribuojn en batalado. Nun Ĝaŭ Dean jam estas bona flugdirektisto.

Multaj veteranaj aviadistoj de tiu ĉi heroa eskadro spertis severan provon de batalo, havas altan klasan konscion kaj senkompare profundan klasan senton al la linio de Prezidanto Maŭ pri la konstruado de la armeo. Ili diris: "Prezidanto Maŭ instruas al ni, ke ni servu al la popolo tutkore kaj tutanime. Ni estas la aer-armeanoj de la popolo, kaj ni absolute ne permesas la malamikon entrudiĝi en la aeran teritorion de la popolo." Ĉiu el ili havas ruĝan koron por servi al la popolo tutkore kaj tutanime. Ili neniel perdis sian kuraĝon, eĉ kiam ili trafis treege malfacilan problemon en flugado. Se ili ne sukcesis ellerni per unu fojo, ili lernis dufoje, trifoje kaj eĉ kelkdekfoje. Estis sufoke kaj varmege en la pilotejo dum la somero, sed ili ĉiam restis tie longan tempon. Ili persistis en sia lernado malgraŭ ke ili suferis de kapturniĝo aŭ vidkonfuziĝo kaj pluve ŝvitis. Tiamaniere ili venkis la malfacilojn unun post alia apogante sin sur la ĉiamvenka penso de Maŭ Zedong kaj rapide kreskis en la batalado.

II

Ĝuste kiam la aviadistoj de tiu ĉi eskadro sukcese ellernis flugarton, ili iris partopreni la batalon por rezisti la usonan imperiismon kaj helpi Koreion. Tiam tiuj junaj batalantoj de la aer-armeo flugis per militaviadiloj nur dudek ĝis tridek horojn, dum iliaj rivaloj — la usonaj aeraj banditoj — preskaŭ ĉiuj estis malnovaj aeraj rabistoj,

kiuj jam flugis mil ĝis dumil horojn. Ĉu ili tiam povis venki la malnovajn aerajn rabistojn de la usona imperiismo? Por kelkaj tio estis enigmo. Sed ili retrorigardis la travivaĵojn dum sia persona partopreno en la Kontraŭjapana Rezistmilito kaj la Liberiga Milito kaj diris: "Sub la saĝa gvido de Prezidanto Maŭ ni uzis en tiuj militoj fusilojn kaj mangrenadojn kaj venkis la japanajn diablojn kaj la banditarmeon de Ĉiang Kajŝek plene armitan per usonaj armiloj. Tiu fakto pruvis, ke ili estas nur papertigroj laŭaspekte fortaj sed interne malfortaj. Nun ni jam havas flugilojn, do same kiel antaŭe ni ankaŭ venkos la malamikon en la aera batalo. Sub la kuraĝigo de la saĝa aserto de Prezidanto Maŭ **"Ĉiuj reakciuloj estas paperaj tigroj"** la aviadistoj plenfide ĵetis sin en la aeran batalon. En la aera batalo ili plene disvolvis la kapablon de homo, kunportis kun si la heroecon de la tera armeo ĵeti eksplodaĵon kaj fari bajonetan batalon kaj forte atakis la malamikon per proksima batalo tuj post sia flugo supren. Tiel ili akiris venkon en la unua batalo, en kiu ili faligis tri malamikajn aviadilojn, senmaskigis la usonajn aerajn banditojn kiel paperajn tigrojn, senkompate refutis la absurdaĵon pri la "tekniko en la unua loko" pleditan de la ĉina Ĥruŝĉov kaj la kontraŭrevolucia reviziisto Peng Dehuaj. Tio plene pruvis la veron, ke la plej granda batalforto estas homo armita per la penso de Maŭ Zedong.

De dekkelkaj jaroj la aviadistoj de la heroa eskadro ĉiam senŝanceliĝe iras laŭ la brila vojo de la penso de Maŭ Zedong kaj faras flugadon en la vastega ĉielo apogante sin sur la elstarigo de politiko. Foje la aviadisto Gaŭ Ĉanggi renkontis du aviadilojn de la Ĉiangkajŝeka banditaro faritajn en Usono. La alteco de la malamikaj aviadiloj estis naŭ mil metroj, dum tiu de la aviadilo de Gaŭ Ĉanggi estis dek unu mil, kaj estis tre malfacile rapide flugatingi la malamikajn aviadilojn. Sed li gravuris en sia koro la instruon de Prezidanto Maŭ pri la venko en milito: **"La decida faktoro estas la homo kaj ne la objekto."** Li kredis, ke se li plene disvolvos la kapablon de homo, li povos ripari la mankon rilate al rapideco, sekve do li ĵetiĝis malsupren kun brulanta malamo. La plonĝo de supersona aviadilo produktis treege grandan suprenpremon, kaj tio igis la aviadiston perdi sian pezon kaj malfaciligis lian manipuladon de la aviadilo. Sed lia malamo kontraŭ la malamiko kaj lia alta idealo de komunismo naskis en li senkomparan kuraĝon kaj profundan saĝon, la funkcio de la aviadilo estis plene utiligita kaj la distanco inter li kaj la malamika aviadilo fariĝis ĉiam pli kaj pli mallonga. Kiam li atingis la distancon por efika pafado, li verŝis sian tutan malamon sur la kanonadon. Pafiĝis serio da obusoj, kaj la malamika aviadilo falis en la maron kuntrenante strion da densa fumo.

Dum la granda proletara kultura revolucio la aviadistoj de la heroa eskadro atingis novan kulminon sur la vojo de elstarigo de la penso de Maŭ Zedong. Ili faris alian paŝon antaŭen en aplikado de la penso de Maŭ Zedong por direkti la tutan procedon de militado kaj trejnado kaj faris la tutan procedon de flugado granda kurso por kreiva studo kaj kreiva apliko de la verkoj de Maŭ Zedong. Nun ili jam uzas la vortojn de Prezidanto Maŭ por gvidi ĉiun flugon kaj ĉiun batalon. Aŭdante ĉe ekflugo la komandon de Prezidanto Maŭ **"Tiu ĉi armeo posedas spiriton nevenkeble marŝi antaŭen, kaj ĝi decidas faligi ĉiujn malamikojn kaj neniam esti subigita de malamikoj"**, ili trovas en si neelĉerpeblan forton. Aŭdante dum batalo la komandon de Prezidanto Maŭ **"Disvolvi nian batalstilon — kuraĝo en batalo, maltimo al sinofero, maltimo al laciĝo kaj kontinua batalado (t. e. entrepreni senripoze sinsekvajn batalojn dum mallonga tempo)"**, ili fariĝis des pli fortoplenaj, ju pli ili batalis. Aŭdante dum sia reveno post venko la komandon de Prezidanto Maŭ **"Sub nenia cirkonstanco ni devas malstreĉi nian singardemon"** ili des pli akrigis sian singardemon, ju pli grandan venkon ili akiris, kaj ili rigardis sian venkon kiel komencon de alia nova venko. Obeante la komandojn de Prezidanto Maŭ la aviadistoj de la heroa eskadro akiris grandajn venkojn unun post alia.

En septembro de 1966 la arda fajro de la granda proletara kultura revolucio brulis tra la tuta lando, kaj la situacio de la revolucio estis tre bona. La usona imperiismo, kiu ekstreme timas kaj malamas la kulturan revolucion, denove sendis rabistajn aviadilojn por invadi la teritorian aeron de nia lando. Decide plenumante la ordonon **"Nepre ekstermu la entrudiĝintan malamikon per tuta forto"** la batalantoj de tiu ĉi heroa eskadro flugigis kvar aviadilojn en la ĉielon. La malamikaj aviadiloj posedis altan rapidecon kaj estis armitaj per misiloj, sed la batalantoj de la heroa eskadro tute ne atentis pri tio, kaj ili havis nur la ideon: Persekutu kaj nepre regalu la malamikon per la fera pugno de la ĉina popolo, kiu hardis sin en la arda fajro de la granda proletara kultura revolucio. La malamikoj estis treege timigitaj, kaj iliaj aviadiloj perdis sian ekvilibron, jen leviĝis supren jen glitis malsupren,

provante sin savi el la sorto de ekstermiĝo. Kun granda fideleco kaj kuraĝo la batalantoj de la heroa eskadro firme persekutis la malamikojn malgraŭ iliaj ruzaĵoj. Kiam la distanco inter ni kaj la malamiko rapide malplilongiĝis, Liu Jenhiaŭ, kiu pilotis aviadilon n-ron 4, trovis en la pilotejo signalon pri malpliiĝo de benzino kaj nepra returneflugo. Sed tio, kion li pripensis, estis nur **"Nepre ekstermu la entrudiĝintan malamikon"** kaj li tute ne zorgis pri sia persona sekureco daŭrigante kune kun siaj batalamikoj la persekuton kontraŭ la malamikaj aviadiloj je la plej alta rapideco. Tre baldaŭ niaj aviadiloj proksimiĝis al la malamikaj aviadiloj, kaj tiuj aeraj rabistoj ricevis indan punon.

El la praktiko de la batalo la batalantoj de la heroa eskadro profunde komprenis, ke la potenco de teknikaj instalaĵoj estas limigita, sed la potenco de la penso de Maŭ Zedong estas senlima. Posedante la penson de Maŭ Zedong la revoluciaj batalantoj posedas la plej grandan kuraĝon. Posedante la penson de Maŭ Zedong ili povas plene disvolvi sian forton en la ĉielo kaj estas ĉiam nevenkeblaj.

III

Prezidanto Maŭ instruas al ni: **"Lernu militi en milito."** La kamaradoj de la heroa eskadro armitaj per la penso de Maŭ Zedong firmvole rompis eksterlandajn dogmojn kaj rigidajn regulojn kaj direktis la bataladon per la penso de Maŭ Zedong.

La kontraŭrevoluciaj reviziistoj Peng Dehuaj, Luo Ĵujking kaj ceteraj rigardis la "dekretojn" kaj "regulojn" de la armeo de la reviziisma Sovetunio kiel sanktan, nemalobeeblan "aŭtoritaton" kaj provis uzi ilin por ligi la manojn kaj piedojn de la aviadistoj. Ekzemple, kiam la aviadiloj batalas en grupo, nur la ĉefa aviadilo devas fari atakon dum la kolegaj aviadiloj protektas, tute egale ĉu la ĉefa aviadilo aŭ la kolega aviadilo la unua trovas la malamikan aviadilon. Tiu rigida regulo ofte preterlasas tre bonan okazon de atako. Obeante la instruon de Prezidanto Maŭ **"Uzi la armeon en fleksebla maniero estas la plej grava rimedo por ŝanĝi la situacion inter la malamiko kaj ni kaj preni sur ni la iniciativon"** la kamaradoj de la heroa eskadro rompis tiun eksterlandan regulon kaj kreive difinis la flekseblan taktikon, ke la ĉefaj aviadiloj kaj la kolegaj aviadiloj devas intense kunlabori, kaj iu ajn povas utiligi la plej oportunan okazon por fari atakon.

Foje kvar aviadiloj de la Ĉiangkajŝeka banditaro faritaj en Usono entrudiĝis en nian teritorian aeron, kaj kvar aviadiloj de la heroa eskadro flugis supren por batali. La grupo de kolegaj aviadiloj la unua trovis la malamikajn aviadilojn en loko pli proksima al ili. Kiam la ĉefa aviadisto kaj komandanto Ĝaŭ Dean ricevis la raporton de la grupo de kolegaj aviadiloj, li tuj ordonis: "Vi ataku kaj ni protektu!" En alia minuto la grupo de kolegaj aviadiloj ĵetiĝis kvazaŭ fulmo rekte kontraŭ la malamikaj aviadiloj. Antaŭ ol la malamikoj sciis, kio okazis, du el iliaj aviadiloj jam estis faligitaj. La du postrestantaj malamikaj aviadiloj provis fari ŝtelan atakon kontraŭ nia grupo de kolegaj aviadiloj, sed unu el ili estis tuj grave difektita sub la forta kanonado de nia grupo de ĉefaj aviadiloj. Pro tio la malamikaj aviadiloj ne sukcesis pafi eĉ unu obuson. Tio estis altgrade fleksebla batalo kondukita tute laŭ la penso de Prezidanto Maŭ pri milita afero, kaj ĝi plene disvolvis la potencon de la batala kolektivo.

Depost tio la aviadistoj de la heroa eskadro uzis ĉie la penson de Maŭ Zedong kiel armilon, pli kuraĝe rompis la fremdlandajn regulojn kaj dogmojn kaj atingis la alian novan kulminon neniam antaŭe atingitan.

Alifoje, dum la persekutado kontraŭ la malamikaj aviadiloj, la aviadistoj dediĉis sian tutan forton kaj atenton al la batalo, tial ili ne rimarkis, ke la benzino jam konsumiĝis ĝis tia grado, ke estis necese fari returneflugon. Sur sia vojo returnen la aviadilo de Hju Sian estis ankoraŭ kelkdek kilometrojn for de la aerodromo, sed la motoro estingiĝis kaj la registrilo pri la kvanto de benzino montris la nulon. Tiam la alteco de la flugado estis nur iom pli ol mil metroj. Laŭ la regulo de la sovetuniaj reviziistoj, supersona aviadilo, kiu estingiĝis en alteco de malpli ol dumil metroj, absolute ne povas sekure surteriĝi, kaj la avidadisto devas tuj forlasi la aviadilon kaj paraŝuti.

En tiu ekstreme danĝera momento Hju Sian havis en sia kapo nur unu penson: Mi nepre returnen flugigos la aviadilon, kiun Prezidanto Maŭ konfidis al mi. La grandaj, oraj vortoj **"Faru firman decidon, timu nenian oferon kaj superu ĉiujn malfacilaĵojn por akiri venkon"** brilis antaŭ liaj okuloj. Lia menso fariĝis eksterordinare klara, kaj lia agado treege ekzakta. Li lerte ŝalti, ekflamigis la lastan iometon da benzino restanta en la tenejo kaj funkciigis la motoron iom pli ol unu minuton. La aviadilo estis baldaŭ proksimiĝonta al la aerodromo, sed la

benzino jam tute konsumiĝis, kaj la aviadilo devis fari grandan turniĝon por alĝustigi sin rekte kontraŭ la kurejo. Estis treege malfacile fari sekuran alterigon. Hju Sian decide postulis, ke li faru devigan alterigon. Per mirinda kuraĝo kaj saĝo li trankvile manipulis la aviadilon, venkis multege da malfaciloj, fine sukcesigis la alterigon kaj tiel starigis brilan ekzemplon de sukcesa deviga alterigo de supersona aviadilo per glitado. Tio plej vive montris, ke nur la revolucia praktiko sub la gvido de la penso de Maŭ Zedong povas produkti la plej revolucian sciencon.


La senlima fideleco de la heroa eskadro al Prezidanto Maŭ kaj al la linio de Prezidanto Maŭ pri milita afero formiĝis kaj hardiĝis en PLA — granda lernejo de la penso de Maŭ Zedong.

Por kulturi sian fidelecon al Prezidanto Maŭ la kamaradoj de la heroa eskadro efektivigas ĉiun instrukcion de Prezidanto Maŭ kaj ĉiam agas laŭ ĝi. Kun firma decido ili plenumas la instrukcion de Prezidanto Maŭ, **"La Popola Liberiga Armeo devas esti granda lernejo."** Sur la aerodromo ĉe la fronto ili estis ĉiam pretaj flugi en la ĉielon por batali kontraŭ la malamiko, kaj samtempe ili okupis sin pri agrikultura produktado. En la komenco de vintro ili kolektis sterkon spite al malvarma vento, kaj en la somero ili sarkis sub la varmega suno. Tiuj ĉi aviadistoj diris, ke tio, kion ili sarkis, ne estas herbaĉo sed estas absurda teorio de la kontraŭrevoluciaj reviziistoj Peng Dehuaj kaj Luo Ĵujking pri la eksterordinara vivo de la aviadistoj, kiuj provis konduki la aviadistojn al la erara vojo disigi sin de fizika laboro kaj de la laboranta popolo. Kaj la aviadistoj diris, ke tio, kion ili protektis, ne estas la junaj vegetaĵoj sed estas la proletara linio de Prezidanto Maŭ pri la milita afero.

Ili ankaŭ iris al la popolaj komunumoj por partopreni la movadon de socialisma eduko en la kamparo. Tie ili manĝis, loĝis kaj laboris kune kun la malriĉkamparanoj kaj malsuperaj mezkamparanoj. La senlima fideleco de tiuj kamparanoj al Prezidanto Maŭ kaj ilia revolucia spirito en la transformado de la naturo donis al ĉiu aviadisto plej vivan politikan lecionon pri senlima fideleco al Prezidanto Maŭ.

Por kulturi sian fidelecon al Prezidanto Maŭ la aviadistoj firme sekvas la strategian aranĝon de Prezidanto Maŭ. Tuj kiam Prezidanto Maŭ donis la komandon **"La Popola Liberiga Armeo devas subteni la vastan maldekstran amason"**, ili iris rapide al la fronto de subteno al industrio, agrikulturo kaj la maldekstruloj kaj de milita kontrolo kaj milita-politika trejnado. Dong Hiaŭhaj kaj Hiaŭ Gonggia, aktivuloj en la studo de verkoj de Prezidanto Maŭ, subtenis la maldekstrulojn en la fabriko kaj propagandis tie la plej novajn instrukciojn de Prezidanto Maŭ per la plej granda fervoro. Tuj kiam Prezidanto Maŭ faris la alvokon pri la efektivigo de granda revolucia unuiĝo, ili venis profunden en la amason, pacience kaj zorgeme komprenigis al ili la gravan signifon de la alvoko, helpis ilin solvi demandojn kaj tiel faris tiun fabrikon unu el tiuj institucioj, kiuj la unuaj efektivigis la grandan revolucian unuiĝon en la loko. Ili rigardis la bonan studon kaj aplikon de la plej novaj instrukcioj de Prezidanto Maŭ kiel la ĉefan enhavon de ilia fideleco.

La aviadistoj de la heroa eskadro senĉese kulturas en la batalo por defendo de Prezidanto Maŭ sian senton de senlima fideleco al Prezidanto Maŭ. Dum la tagoj de defendo de la teritoria aero de la patrio ili aŭdis la tamburadon pri batalo por frakasi ĝisfunde la komandejon de la burĝaro, kaj ili tuj marŝis al la batalkampo de granda revolucia kritiko. Ili elmetis la sloganon, "Ni solide batu la usonajn lupojn en la aero, kaj forte vipu sur la tero la hundojn falintajn en akvo." Ju pli intensa la aerbatalo fariĝis, des pli aktive ili okupis sin pri la granda revolucia kritiko sur la tero. Ili publikigis murgazetojn de amasa kritiko, okazigis kunvenojn de granda kritiko kaj skribis artikolojn de granda kritiko, kaj tiel ilia batalo de kritikado fariĝis ĉiam pli kaj pli energia. Dong Hiaŭhaj ekstreme koleris, kiam li legis la absurdajn vortojn de la ĉina Ĥruŝĉov "Ekspluato havas meriton". La tragedia morto de la patro, la larmoj de la patrino kaj la cikatroj sur lia propra korpo rezulte de la mordo de la hundoj de japanaj rabistoj — la nacia malamo kaj la klasa malamo — ĉio ĉi tio torentis en lian koron kaj igis lin preni sian plumon por ĵeti sin en la intensan batalon. Nun, kiam lia batalo de kritikado eniris la duan jaron, li jam finskribis kritikajn notojn kun pli ol cent mil vortoj. Ĉiu el la aviadistoj de la heroa eskadro skribis meznombre pli ol dek kritikajn artikolojn dum la pasinta pli ol unu jaro. Tiuj kritikaj artikoloj kaj notoj estas akraj akuzoj kontraŭ la ĉina Ĥruŝĉov kaj entuziasmaj prikantoj pri la ĉiamvenka penso de Maŭ Zedong. Ĉiu frazo kaj ĉiu vorto en ili montras la senliman fidelecon de la revoluciaj batalantoj al la granda gvidanto Prezidanto Maŭ.



Majeste staras antaŭ la stacidomo de Ŝaŭŝan la statuo de nia granda gvidanto Prezidanto Maŭ en sia juneco.

La brila Ŝaŭŝan estas vera,
por la homar', fier' kaj gloro.
En tiu montvilaĝ' smeralde bela,
Naskiĝis Maŭ Zedong en frosta vintra horo.
Ho vi, revolucia Ŝaŭŝan en koloro de skarlato,
Akuŝis grandan instruanton de l' revolucio.
De nun, la tute nova homa historia rado
Antaŭen ruliĝados ĉiutage je mil lioj!

Ho Ŝaŭŝan, Ŝaŭŝan glora,
Vi estas ne nur la lulilo de la ruĝa koro,
Ne nur patrino multe suferinta de amaro,
Sed ankaŭ la lulilo de la centmiljona revolucia popolo.
Vi estas en la mondo kvazaŭ la printemp' plej bela
Kaj torĉo altiranta la rigardon de l' tutmonda proletaro,
Sonoras via nomo ĉie sur la globo tera.

Ho Maŭ Zedong! Ho Maŭ Zedong!
Vi kreis propramane l' gloran Kompartion de Ĉinio.
Per via saĝ' mirinda, senkompara
Vi levis la ondegojn de la mond-revolucio!
Kaj via penso kvazaŭ suna radiaro
Penetras en la koron de l' revoluciaj batalantoj, komunistoj, laboristoj, kamparanoj.

Ho Ŝaŭŝan, Maŭ Zedong!
Pekino, Maŭ Zedong!
Kie vi estas, tuj leviĝas tiesun' kun ruĝa aŭreolo,
Kaj vi lumigas per la ore ruĝa bril' la koron
De la tutmonda revolucia popolo!
Ho, kiel korekscita estas
La granda proletara kultura revolucio
Garantianta, ke eterne ruĝos la socialisma ŝtato de Ĉinio!
La ŝtorm' revolucia timtremigas koron de la malamikoj!
Kiel vespertoj ili fuĝas for de l' suno, en paniko.

Ho saĝa Prezidanto!
Sub via direktad', la ŝipo de l' revolucio monda
Ĉirkaŭveturas dekmil rifojn sin kaŝintajn sub ondaro,
Kaj tra la furioza kaj insida maro
Antaŭen ĝi impetas al la venk' estonta.

Ho, Maŭ Zedong! Ho Maŭ Zedong!
Plenkore vin prikantos mi ripete kaj ripete
Per vortoj plej plej belaj kun abunda senco!
Sed ne sufiĉas eĉ mil himnoj por komplete
Esprimi mian estimon al via granda penso!
"Ekbolas la kvar maroj, kaj koleras nuboj, ondoj,
Skuiĝas la terglobo kun intensaj ventoj, tondroj."
En proletara revolucia patoso komponiĝas mia kora kanto,
Por vin prikanti, kara Prezidanto!

Japanaj gejunuloj vizitas la domon en Ŝaŭŝan, Hunan, en kiu la granda gvidanto Prezidanto Maŭ iam loĝis.





La Monda Popolo Varme Amas Prezidanton Maŭ

La Vjetnama Popolo Amas Prezidanton Maŭ

LA heroà vjetnama popolo batalanta sur la kontraŭusona kaj nacisava fronto profunde konas la senkomparan potencon de la penso de Maŭ Zedong. Ili senlime amas verkojn de Prezidanto Maŭ kaj senlime adoras la penson de Maŭ Zedong.

LI PLEJ ŝATAS LEGI VERKOJN DE PREZIDANTO MAŬ

Vjetnamaj kamaradoj ofte diras, ke ili aparte ŝatas legi *Elektitajn Militajn Verkojn de Maŭ Zedong*. Iu oficiro de la Vjetnama Popola Armeo diris: "La plej granda helpo de la ĉina popolo al la nia estas la milita penso de Maŭ Zedong." Iu vjetnama avino premis la manon al iu ĉina kamarado kaj sincere petis: "Kara infano, mi ne scipovas legi, sed havigu al mi kelkajn militajn verkojn de Onklo Maŭ, por ke mia filo, kiu servas nun en la armeo, ilin legu. Li plej ŝatas legi librojn verkitajn de Onklo Maŭ." Montrante la brilan verkon *Pri Longdaŭra Milito* de Prezidanto Maŭ iu vjetnama instruisto diris: "Multaj vidpunktoj, kiujn ni tenas en nia popola milito, devenis de tiu libro, kiu estas eksterordinare konvena por ni."

LA PENSO DE MAŬ ZEDONG LUMIGAS NIAN KORON

Iu vjetnama batalamiko skribis al ĉina kamarado, ke multaj vjetnamaj junuloj nun studas verkojn de Prezidanto Maŭ per diversaj formoj, ekzemple, per aŭskultado de radiaj dissendoj, legado de ĵurnaloj, okazigo de diskutaj kunsidoj ktp. Li diris: "Ni absolute kredas la penson de Maŭ Zedong, kaj nur ĝi povas liberigi la tutmondan popolon."

La letero plue montris: "Kiel la suno en orienta, la penso de Maŭ Zedong lumigas nian koron, firmigas niajn revoluciajn penson kaj volon, kaj plifortigas nian decidemon en la batalo kontraŭ la usonaj imperiismaj agresantoj kaj modernaj reviziistoj. La tutmonda popolo jam konas la grandecon de la penso de Maŭ Zedong, kiu montras al ĝi la veron, ke oni devas nepre batali kontraŭ la komuna malamiko — la usona imperiismo."

PLEJ ALTA PREMIO

Iu vjetnama kamarado sentis grandan feliĉon kaj estis plena de emocio, kiam li ricevis la trezoran libreton *Vortoj de Prezidanto Maŭ Zedong*, kiun li nomis "plej alta premio".

Li skribis al la ĉina donacinto: "Delonge mi soife esperis posedi tiun ĉi libreton de Prezidanto Maŭ. Mi rigardas la penson de Maŭ Zedong kiel la plej akran kaj plej potencan armilon por venki niajn malamikojn — imperiismon kaj modernan reviziismon. Kiel brava soldato sur la batalfronto kontraŭ la usona imperiismo, mi bezonas pli bone posedi la penson de Maŭ Zedong ol iam ajn antaŭe."

MI ESTOS ĈIAM KUN ONKLO MAŬ!

Iu hanoja junulo petis pri armeaniĝo kaj estis akceptita. En la tago antaŭ sia foriro, li jam pre-



Vjetnamaj gejunuloj varme amas Prezidanton Maŭ.

paris sian valizon kaj enpakis ĉiujn necesaĵojn. Tamen mankis al li ankoraŭ unu valora objekto, tage kaj nokte sopirata, nome: ore brila insigno kun portreto de Prezidanto Maŭ. Kiel li sopiris havi ĝin sur la brusto por iri al fronto! Sed, de kie li povus ricevi ĝin? Tion pensante li suriris straton.

Kia hazardo! Sur la strato li renkontis ĉinan kamaradon, sur kies brusto ja ore brilis insigno kun portreto de Prezidanto Maŭ. Kun ĝojego, pro la neatendita feliĉo, li haste kuris al li kaj sincere diris: "Kara ĉina kamarado, morgaŭ mi forlasos Hanojon kaj iros al fronto. Ĉu vi bonvolus afable donaci al mi vian insignon? Kunportante ĝin mi estos pli kuraĝa por ekstermi la malamikojn." Emociite de la profunda amo, kiun tiu vjetnama junulo havis por Prezidanto Maŭ, la ĉina kamarado tuj demetis sian insignon kaj alpinglis ĝin sur lian bruston. Tiu ĉi junulo firme premis la manon al la ĉina kamarado kaj ripete diris: "Dankon, dankon! Mi ĉiam estos kun Onklo Maŭ! Mi ĉiam kunportos la insignon kaj ekstermos pli multe da krimaj usonaj banditoj."

DEZIRO DE IU VJETNAMA AMIKO

Iu vjetnama amiko nomata Tinh loĝas en Hanojo. Por aĉeti biciklon, li ŝparis certan sumon. De tiu tempo li ankaŭ komencis studi verkojn de Prezidanto Maŭ. Ju pli li studis, des pli li ŝatis ilin. Li trovis, ke ĉiu vorto de Prezidanto Maŭ estas vero, kaj ke liaj verkoj estas ne malhavebla trezoro por la revoluciaj popoloj.

Li do pensis, ke oni devas kiel eble plej multe eldoni verkojn de Prezidanto Maŭ, por ke ĉiam

pli multaj homoj posedu la penson de Maŭ Zedong. Aĉeti biciklon aŭ ne estas bagatela afero privata, sed eldoni verkojn de Prezidanto Maŭ estas grava afero por revolucio. Li do decidis provizore ne aĉeti biciklon kaj donaci la ŝparitajn 150 *dong*-ojn (vjetnama monunuo) al la ĉina eldona institucio kiel sian kontribuon por helpi la eldonadon de la verkoj de Prezidanto Maŭ.

Plena de revolucia pasio, li dufoje skribis al ĉinaj kamaradoj por esprimi sian deziron donaci la monon por subteni la eldonadon de pli da verkoj de Prezidanto Maŭ. Lia revolucia entuziasmo multe emociis la ĉinajn kamaradojn. La lastaj ripete esprimis sian elkoran dankon kaj diris al li: "Kun granda ĝojo ni transdonis vian bonvolemon al la koncerna institucio. Via bonvolemo mem estas tre valora subteno al la ĉina popolo en ties klopodo eldoni en senprecedence granda kvanto la verkojn de Prezidanto Maŭ. Sed, la monon vi prefere dediĉu al la granda kontraŭusona kaj nacisava afero de la vjetnama popolo. Ankaŭ tio estas efika subteno al la komuna revolucia batalo de la ĉina kaj vjetnama popoloj."

PREZIDANTO MAŬ, LA VJETNAMA POPOLO PLEJ SOPIRAS KAJ PLEJ AMAS VIN!

Iutage, kelkaj vjetnamaj amikoj venis al la ĉina ambasadorejo en Vjetnamio. Kun senlima respekto al Prezidanto Maŭ, ili alportis leteron kaj unu memkulturitan ananason, kies grandeco estas tre malofta. Ili petis la ĉinajn kamaradojn transsendi ilin al Pekino, al estimata Prezidanto Maŭ.

La vjetnamaj amikoj diris kun emocio al la ĉinaj kamaradoj: "Prezidanto Maŭ estas granda gvidanto ne nur de la ĉina popolo, sed ankaŭ de la tutmonda popolo. La vjetnama popolo tage kaj nokte sopiras al li. Tiu ĉi ananaso estas montriĝo de nia koro, koro de la vjetnama popolo."

En la letero la vjetnamaj amikoj skribis: "Prezidanto Maŭ, Vi granda instruanto de la ĉina popolo kaj la tutmonda popolo alportis feliĉon al la homaro. La tutmonda popolo nun studas vian brilan penson, agas laŭ viaj instrukcioj, kuraĝe antaŭenmarŝas laŭ la vojo montrita de Vi! Prezidanto Maŭ, ho Prezidanto Maŭ, la vjetnama popolo plej sopiras al Vi kaj plej amas Vin. Vi estas granda gvidanto de la tutmonda popolo!"

REVOLUCIAJ PROVERBOJ

Kolektivismo nutras la heroojn, kies koro ruĝas senkompare; en ĉio ili zorgas nur la kolektivon, krome, ĉiam plej lojale. Pro ĝi preferas ili morti tuj ajn-tempe ol vivadi egoisme eĉ centjare.

* * *

Tutkore sekvi Prezidanton Maŭ ja estas fideleco la plej altmezura; plenumi senrezerve liajn instrukciojn estas la kolektivism' plej pura.

* * *

La plej trezora el mil kaj mil altvaloraj estas senegoisma karaktero, de tiu venas la zorgemo al kolektivo, maltimo kaj la por Prezidanto Maŭ senfina fidelo.



Vjetnamaj agrikulturaj kooperativaninoj legas la trezoran ruĝan libreton Vortoj de Prezidanto Maŭ Zedong.

Vjetnamaj milicanoj dum batalpaŭzo



Naskiĝo de la Dekmil-tonela Oceana Varŝipo "Orienta Vento"

EN la eksterordinare bonega situacio, en kiu la granda proletara kultura revolucio venis al batalo por akiri kompletan triumfon, la unua dekmil-tonela oceana varŝipo "Orienta Vento", projektita kaj konstruita de ni mem en Ĉinio, jam estis ekzamenita kaj akceptita de la Ŝtata Ekspertiza Komitato post longa provado de veturado kaj transportado. Tio estas granda venko de la ĉiamvenka penso de Maŭ Zedong, granda venko de la proletara revolucia linio de Prezidanto Maŭ kaj granda venko de la strategia penso de Prezidanto Maŭ pri sinapogo sur propraj fortoj.

La sukcesa konstruado de "Orienta Vento" starigis mejloŝtonon en la historio de disvolviĝo de la ĉina ŝipkonstrua industrio kaj estas grava signo pri la antaŭensaltego de tiu nia industrio. Se ni malfermos la historion pri ŝipkonstruado en la mondo, ni konstatos, ke la projektado kaj konstruado de ŝipoj en alilandoj ĝenerale disvolviĝis ŝtupon post ŝtupo — de malhavo ĝis havo, de malgrandeco ĝis grandeco kaj de malaltnivelo ĝis altnivelo, kaj ĉiu ŝtupo bezonis almenaŭ kelkajn jarojn. La konstruado de "Orienta Vento" en nia lando estas saltego de malgrandtipa kaj mez-grandtipa varŝipo al dekmil-tonela oceana varŝipo kaj saltego de dizelo kun 2000 ĉevalpovoj al tiu kun pli ol 8000 ĉevalpovoj. En la mallonga periodo de kelkaj jaroj ni finiris la vojon, kiun la eksterlandanoj bezonas kelkdek jarojn por finiri. Tia rapideco de disvolviĝo estas senprecedenca en la historio.

Prezidanto Maŭ instruas al ni: **"La kreskado de iu ajn nova afero ĉiam trairas malfacilojn kaj zigzagojn."** La tuta procedo de projektado kaj konstruado de la varŝipo "Orienta Vento" koncentre spegulas la ekstreme akran kaj komplikan batalon inter la du linioj en la ŝipkonstrua industrio. En 1958 nia granda gvidanto Prezidanto Maŭ elmetis la Ĝeneralan Linion streĉi plene la energion kaj strebi forte antaŭen por multe, rapide, bone kaj ekonomie konstrui socialismon. Sub la brila lumo de la granda penso de Maŭ Zedong kaj sub la direkto de la proletara revolucia linio de Prezidanto Maŭ la vasta amaso de laboristoj kaj oficistoj en la ŝipkonstrua industrio decidis apogi sin sur propraj fortoj, penlabori por potenca prosperiĝo kaj konstrui la unuan dekmiltonelan oceanan varŝipon per siaj propraj manoj por disvolvi sian oceanan varŝiparon. Sed dum longa tempo plenmano da plej grandaj enpartiaj potenctenantoj irantaj la kapitalisman vojon plenforte bojkotis la proletaran revolucian linion de Prezidanto Maŭ, praktikis centprocente naciperfidisman linion kaj metis sian esperon sur aĉetado aŭ lupreno de ŝipoj, importo de instalaĵoj kaj aĉetado de patentoj el fremdlandoj. Senprudente ili provis malhelpi la disvolviĝon de la ŝipkonstrua industrio kaj la koncerna tekniko de nia lando.


Sub la brila lumo de la penso de Maŭ Zedong la vasta amaso de laboristoj kaj oficistoj de Giangnan-a Ŝipkonstruejo kaj Hudong-a Ŝipkonstruejo en Ŝanhajo kaj fakoj koncernaj pri ŝipprojektado decidis mem fari esplorajn laborojn kaj mem projekti kaj konstrui dekmiltonelan oceanan ŝipon. La ŝlosila punkto de tia varŝipo estas ĝia ĉefa motoro (grandtipa dizelo kun 8820 ĉevalpovoj). Plenmano da enpartiaj potenctenantoj irantaj la kapitalisman vojon fervore pledis por importo de tia dizelo aŭ aĉetado de ĝia patento el eksterlando. Tion firme bojkotis la revoluciaj laboristoj kaj oficistoj de la ŝipkonstrua industrio. Sen necesaj materialo kaj sperto, sed firme unuiĝinte kaj kreive studante kaj aplikante la verkojn de Prezidanto Maŭ, la ŝipkonstruaj laboristoj kaj teknikistoj decideme sekvis la instruon de Prezidanto Maŭ pri sinapogo sur propraj fortoj en la disvolvado de industria konstruado kaj plenumis en tre mallonga tempo la taskon de projektado kaj provfabrikado de la ĉefa motoro. Sed, tiu plenmano da enpartiaj potenctenantoj irantaj la kapitalisman vojon kaj kelkaj burĝaraj teknikaj "aŭtoritatuloj" ne kredis la saĝecon de la amaso, utiligis sian povon, kaj trude ordonis flankenlason de la jam prilaborita dizela krankŝafto — ŝlosila maŝinparto.

Pro tio kaj ankaŭ aliaj kaŭzoj la konstruado de "Orienta Vento" devigite ĉesiĝis dum kelkaj jaroj. En 1965, sekvante la instruon de Prezidanto Maŭ **"nepre ne forgesi la klasbatalon"**, la revoluciaj laboristoj kaj oficistoj de Giangnan-a Ŝipkonstruejo, Hudong-a Ŝipkonstruejo kaj la institucioj pri ŝipprojektado kaj navigacio leviĝis por defendi la fruktojn de la antaŭensaltego kaj rekomencis la konstrulaboron pri la varŝipo. Kun profunda klasa sento de senlima amo al Prezidanto Maŭ kaj plej alta laborentuziasmo, tiuj revoluciaj oficistoj kaj laboristoj plenumis la tutan taskon en eksterordinara rapideco.

La totala longeco de la varŝipo "Orienta Vento" estas 161.4 metroj, la akvodismeto estas pli ol 18,800 toneloj, la ŝarĝa kapacito estas pli ol 11,700 toneloj kaj la pohora rapideco estas 17 maraj mejloj. Ĝi povas navigadi en la maro por 40 sinsekvaj tagnoktoj kaj rekte atingi Eŭropon, Afrikon aŭ Amerikon sen ankrado ĉe iu ajn haveno. La ĉefa motoro de "Orienta Vento" estas la unua malaltrapideca superŝarĝa dizelo de peza konstruturo kun 8,820 ĉevalpovoj projektita kaj fabrikita de nia lando mem. Tiu motoro estas 3-4 etaĝojn alta kaj ĉirkaŭ 400 tunojn peza. Ĝi estas formita el pli ol 50,000 maŝinpartoj kaj estas treege komplika produkto kun alta precizeco. Sur la ŝipo estas proksimume 300 elektromeĥanikaj instalaĵoj, kaj la elektra energio produktata sur tiu ĉi varŝipo sufiĉas por la lumigado de malgranda urbo kun cent kelkdek mil loĝantoj. Ĉiuj tiuj instalaĵoj kaj materialoj venis el ĉirkaŭ 300 fabrikoj en 18 provincoj kaj urboj tra la tuta lando, i. a. nemalmultaj estas novaj produktoj provfabrikitaj speciale por "Orienta Vento" kaj teknike altkvalitaj.

Dum sia provnavigado, longtempa veturado kaj funkciado, "Orienta Vento" eltenis la provadon de altaj ondegoj, dekgrada ventego kaj severega frosto, navigis pli ol 30,000 marajn mejlojn kaj transportis totale preskaŭ 300,000 tunojn da varoj. Tiu ĉi varŝipo estas de bona kvalito kaj ĝia teknika kvalito atingis la avangardan nivelon de samspecaj eksterlandaj ŝipoj.

La oceana ŝipo "Orienta Vento"



Grandampleksa Scienca Esplorado de Ĉinaj Sciencaj Laborantoj pri Ĝolmo-lungma-regiono

Laŭ la instruo de la granda gvidanto Prezidanto Maŭ **"Vi devas zorgi pri la ŝtataj aferoj kaj konduki la grandan proletaran kulturan revolucion ĝis la fino"**, la anoj de la scienca esplora brigado ĉiutage ricevas disaŭdigon de Radio Pekino dum sia eksterdoma esplorado.





Sciencaj esplorantoj faras nivel-mezuradon sur Ĝolmo-lungma.







La Meza Rongbuk-glacirivero en Ĝolmo-lungma-regiono

Meteorologiaj laborantoj ellasas balonon por malkaŝi la sekretojn en la atmosfero alte super Ĝolmo-lungma-regiono.


Grundaj fotografistoj streĉe laboras ĉe loko 3,900 metrojn super la marnivelo en la Meza Rongbuk-glacirivero.






Sciencaj laborantoj faras gravit-mezuradon ĉe loko 5,300 metrojn super la marnivelo.






Glacia pagodaro en la Meza Rongbuk-glaciirivero, je 6,000 metroj super la marnivelo





Laborantoj por surgrunda stereoskopa fotado en agado ĉe la Orienta Rongbuk-glacirivero



Sciencaj laborantoj esploras perpendiklan trančajon de sedimento de la kvara periodo sur la ŝtuparterena bordo de Bongu-lago sur la norda deklivo de la monto Šiša Pangma.

Novaj Moroj en Minhang

SUDOKCIDENTE de Ŝanhajo sin trovas vaste konata industria urbeto Minhang, kie loĝas pli ol dekmil familioj. Depost kiam oni komencis funkciigi kursojn de la penso de Maŭ Zedong en 1967, tute novan spiritan fizionomion havas la loĝantaro. Ĉie disradias la brila penso de Maŭ Zedong kaj odoras revolucia etoso, tiel en la nova kvartalo kiel en la malnova.

ĈIUJ KOROJ AL LA RUĜA SUNO

La ruĝa sundisko leviĝas el la oriento.

Komenciĝas la tago! Kiom da familioj laŭte kantas *Ruĝas la Oriento* kaj deziras al nia kara Prezidanto Maŭ longan vivon, longan longan vivon, tuj vekiĝinte el sia dormo!

Irinte en la domon de Ĝu Hiaŭlan en Dongfengloĝkvartalo N-ro 1, ni tuj rimarkas, ke ĉiuj muroj estas plenaj de portretoj kaj fotoj de Prezidanto Maŭ.

La patrino de Hiaŭlan, kiu multege suferis de ekspluatado kaj subpremado en la malnova socio, diris al ni: "'La tero kaj ĉiel' grandas ne tiom kiom la favoro de l' Partio, la patro kaj patrin' karas ne tiom kiom Prezidanto Maŭ' ja eldiras tion, kio estas en la koro de ni laborantaj popolanoj. Sed por restaŭri kapitalismon en Ĉinio, la ĉina Ĥruŝĉov freneze oponis kontraŭ Prezidanto Maŭ, dirante en deliro, ke 'oponi kontraŭ Prezidanto Maŭ signifas nur oponi individuon'. Kreviĝis miaj pulmoj de indigno!" Kaj ŝi aldonis: "Mi scias nur, ke Prezidanto Maŭ estas la plej plej ruĝa suno en la koro de ni laborantaj popolanoj. Mi luktos ĝis morto kontraŭ ĉiu ajn kiu aŭdacas oponi kontraŭ Prezidanto Maŭ! Mi pendigis portretojn de Prezidanto Maŭ sur ĉiuj muroj en mia domo, tiel ke ni povas ekvidi la ruĝan sunon je kaplevo. Mi ĉiam studos verkojn de Prezidanto Maŭ, aŭskultos liajn vortojn kaj agos laŭ liaj instrukcioj."

La loĝantaro de Minhang rigardas studon de verkoj de Prezidanto Maŭ kiel la plej gravan aferon en la vivo. Ĉu la dekkelkjaraj ruĝaj soldatetoj aŭ la grizharaj avinoj, ĉu la laborantoj en institucioj kaj entreprenoj aŭ dommastrinoj, emeritaj laboristoj kaj eĉ blindaj geavoj, ĉiuj studas kun arda entuziasmo la "tri popularajn artikolojn", kaj la ĉiamvenka penso de Maŭ Zedong enprofundiĝis en iliajn korojn multe pli ol iam ajn antaŭe!

Troviĝas inter ili 81-jara avino, kiu ankaŭ vizitas kurson de la penso de Maŭ Zedong kaj persistas ĉe studo de la "tri popularaj artikoloj" en ĉiu tago. Lerninte la artikolon *Servu al la Popolo*, ŝi meminiciate zorgas pri la puriga laboro de la ĉirkaŭejo. Konsiderante, ke la tasko estas tro peza por aĝulino kia ŝi, najbaroj persvadis ŝin bone ripozi, sed la avino respondis: "Por servi al la popolo, ne gravas la aĝo!"

Emerita laboristo Jang Bingĉen elmetis al si la postulojn ĉiam kunporti la "tri popularajn artikolojn", ilin legi ĉiutage, bone memori, povi flue reciti kaj kreive apliki. Li spitis al sia malalta klereco kaj nebona memoro kaj ne ŝanceliĝis pro sia malforta sano, kaj finfine li sukcesis bone parkeri la "tri popularajn artikolojn".

Tra rememoro pri la amaraj tagoj en la malnova socio kaj penso pri la hodiaŭa dolĉa vivo, multaj el la kursanoj profunde komprenas, ke marnavigo dependas de stiristo kaj revoluciado dependas de la penso de Maŭ Zedong. Dirite en iliaj propraj vortoj: "Prezidanto Maŭ estas nia savanto, kaj la penso de Maŭ Zedong estas la vivradiko de ni malriĉuloj." "Irante en nokto oni bezonas lampon, kaj la penso de Maŭ Zedong ja estas nia vojmontranta lampo!" kaj "La penso de Maŭ Zedong estas netaksebla trezoro, studi mastre la verkojn de Prezidanto Maŭ estas plej grava afero; armite de la penso de Maŭ Zedong, la ĉina popolo povos faligi ĉiajn diablojn kaj demonojn!"

ZORGADO PRI LA ŜTATAJ AFEROJ

Mastrate de la vastaj amasoj, la penso de Maŭ Zedong povas fariĝi neelĉerpebla forto.

Studinte la "tri popularajn artikolojn", la vastaj amasoj de la loĝantoj de Minhang lanĉis revolucion profunde en sia animo kaj ilia spirita fizionomio ricevis profundan ŝanĝon.

Multaj dommastrinoj, kiuj zorgis en la pasinteco nur pri manĝaĵoj, kuireja forno, belaj vestoj kaj dolĉaj infanetoj, nun turnas sian zorgon al la ŝtataj kaj mondaj aferoj.

Multaj familioj, kiuj kutimis babili pri manĝaĵoj kaj vestaĵoj, nun kunsidas por batali kontraŭ egoismo kaj kritiki reviziismon kaj diskuti pri ŝtataj aferoj, transformante sian domon en batalejon por ekstermi la burĝaran ideologion kaj starigi la proletaran ideologion.

Estas iu avino, kiu ne tiom volis partopreni tian kurson en la pasinto sub preteksto, ke ŝi scias tro malmulte da ideografiaĵoj, estas maljuna kaj ne tre sana. Lastatempe ŝi aliĝis al kurso kaj diris post lerno de la novaj instrukcioj de Prezidanto Maŭ: "Mi komprenas nur nun, ke mi estis tro ignorema pri la ŝtataj aferoj. En la pasinteco mi ĉiam pensis: Kian egoismon povas havi maljunulino kia mi, kiu okupiĝas nur pri dommastru-

mado? Nun mi vidas, ke zorgadi nur pri la familia rondeto sed neniom pri la ŝtataj aferoj ja estas la plej serioza egoismo. Se oni estus ignoremaj pri la ŝtataj aferoj kiel mi, oni ne povus rimarki eĉ la kolorŝanĝon de la ŝtato." Nun la avino ne nur lernas en la kurso, sed ankaŭ partoprenis propagandan taĉmenton pri la penso de Maŭ Zedong, kaj kantas kaj dancas. Ŝi diris: "Mi sentas gloron en la propagando de la penso de Maŭ Zedong!"

Kaj estas iu emerita laboristo kiu antaŭe pensis: Cigaredo, vino, teo, ĵurnalo plus korpekzercado — jen la "feliĉa" vivo por la maljunaj laboristoj. Lerninte la vortojn de Prezidanto Maŭ: **"Vi devas zorgi pri la ŝtataj aferoj kaj konduki la grandan proletaran kulturan revolucion ĝis la fino!"** li kritikis tiun penson sian. Poste, rigardante sin kiel la mastron de sia strato, li aktive laboras por bone funkciigi kurson de la penso de Maŭ Zedong.

Aŭdinte en la kurso, ke **"la elementaj, mezgradaj kaj altaj lernejoj ĉiuj devas konduki la revolucion kun rekomencita instruado"** grizhara avino Kin Suĝen pensis en si: Kial la nepo lernanta en la duonlabora kaj duonstuda lernejo restadas hejme dum la lasta tempo? Vespere, ŝi admonis lin aŭskulti la vortojn de Prezidanto Maŭ, viziti la lernejon laŭ la difinita horaro, dirante, ke nur tiel li povos esti vere bona infano de Prezidanto Maŭ. Dank' al klerigado de la avino, la knabo konis sian eraron kaj baldaŭ rekomencis vizitadi la lernejon por daŭrigi sian lernadon kaj la revoluciadon.

NENIAM FORGESI LA PROLETARAN DIKTATURON

"La plej fundamenta afero en zorgo pri la ŝtataj aferoj estas firme teni klasan batalon kaj firme teni la proletaran diktaturon." Jen estas la konkludo eltirita de la vastaj revoluciaj amasoj kaj revoluciaj kadroj de la loĝkvartaloj de Minhang en la luktado inter la du klasoj, du vojoj kaj du linioj kaj en la hardado de samtempaj lernado, kritikado kaj batalado.

Ĵetu rigardon al la grandaj kaj malgrandaj kunvenoj de loĝantoj de Minhang por batali kontraŭ la bienuloj, riĉkamparanoj, kontraŭrevoluciuloj, malbonaj elementoj, kanajloj kaj apaĉoj, kaj vi vidos la lastajn en forta konfuzo kaj la gigantan potencon de la amasa diktaturo en plena manifestiĝo. Tio, ke pecoj post pecoj da dazibaŭoj kritikis, ĝis plena senkrediteco, la teorion pri "estingiĝo de la klasbatalo" plenenergie distrumpetitan de la ĉina Ĥruŝĉov, bone montras, ke multe altiĝis la klasa konscio de la vastaj revoluciaj amasoj.

Antaŭe, iu avino pensis, ke la bienula elemento loĝata ĉe la strato baldaŭ jam mortos kaj ne plu povas fari malbonon. Kaj ŝi estis forte konsternita, kiam junaj ruĝgvardianoj eltrovis en konfiskado al la domo de la bienula elemento grandan kvanton da krimaj atestaĵoj post disvolviĝo de la ŝtorma granda proletara kultura revolucio. Lerninte la instruon de Prezidanto Maŭ, ke **"la malamiko ne pereos per si mem"** ŝi diris kun profunda kompreno: "Montriĝis, ke la bienuloj, riĉkamparanoj, kontraŭrevoluciuloj kaj malbonaj elementoj tamen ne forlasis sian krimagan inklinon, same kiel elterigitaj bulboj kun kerno vivanta, kvankam sekiĝis la radikoj kaj putriĝis la folioj. Gravurante en la koro la instruon de Prezidanto Maŭ nepre ne forgesi klasbatalon, ni devas plifortigi la proletaran diktaturon kaj transformi la loĝkvartalon en solidan parton de la ŝtale firma ŝtato de la proletaro!"

Kun multe pliakriĝinta klasbatala vidpunkto post lernado la vastaj amasoj tuj plifortigis la diktaturon super malamikoj. La kvina grupo de loĝantoj ĉe la Norda Strato mobilizis la amasojn por fari kontrolon super la agadoj de iu bienula elemento. Familiano de iu oficisto rimarkis, ke ŝi ofte ŝtele faris kontraŭrevolucian interkontakton kun alia bienula elemento sub la nomo de ĵurnallego. Post enketo kaj interkonsiliĝo la kontrola grupo faris traserĉon al la domo de la bienulino kaj trovis en ĝi kuomintangan "ŝtatan emblemon", ponardon, spadon kaj aliajn atestaĵojn de reakcia krimo. Ĝi tuj vokis la amasojn por batali kontraŭ la ulino kaj donis fortan baton al ŝia reackia aroganteco. La amasa diktaturo strikte limigis la aktivadon de la malamikoj, multe plifortigis la proletaran diktaturon kaj solidigis la revolucian novan ordon. Lastatempe en kunagado kun la socisekureca aparato ili praktikis diktaturon super la kanajloj kaj apaĉoj. La strataj komitatoj de Pugiang, Norda Strato kaj Dongfeng-loĝkvartalo N-ro 2 kunvokis plurajn mitingojn por malkaŝi kaj kontraŭbatali tiajn sociajn feĉojn, kaj donis per tio vivecan lecionon pri klasa batalo al la gejunuloj kaj geknaboj.

SERVI AL LA POPOLO DUM LA TUTA VIVO

En la ŝtormo kaj ondegoj de la granda proletara kultura revolucio multaj revoluciaj kadroj de strataj komitatoj ricevis severan provadon, tiel ke ili fariĝis pli kuraĝaj, pli firmaj kaj pli vivplenaj. Kun nova spirito ili aperis sur la batalaj postenoj.

En la komenco de 1967, la plenmano da enpartiaj potenctenantoj irantaj la kapitalisman vojon levis herezan venton de batalado kontraŭ la kadroj de strataj komitatoj por transigi la ĝeneralan direkton de batalo. Kamaradino Huang Jagjuan, kiu laboradis 18 jarojn kiel kadro en strata komitato, ricevis fortegan puŝon en la movado. Tiam ŝi pensis: Mi komencis labori kiel stratkomitata laboranto ekde mia 16-jara aĝo. Se mi estus partopreninta alian laboron, mi povus nun ricevi salajron de almenaŭ 50-60 juanoj servinte jam pli ol dek jarojn. Ju pli longe ŝi tiel pensis, des pli forte ŝi ĉagreniĝis kaj brulis de la deziro tuj foriri. Sed ŝi pensis poste, ke ŝi ne povas tion fari dum la movado, do ŝi decidis vizaĝi ĉion spiteme kaj forlasi la lokon je la fina periodo de la movado.

En la kurso de la penso de Maŭ Zedong Huang Jagjuan studis la brilajn "tri popularajn artikolojn" de Pre-

zidanto Maŭ kune kun la amaso. Komparante sin kun kamarado Ĝang Side, ŝi sentis brulan honton kaj trovis, ke estas grandega distanco inter ŝi kaj kamarado Ĝang Side. "Por la bezono de la revolucio kamarado Ĝang Side oferis sian vivon, dum mi jam intencis forlasi laboron kaj forfuĝi post ricevo de nura puŝo en la movado. Troviĝas do ĉe mi kiom da spirito 'ekskluzive' kaj 'senrezerve' servi al la popolo?!"

Tiam Huang Jagjuan ekmemoris la frenezan kriaĉon de reakciulo en la strato: "Tiuj homoj (t. e. la stratkomitataj kadroj) nun devas cedi siajn lokojn!"

Huang Jagjuan pensis, ke la loĝkvartalo estas ne nur tereno de vivo kaj postfronto de produktado, sed ankaŭ batalkampo por ekstermi la burĝaran ideologion kaj starigi la proletaran ideologion. Ĉu oni povus forlasi la postenon de la strata komitato kaj lasi tiun laboron al la reakciuloj?! Ŝi relernis la instruon de Prezidanto Maŭ: **"Ni devas subteni ĉion, kion la malamiko oponas, kaj oponi ĉion, kion la malamiko subtenas."** Ŝi pensis: "Se la reakciuloj deziras, ke mi eksiĝu, do mi nepre tenu la oficon! Mi devas aŭskulti la vortojn de Prezidanto Maŭ kaj servi al la popolo dum la tuta vivo."

La nodo en la penso de Huang Jagjuan malligiĝis kaj sereniĝis ŝia koro. Denove ŝi ekkondukis la stratajn laborojn kun kuraĝo. Por bone konduki la revolucian amasan kritikadon, ŝi studis diligente la "tri popularajn artikolojn" kaj la unua kunvokis familian kunvenon por batali kontraŭ egoismo kaj kritiki reviziismon kaj poste disvastigis sian sperton post resumado. Krome ŝi ankaŭ organizis la gejunulojn kaj geknabojn studi verkojn de Prezidanto Maŭ, instigante ilin rekomenci sian vizitadon al lernejo kaj daŭrigi la revolucion.

Kiam oni demandas hodiaŭ al Huang Jagjuan, ĉu ŝi ankoraŭ volas foriri, ŝi respondas sonore: "Mi ne foriros, eĉ se oni klopodos min forpeli."



KURANTAJ AFEROJ

EKSTERORDINARE GRANDA LAGRO FABRIKITA EN LUOJANG

La revoluciaj laboristoj kaj oficistoj de la Luojang-a Lagrofabriko sukcesis fabriki la plej grandan lagron de nia lando kun diametro de 4.1 metroj kaj pezo de ok tunoj. La revoluciaj laboristoj kaj oficistoj de la tuta fabriko varme jubilas pro tiu ĉi brila sukceso de la granda proletara kultura revolucio, de la penso de Maŭ Zedong.

Kun la rapida disvolviĝo de la socialisma konstruado de nia lando, supergrandaj lagroj estas ĉiam pli urĝe bezonataj en multaj gravaj fakoj. Kun senlima klasamo al la granda gvidanto Prezidanto Maŭ, la revoluciaj laboristoj kaj teknikistoj de la fabriko brave starigis por si altan celon, flanken puŝis la burĝajn "aŭtoritatulojn" kaj "specialistojn" kaj plenumis la taskon de provfarado de la supergranda lagro je plej granda rapideco, plej bona kvalito kaj plej malalta produktokosto.


GRANDTIPA ROTACIA FORNEGO DE CEMENTO FABRIKITA EN LANĜOŬ

Estas sukcese konstruita la plej granda rotacia fornego de cemento en nia lando. Ĝi estas projektita de ĉinaj teknikistoj kaj havas jaran kapaciton de 300,000 tunoj. Prova funkciado de la ekipaĵo montras, ke ĝi estas bonkvalita kaj la mekanismo bone plenumas sian laboron. Ĝia sukcesa elfabriko montras, ke la tekniko de nia lando en fabrikado de ekipaĵoj por cementprodukto leviĝis ĝis nova nivelo.

La grandtipa rotacia fornego estas fabrikita de la Lanĝoŭa Fabriko de Petrolkemiaj Maŝinoj. Ĝi estas grava atingo de la revoluciaj teknikistoj kaj laboristoj de la fabriko en firma plenumado de la politiko **"teni la revolucion kaj stimuli la produkton"**, kiun elmetis Prezidanto Maŭ. La meznombra aĝo de la teknikistoj, kiuj prenis sur sin la taskon de projektado de la ekipaĵo, estas nur dudek kelkaj jaroj, kaj la plejparto de ili unuafoje partoprenis en laboro de projektado de cementa fornego.

HU VANĈUN (laborista verkisto)

Sonorilaj Sonoj ĉe Huangpu-rivero



LA fremdlandaj amikoj, kiuj vizitis Ŝanhajon, eble scias, ke sur la bordo de Huangpu-rivero troviĝas doganeja horloĝturo. En la senprecedenca, granda proletara kultura revolucio, grandega ŝanĝiĝo okazis ne nur al la tuta Ŝanhajo sed ankaŭ al la sonorilaj sonoj de la doganejo, al la diablaj sonoj el la tempo de kolonia regado de la imperiistoj. Nun la sonoriloj de la horloĝturo sonas anstataŭe laŭ la emocia melodio de *Ruĝas la Oriento*:

> "*Ruĝas la oriento,*
> *Leviĝas nun la suno,*
> *Aperas en Ĉini' Maŭ Zedong*
> ...."

Majeste sonoras la sonoriloj ĉe Huangpu-rivero. La sonorado vekas la revolucian pasion de la ŝanhaja popolo kaj ilian senliman amon al la granda gvidanto Prezidanto Maŭ. Kune kun la ondado de la sonoro, la koro de la dekmiliona ŝanhaja popolo flugas pli kaj pli foren al Pekino, la centro de la monda revolucio, al nia granda gvidanto Prezidanto Maŭ.

Tiu majesta sonorado vekas ankaŭ rememoron de la ŝanhaja popolo pri la pasinteco.

De kiam la registaro de King-dinastio forvendis, la 29-an de junio 1854, nian doganan suverenecon al la britaj, usonaj, francaj kaj aliaj imperiistoj, la doganejo fariĝis instrumento de la imperiistoj por rabi riĉfontojn de nia lando kaj suĉi la sangon de la ĉina popolo. Kiam la doganeja domego estis konstruita en Ŝanhajo, 1927, ĝia horloĝturo ekaŭdigis la diablajn sonojn de imperiismo. Ĉiam la patriota ŝanhaja popolo aŭdis la diablajn sonoradojn de imperiismo, ili sentis en si indignon kaj malhonoron. Sed la lakeo de imperiismo Ĉiang Kajŝek neniam zorgis pri la ŝtata suvereneco kaj nacia digno. Dum sia regado super la kontinento en pli ol dudek jaroj, Ĉiang Kajŝek, lakeo nutrata de imperiismo, faris nekalkuleblajn malbonajn aferojn. Li lasis la usonajn, britajn, francajn, japanajn kaj aliajn imperiistojn tirani en Ĉinio, tiel ke ili faris Ŝanhajon "edeno de aventuristoj".

En la senprecedenca, granda proletara kultura revolucio de nia lando, la sonoj de la doganejaj sonoriloj komplete ŝanĝiĝis. Sub la apogo de nia granda gvidanto Prezidanto Maŭ, vigle disvolviĝis en Ŝanhajo la movado de ruĝaj gvardianoj en aŭgusto 1966. Levante la "magian bastonegon" de la penso de Maŭ Zedong, la vastaj amasoj de revoluciaj ruĝaj gvardianoj lanĉis ĝeneralan ofensivon kontraŭ la ideoj de la burĝaro kaj ĉiuj ekspluataj klasoj. La impeta frapado de revoluciaj ondegoj atingis ĉiujn angulojn de Ŝanhajo, inkluzive de la doganejo. Aroj kaj aroj da revoluciaj ruĝaj gvardianoj gluis dazibaŭojn sur la murojn ambaŭflanke de ĝia pordo. Sur la dazibaŭoj estis skribite:

> Ni proponas, ke la doganejaj sonorilegoj sonu laŭ la melodio de la kanto *Ruĝas la Oriento* por ke la kanto pri Prezidanto Maŭ, la granda gvidanto de la tutmondaj popoloj, ŝvebu ĉiam super la patrolando.

La dazibaŭoj eldiris la koran deziron de la dekmiliona revolucia popolo de Ŝanhajo, kiu delonge jam abomenis la diablajn sonojn de imperiismo. Kiam la ruĝaj gvardianoj leviĝis por forigi tiun feĉon en la favora orienta vento de la proletara kultura revolucio, ili tuj gajnis subtenon de la revoluciaj oficistoj kaj laboristoj de la doganejo kaj revoluciaj popolanoj de la tuta urbo. La revoluciaj oficistoj kaj laboristoj de la Ŝanhaja Horloĝa Fabriko "Ruĝas la Oriento", la Ŝanhaja Muzikila Fabriko kaj du radioaparataj fabrikoj kaj ruĝaj gvardianoj de la Ŝanhaja Muzika Instituto meminiciate prenis sur sin la gloran taskon aranĝi la sonorilojn de la doganejo, kaj post tri-tagnokta penado la tasko estis sukcese plenumita.

Venis la granda jaro 1968. Ĉiufoje, kiam la ŝanhaja popolo aŭdas la novan melodion sonigatan de la sonoriloj, ili tre nature ekpensas pri la granda ŝanĝiĝo de Ŝanhajo, okazinta antaŭ pli ol unu jaro kaj brila venko de la proletara kultura revolucio. En sonorado de la nova melodio, leviĝis en Ŝanhajo la mondskua ruĝa ŝtormo de la "Januara Revolucio". La proletaraj revoluciuloj reprenis el la manoj de la plenmano da enpartiaj potenctenantoj irantaj la kapitalisman vojon la potencon en la aferoj de la Partio, administro, financo kaj kulturo kaj fondis la Ŝanhajan Revolucian Komitaton. En sonorado de la nova melodio leviĝis en Ŝanhajo alta tajdo de revolucia amasa kritiko, kaj la ĉina Ĥruŝĉov kaj liaj agentoj en Ŝanhajo komplete kolapsis sub la kritikado kaj kondamnado fare de la revoluciaj amasoj. Ĉe la alveno de la jaro 1968, la ŝanhaja popolo ĉiam sopiras pri Tajvan, la ankoraŭ neliberigita sankta teritorio de la patrolando kaj tieaj multe suferantaj samlandanoj.

En Tajvan, nia sankta teritorio sub la okupado de la usona imperiismo, tagnokte estas aŭdeblaj diversaj diablaj sonoj: zumado de la usonaj pirataj aviadiloj, impertinentaj krioj de la bestecaj usonaj soldatoj, kiuj tiranas sur la stratoj, kaj usonaj flavaj muzikaĵoj malnoblaj kaj erotikaj... Ĉio ĉi tio alportas al niaj samlandanoj en Tajvan senfinan suferon kaj humiligon. Ili abomenas tiujn diablajn sonojn de la usonaj imperiismaj agresantoj, turnas sian rigardon al nordo kaj tagnokte atendas, ke la plej plej majesta melodio de la mondo — *Ruĝas la Oriento* — sonos super Tajvan kiel eble plej frue kaj por ĉiam.

Jen denove sonoras la sonoriloj de la doganejo:

"Ruĝas la oriento,
Leviĝas nun la suno,
Aperas en Ĉini' Maŭ Zedong;
...."

La majesta sonorado vibras ĉe Huangpu-rivero. Ĝi anoncas al la tuta mondo, ke la granda proletara kultura revolucio iniciatita kaj gvidata persone de nia granda gvidanto Prezidanto Maŭ jam akiris decidigan venkon! En 1968, la sepcentmiliona ĉina popolo ankoraŭ pli alte tenos la grandan ruĝan standardon de la penso de Maŭ Zedong kaj penados pli energie por gajni la kompletan venkon de la granda proletara kultura revolucio!

KURANTAJ AFEROJ

NOVTIPA TORNOMAŜINO FABRIKITA EN VUHAN

La revoluciaj teknikistoj kaj laboristoj de la Maŝinripara Sekcio de la Ĝenerala Maŝinfabriko de la Ferŝtala Kompanio de Vuhan sukcese fabrikis 5 novtipajn tornomaŝinojn.

La tasko de tiu sekcio estas ripari la ilmaŝinojn de la tuta kompanio. Por bone plenumi sian taskon, ĝiaj teknikistoj kaj laboristoj decidis fabriki mem ekipaĵojn por pligrandigi sian produktivon per la jam havataj dekkelkaj ilmaŝinoj. Firme tenante en sia koro la instruon de Prezidanto Maŭ **"Faru firman decidon, timu nenian oferon kaj superu ĉiujn malfacilaĵojn por akiri venkon"**, kaj sub la apogo de la laboristoj kaj oficistoj en la tuta fabriko, ili obstine batalis dek monatojn kaj finfine elfaris kun brila sukceso siajn unuajn kvin tornomaŝinojn, kiuj multe helpas en antaŭenpuŝo de la produkto.

NOVA TEKNOLOGIO POR PRODUKTO DE ALTEFIKA INSEKTOMORTIGILO

Alte tenante la grandan ruĝan standardon de la penso de Maŭ Zedong en la granda proletara kultura revolucio, la revoluciaj teknikistoj kaj laboristoj en nia kemiindustria departemento eltrovis novan teknologion kaj novan teknikon por fabriki altefikan insektomortigilon 1605 el fosfora pentasulfido, post unu kaj duona jaroj da peniga batalado. Tio pretigis por nia lando pli favoran kondiĉon por disvolvi organikajn fosforajn insektomortigilojn ankoraŭ pli multe, pli rapide, pli bone kaj pli ekonomie.

LA ENSEMBLO "DONGFANG-HONG" REVENIS AL PEKINO

En marto de la kuranta jaro, la Ensemblo "Dongfanghong" el 53 personoj revenis al Ĉinio sub la gvido de ĝia estro Hju Ping, post sia rondira prezentado en Zambio, Tanzanio, Somalio kaj Pakistano laŭ la invito de iliaj registaroj.

Marŝo sur la Vojo de Socialismo

— pri la Teatraĵo "Huajŝuĝuang"

LA kvinakta teatraĵo *Huajŝuĝuang* kolektive reverkita de la revoluciaj artistoj-batalantoj de Ĝanjoŭ-ensemblo de la Ĉina Popola Liberiga Armeo en Pekino nun jam sursceniĝis en Pekino kun tute nova fizionomio. Ĝi estas varme akceptata de la vastaj revoluciaj amasoj.

La dramo prenas kiel sian fonon la grandan ŝanĝiĝon de iu vilaĝo en norda Ĉinio post la Liberiĝo. La dramo fidele spegulas la historion de akra batalo inter la du antagonismaj klasoj, du vojoj kaj du linioj en la kamparo de nia lando post la Liberiĝo, per prezento de la procezo de evoluo de interhelpa grupo al elementa kooperativo

Avino Guo petas sian filinon Hejni skribi al kamarado maljuna Tian pri la grandaj ŝanĝoj okazintaj en Huajŝuĝuang.



Li Laŭkang diras al avino Guo:"Ili volas detrui nian kooperativon? Ili simple songas!"



kaj de altgrada kooperativo al popola komunumo, kiun trapasis la malriĉkamparanoj kaj malsuperaj mezkamparanoj de la vilaĝo Huajŝuĝuang, laŭ la revolucia linio de Prezidanto Maŭ, sub la kondukado de la komunistino avino Guo. Ni reliefigas la heroajn figurojn de malriĉkamparanoj kaj malsuperaj mezkamparanoj reprezentataj de avino Guo kaj Li Laŭkang, kiuj firme iris la vojon de socialismo, faris nepacigeblajn batalojn kontraŭ Cuj Laŭkun, Cuj Ĝiguo kaj aliaj reakciaj bienuloj kaj kulakoj, kaj akiris unu venkon post alia sub la gvido de la Komunista Partio kaj Prezidanto Maŭ.

La vojo de Huajŝuĝuang estis ĝuste tiu, kiun iris nia vasta kamparo dum la pasintaj dekkelkaj jaroj. La venko de tiu vilaĝo estis ĝuste granda venko de la revolucia linio de Prezidanto Maŭ.

FRAKASO DE MILJARA KATENO

En 1947, sub la saĝa gvido de la granda gvidanto Prezidanto Maŭ, la malriĉkamparanoj kaj malsuperaj mezkamparanoj de Huajŝuĝuang komencis ĝeneralan ofensivon kontraŭ la reakcia feŭda sistemo, alte tenante la grandan standardon de revolucia ribelo.

Ĝuste en tiu tempo, la supera instanco sendis kamaradon maljuna Tian al Huajŝuĝuang por gvidi la movadon de agrara reformo. Antaŭ la sidejo de la Ligo de Malriĉkamparanoj, maljuna Tian renkontis avinon Guo, komitatanon de la Ligo. Ili tre intime ekinterparolis, ĉar ili estis malnovaj batalamikoj. Antaŭe maljuna Tian servis en la armeo, kaj en 1941 li vundiĝis en batalo kontraŭ trabalaado de la malamiko. Avino Guo ŝirmis lin sub la malamikaj bajonetoj kaj flegis lin ĝis resaniĝo. Kiam la du batalamikoj intime parolis, venis la milicano Guo Jonglaj kaj raportis, ke la bienulo Cuj Laŭkun diris, ke kiu ajn forportas liajn havaĵojn, tiu devas doni al li ricevilon, kaj ke sen tio neniu provu tuŝi lian havaĵon. Maljuna Tian demandis, kial la bienulaĉo kuraĝas esti tiel aroganta. Avino Guo respondis ke la bienulo havas en sia familio unu "revolucian kadron". Tiu estas lia filo Cuj Ĝiguo, kiu enŝteliĝis en la revolucian vicaron post la Liberiĝo kaj nun publike kaj impertinente subtenas sian bienulan familion.

Ĝuste kiam la amaso batalis en kunveno kontraŭ la bienulaĉo, venis lia filo, kiu nomis sin "revolucia kadro". Li arogante riproĉis la amason ke ili ne devas batali kontraŭ lia bienula familio kaj insultis la revolucian agon de la amaso kiel fuŝaĵon. La koleriĝinta amaso trenis lin al la Ligo de Malriĉkamparanoj por interargumenti. Tie maljuna Tian faris pinto-kontraŭpintan batalon kun Cuj Ĝiguo. Li diris: "Bonega estas la ago de la kamparanoj en dekmilionoj nombrantaj, kiuj leviĝas ribeli kaj debatas la arogantecon de la feŭda diktaturo kaj la krimaj bienuloj, kiuj rajdas sur ilia nuko!" Tiu tondra voĉo ege timigis la klasajn malamikojn kaj kreskigis la batalvolon de la revolucia popolo. "Sciu, Cuj Laŭkun!" la malriĉkamparano Li Laŭkang diris sentime kaptante la bienulaĉon, "vi tiranis super ni jam dum dekoj da jaroj! Hodiaŭ Prezidanto Maŭ



Avino Guo revenis de Pekino kun la instrukcio de Prezidanto Maŭ pri fondo de agrikulturaj kooperativoj.



Li Laŭkang alportas ĉifonan veston avo ĝis la nepo por sendi ĝin al la

subtenas nin, kaj ni likvidos kun vi la kalkulojn!" Ne plu povante regi sian flamantan koleron, la liberiĝinta kamparana amaso kriis laŭte kaj indigne: "Faligu la bienulaĉon Cuj Laŭkun!" La milicanoj eskortis la bienulaĉon al la kunveno de batalo kontraŭ li.

En la mondo ĉiuj malriĉkamparanoj estas samfamilianoj. La membroj de Ligo de Malriĉkamparanoj de la najbara vilaĝo Zaŭĝuang venis por subteni la batalon kontraŭ la bienulaĉo Cuj Laŭkun. Forte premante la manon de Ginmej, komitatano de la Ligo de Malriĉkamparanoj de Zaŭĝuang, avino Guo diris signifoplene: "Hodiaŭ ni kune batalas kontraŭ la bienulo, kaj estonte ni ankoraŭ kune konstruos la socialismon!"

"NUR SOCIALISMO POVAS SAVI ĈINION"

Kien iru Ĉinio post la venko de la demokratia revolucio? Ĉu ĝi iru la socialisman vojon aŭ la kapitalisman? En tiu decida momento de la sorto de nia lando, Prezidanto Maŭ klarvide montris: **"Nur socialismo povas savi Ĉinion".** Sed la ĉina Ĥruŝĉov asertis, ke "estas necese firmigi la novdemokratian sistemon", kaj distrumpetis disvolvon de kulaka ekonomio, vane provante retiri nian landon al la erara vojo de kapitalismo. Ekstreme akra batalo okazis inter la proletara revolucia linio reprezentata de Prezidanto Maŭ kaj la burĝara reakcia linio reprezentata de la ĉina Ĥruŝĉov.

En 1953, aktive respondante la alvokon de Prezidanto Maŭ **"organiziĝu"** la malriĉkamparanoj kaj malsuperaj mezkamparanoj de Huajŝuĝuang fondis agrikulturan produktan kooperativon sub la iniciato de avino Guo. Kvankam ili renkontis multajn malfacilojn, tamen ili kredis ke tio estas la direkto montrita de Prezidanto Maŭ kaj decidis firme antaŭenmarŝi laŭ ĝi!

Kiam la kooperativo ĵus estis fondita, revenis al la vilaĝo post sia servo en la armeo Genĝu, filo de la malriĉkamparano Liu Laŭĉeng. Li unue vizitis avinon Guo, al kiu li esprimis sian firman volon iri la vojon de kooperativo kaj prezentis kiel sian kapitalon al la kooperativo la monon, kiun la armeo donis al li por helpi lin en agrikultura produkto. Klare komprenante ke nur organiziĝo estas brila vojo al komuna riĉiĝo, la vastaj amasoj de malriĉkamparanoj kaj malsuperaj mezkamparanoj de Huajŝuĝuang aliĝis al la kooperativo ĉiam pli multnombre.

Sed, Cuj Ĝiguo, filo de bienulo, malamegis la organiziĝon de la malriĉkamparanoj kaj malsuperaj mezkamparanoj, grincante per la dentoj. "Kia estas via socialismo?" li diris malice al avino Guo. "Ĉu vi havas traktorojn kaj hidroelektran stacion?"

"Ni havas la Partion, kiu gvidas nin! Ni havas Prezidanton Maŭ, kiu donas al ni instrukciojn!" Firme respondis avino Guo. "Ni malriĉkamparanoj kaj malsuperaj mezkamparanoj organiziĝos unuanime kaj bone



jam uzitan de tri generacioj de la ekspozicio en la provinca ĉefurbo.



Jen, vidu la ŝtonplaton faritan por la tago de restarigo de la malnova sociordo. Cuj Ĝiguo ne povas fornei sian krimon.

funkciigos la kooperativon. Ni certe povos veni al socialismo kaj komunismo!"

Sub la firma subteno de la malriĉkamparanoj kaj malsuperaj mezkamparanoj, la agrikultura kooperativo gvidata de avino Guo pli kaj pli disvolviĝis trapasante akrajn kaj komplikajn batalojn. En la komenca periodo, ĝi havis kiel membrojn nur pli ol 20 familiojn. Poste, ĝin partoprenis jam pli ol 90% de la familioj el la tuta vilaĝo, kaj ĝia organiza formo disvolviĝis al pli alta grado.

Por pluapaŝe disvolvi la produkton, la malriĉkamparanoj kaj malsuperaj mezkamparanoj de Huajŝuĝuang postulis formadon de pli granda kooperativo. Venis al tiu vilaĝo Ginmej, nun estrino de la najbara Zaŭĝuang-a Kooperativo, por interkonsiliĝi pri kunigo de la du kooperativoj en unu pli grandan. Kaj la vicestro de la kooperativo de Huajŝuĝuang Liu Genĝu estis sendita al la distrikto por raporti pri la afero. Sed ekster la atendo, la sekretario Deng de la distrikta partia komitato tion ne aprobis. Li diris ke "oni ne devas antaŭeniri aventureme", ke la kooperativoj "devas esti firme reduktitaj", kaj ke en la kuranta vintro kaj la venonta printempo ili estos "reordigataj" kaj "firmigataj" por ke la nombro de partoprenantaj familioj restu ĉirkaŭ duono de la origina sumo. Liu Genĝu kaj la amasoj de la vilaĝo ege indigniĝis. Ili diris: "Funkciigo de kooperativo estas vojo montrita al ni de Prezidanto Maŭ! Pro kio sekretario Deng limigas nin en tio?"

Ĝuste kiam la movado de agrikultura kooperigo estis subpremata, revenis al la vilaĝo avino Guo post sia partopreno de kunveno en Pekino. Ŝi alportis la instrukcion de la granda gvidanto Prezidanto Maŭ pri sinpreparo en renkonto al la alta tajdo de la movado de agrikultura kooperigo. Aŭdinte la voĉon de la amata kaj estimata gvidanto Prezidanto Maŭ, ekbolis la vastaj amasoj de malriĉkamparanoj kaj malsuperaj mezkamparanoj en Huajŝuĝuang. Forte premante la manon de avino Guo, la malriĉkamparano Li Laŭkang kriis elkore kun larmoj en la okuloj: "Vivu Prezidanto Maŭ! Vivu longe Prezidanto Maŭ!" Ĉiuj malriĉkamparanoj kaj malsuperaj mezkamparanoj laŭte kriis levante la brakojn: "Vivu Prezidanto Maŭ!" "Senlime longan vivon al Prezidanto Maŭ!" Poste Avino Guo konatigis maljunan Tian al la amasoj: "Jen kamarado maljuna Tian, nova sekretario de nia gubernia partia komitato ĵus transpostenigita. Li gvidos nin organizi grandan kooperativon!" Kiam la amasoj trovis ke la nova sekretario estas ĝuste tiu maljuna Tian kiu antaŭe gvidis ilin en la agrara reformo, ili fariĝis pli fidplenaj al sia venko. Maljuna Tian komunikis al la amaso la instrukcion de Prezidanto Maŭ **"En la kamparo de la tuta lando, tuj venos la alta tajdo de nova socialisma amasa movado"**, kaj diris: "Sed nun iuj prenas la starpunkton de bienuloj kaj kulakoj por oponi nian vastan organizadon de kooperativoj kaj volas ke ni deĉevaliĝu. Prezidanto Maŭ montris al ni ke unu por deĉevaliĝo kaj la alia por surĉevaliĝo, tio prezentas antagonismon inter du linioj. La

ĉevalon ni devas nepre ne forlasi sed surrajdi!" La komunumanoj ĉiuj estis kuraĝigitaj kaj diris: "Prezidanto Maŭ plene eldiris kion ni havas en nia koro! Kun la subteno de Prezidanto Maŭ, nia kooperativo neniam disfalos spite al ĉiaj atakoj kaj subfosadoj de kiu ajn." Sub la direktado de la revolucia linio de Prezidanto Maŭ kaj la subtenado de sekretario Tian de la gubernia partia komitato, la malriĉkamparanoj kaj malsuperaj mezkamparanoj kaj la kadroj de Huajŝuĝuang frakasis la intrigon de klasaj malamikoj kaj alvenigis la novan altan tajdon de la movado de agrikultura kooperigo.

NEPRE NE FORGESU KLASBATALON

Nia granda gvidanto Prezidanto Maŭ saĝe montris ke en la historia periodo de socialismo ankoraŭ ekzistas klasoj, klasaj kontraŭdiroj kaj klasbatalo.

Sed la ĉina Ĥruŝĉov energie distrumpetis la "teorion de estingiĝo de klasbatalo", en rekta opono kontraŭ la revolucia linio de Prezidanto Maŭ.

En Huajŝuĝuang, unu post alia elpaŝis bienuloj, kulakoj, kontraŭrevoluciuloj, fiuloj kaj dekstruloj por senbride ataki la kooperigan movadon. La malriĉkamparanoj kaj malsuperaj mezkamparanoj firme rebatis ilian frenezan atakon.

En somero de 1957, kiam la tritika rikolto ĵus finiĝis, la bonhava mezkamparano Li Mancang kriaĉis la unua ke mankas al li greno por sin nutri, kaj ke li eliĝos el la kooperativo, se la kooperativo ne distribuos la tritikon al siaj membroj. Ekblovis la vento de "elkooperativiĝo" en la vilaĝo. Dume en la vilaĝo cirkulis kalumnioj kontraŭ avino Guo. Aktiviĝis ankaŭ la bienulaĉo Cuj Laŭkun, kiu antaŭe kuŝis malsana en sia ĉambro dum multaj jaroj de post la agrara reformo. Kion signifas ĉio ĉi tio finfine? Oni nepre devas fari ĝisfundan esploron kaj trovi la radikon de la afero. Malkovriĝis ke revenis al la vilaĝo la bienula filo Cuj Ĝiguo, kiu redaktis materialon por akuzi avinon Guo en la hejmo de la bonhava mezkamparano Li Mancang en la sama nokto tuj post sia reveno. La bienulaĉo kaj lia filo ne nur volis faligi avinon Guo kaj la kooperativon, sed ankaŭ direktis sian lancpinton al maljuna Tian, sekretario de la gubernia partia komitato, kiu ĉiam subtenas la malriĉkamparanojn kaj malsuperajn mezkamparanojn. Samtempe ili energie instigis Li Mancang eliĝi el la kooperativo. Cuj Ĝiguo ankaŭ distrumpetis la "teorion de estingiĝo de klasbatalo". Tiel nigraj nuboj densiĝis momente en la aero super Huajŝuĝuang.


Ĝuste tiam maljuna Tian denove venis al Huajŝuĝuang. Li komunikis al la kooperativanoj la instruon de Prezidanto Maŭ **"Klasbatalo ankoraŭ ne finiĝis"**. Kvazaŭ brila lampo vojmontra, tiuj vortoj lumigis la koron de la amaso kaj akrigis ilian vidon. La malriĉkamparanoj kaj malsuperaj mezkamparanoj de Huajŝuĝuang rapide travidis la intrigon de la klasaj malamikoj, eltrenis la dekstrulon Cuj Ĝiguo kaj praktikis proletaran diktaturon kontraŭ li, kiu ĉiam persistis en sia reakcia starpunkto kaj subfosis la movadon de agrikultura kooperigo.

Ĝuste kiam la popolo tra la tuta lando ĝojkriis: "bona estas la popolkomunumo", la ĉina Ĥruŝĉov malice atakis en komploto kun eksterlandaj imperiistoj, reviziistoj kaj reakciuloj la tri grandajn ruĝajn standardojn, nome: la Ĝeneralan Linion, la grandan antaŭensalton kaj la popolan komunumon. Profitante tiun ŝancon, ankaŭ la bienuloj, kulakoj, kontraŭrevoluciuloj, fiuloj kaj dekstruloj en Huajŝuĝuang kalumniis ke "la popolaj komunumoj estas tro frue organizitaj kaj estas fuŝitaj". Ili ankaŭ ĉie agitis por la fikso de produkta kvoto bazita sur familia mastrumado kaj instigis la kamparanojn sinokupi pri la parceloj por privata uzo kaj negoci en liberaj merkatoj. La malriĉkamparanoj kaj malsuperaj mezkamparanoj de Huajŝuĝuang firme rezistis kontraŭ tiu nigra vento. Ili diris: "Ni volas ne individuan mastrumadon sed la kolektivan, kaj ni volas socialismon kaj komunismon!" Laŭ la instruo de la granda gvidanto Prezidanto Maŭ **"nepre ne forgesu la klasbatalon"**, ili prenis klasbatalon kiel apogpunkton, frakasis unun post alia la frenezajn atakojn de la klasaj malamikoj kaj akiris grandan venkon.

En aŭtuno de 1962, en la profunda disvolviĝo de la movado de popola komunumo, la malriĉkamparanoj kaj malsuperaj mezkamparanoj de Huajŝuĝuang refoje akiris abundan rikolton. Ili profunde komprenis el siaj propraj spertoj ke sen la movado de popola komunumo ne eblus la granda disvolviĝo de kolektiva ekonomio kaj la abunda rikolto de agrikultura produkto. Kun granda ĝojo la komunumanoj de Huajŝuĝuang preparis elmontraĵojn por la provinca agrikultura ekspozicio kiel raporton pri sia bonega rikolto al Prezidanto Maŭ. Tamen la plej grava afero estas klasa edukado. La malriĉkamparano Li Laŭkang alportis sian ĉifonan vatitan veston, kiun portis la tri generacioj de lia familio, dum ili laboris kiel dungitoj en la hejmo de la bienulo Cuj Laŭkun. Iu alia alportis sian difektitan bovlon, kiun li uzis por almozpetado en la malnova socio; kaj ankoraŭ alia alportis la vipon, kiun Cuj Laŭkun antaŭe uzis por turmenti malriĉulojn .... Ĉio ĉi tio servis kiel viva instrua materialo por klasa edukado.

Kiam la malriĉkamparanoj kaj malsuperaj mezkampranoj de Huajŝuĝuang jubilis pro sia venko, mortis la bienulo Cuj Laŭkun. Lia filo Cuj Ĝiguo ŝtele starigis por li tombŝtonon, sur kiu estas gravurita listo de liaj domo, agro, ĉevaloj, veturiloj kaj terkulturaj instrumentoj, kiujn oni forprenis. Tio estis nenio alia ol krima kontlibro destinita por la tago de ŝanĝo de la regpotenco. La amasoj malkaŝis tiun aferon, kiel alarmon pri klasbatalo. Maljuna Tian proponis sendi al la ekspozicio en la provinco tiun kriman ŝtonplaton kune kun la nigra akuzskribo per kiu Cuj Ĝiguo kalumniis avinon Guo en 1957, por ke oni ĉiam memoru pri la ekzisto de klasoj kaj klasbatalo.

Tagnokte Sopiras Niaj Tajvanaj Samlandanoj al Prezidanto Maŭ



Dekstre: *La letero skribita de la maristo*
Maldekstre: *Tiu de la mararmeano de Ĉiang Kajŝek*

ĈISUBE estas du mallongaj leteroj. Unu estas sendita de patriota maristo en Tajvan al nia granda gvidanto Prezidanto Maŭ. La letereto plena de profunda sopiro tekstas jene:

Prezidanto Maŭ,

Ni soife esperas, ke vi liberigu Tajvan kiel eble plej frue kaj savu la vastan popolon el suferego.

La letero estis trovita en fermita ladskatolo, kiu flosis al la bordo de la kontinento de la patrio trans la ondanta markolo.

Alian leteron skribis konsciiĝinta soldato de la mararmeo de Ĉiang Kajŝek, kaj ĝi venis al la kontinento de la patrio tra ege zigzaga vojo. Ĝi konsistas el pentrita kvin-stela ruĝa standardo kaj jenaj vortoj:

Al la samlandanoj de la kontinento. Mi havas multon por diri al vi. Vivu la Ĉina Popola Respubliko!

Tiuj du neordinaraj, mallongaj leteroj esprimas la koran senton de niaj samlandanoj en Tajvan, kiuj tagnokte sopiras al Prezidanto Maŭ kaj senlime amas la socialisman patrion, spegulas ilian batalvolon kontraŭ la usona imperiismo kaj la reakcia kliko de Ĉiang Kajŝek, kaj verŝas ilian ardan deziron de fruą liberigo de Tajvan.

Tio estas montriĝo de la senlima amo, senlima kredo, senlima adoro kaj senlima fideleco de niaj dekdu miljon samlandanoj en Tajvan al nia granda gvidanto Prezidanto Maŭ. Tio estas ankaŭ ilia sanga kaj larma akuzo kontraŭ la usona imperiismo kaj la reakcia kliko de Ĉiang Kajŝek.

Rigardante al la Norda Stelo, niaj samlandanoj en Tajvan, kiuj troviĝas en grandega mizero, ekstreme sopiras al nia granda gvidanto Prezidanto Maŭ. Riskante sian vivon ili aŭskultas la disaŭdigojn de la Centra Popola Radio-Stacio de Pekino por aŭdi la voĉon de Prezidanto Maŭ. Zorge evitante la observadon de la policanoj kaj spionoj, ili kaŝe lernas el la disaŭdigoj la kantadon de *Ruĝas la Oriento, Marnavigo Dependas de Stiristo* kaj kantoj kun tekstoj el vortoj de Prezidanto Maŭ. Ili sin turnas vizaĝe al la kontinento de la patrio kaj al Pekino, kaj deziras al Prezidanto Maŭ senfine longan vivon kaj senfine longan vivon. Per diversaj manieroj, ili montras sian senlime profundan amon al la granda gvidanto Prezidanto Maŭ, kaj la du leteroj supre menciitaj estas alia pruvo, ke la arda amo de niaj tajvanaj samlandanoj al Prezidanto Maŭ kaj al la socialisma patrio estas nesubpremebla, nek retenebla, malgraŭ la furioza persekutado de la usona imperiismo kaj la reakcia kliko de Ĉiang Kajŝek.

Tajvan sub la okupado de la usona imperiismo kaj la kliko de Ĉiang Kajŝek estas infero en la homa mondo. Sub la sanga regado kaj kruela subpremado de la usona imperiismo kaj la reakcia kliko de Ĉiang Kajŝek, niaj samlandanoj en Tajvan suferas treege grandan malfeliĉon kaj vivas pli malbone ol brutoj. Kie estas subpremo, tie estas rezisto. Dum la lastaj dekkelkaj jaroj, niaj samlandanoj en Tajvan disvolvis nefleksebIan batalon kontraŭ la usona imperiismo kaj la reakcia kliko de Ĉiang Kajŝek.

Nia granda gvidanto Prezidanto Maŭ montris, ke **"Ĉiuj agresantoj kaj iliaj lakeoj en la mondo estos tute enterigitaj, kaj la tago por tio ne estas tre malproksima."** La sanga regado de la usona imperiismo kaj la reakcia kliko de Ĉiang Kajŝek en Tajvan certe ne longe daŭros.

La montoj kaj la maro povas disigi nin, sed ne niajn korojn. Ni interligiĝas kun la samlandanoj en Tajvan koro kun koro. Firme respondante la alvokon de la granda gvidanto Prezidanto Maŭ, ni nepre liberigos Tajvan kaj savos la tieajn samlandanojn el abismo de suferoj. Ni ĵuras, ke ni starigos la kvin-stelan ruĝan standardon de la patrio sur nia aminda insulo Tajvan, kaj ke ni flirtigos la ruĝan standardon de la granda, ĉiamvenka penso de Maŭ Zedong alte kaj por ĉiam en la aero super Tajvan.

KURANTAJ AFEROJ

MEDICINAJ LABORANTOJ DE GUJJANG-REGIONO EN LA KAMPARO

Pli ol 1,500 revoluciaj medicinaj laborantoj el la kuracaj kaj sanitaraj institucioj de Gujjang-regiono, kiuj firme plenumas la grandan direktivon de Prezidanto Maŭ pri transmeto de la gravita punkto de la sanprotekta laboro al la kamparo, iris sur la plejfronton de printempa plugado por servi al la vastaj amasoj de malriĉkamparanoj kaj malsuperaj mezkamparanoj.

Tiuj medicinaj laborantoj sin organizis en 90 kamparajn sanprotektajn grupojn, por kuraci kaj preventi malsanojn por la malriĉkamparanoj kaj malsuperaj mezkamparanoj de diversaj naciecoj en 21 malproksimaj gubernioj ĉe la limoj de tiu provinco, kie sanprotekta servo estis malforta.

NOVAJ INDUSTRIAJ PRODUKTAĴOJ EN ŜANHAJO

Sub la direktado de la alvoko **"teni la revolucion kaj stimuli la produkton"** de nia granda gvidanto Prezidanto Maŭ, la proletaraj revoluciuloj sur la industria fronto en Ŝanhajo sukcesis produkti nombron da novaj produktaĵoj inkluzive de preciza malvarm-laminatilo, kontribuante por venko sur la industria fronto en la printempo.

RADIOMETRO SUKCESE PRODUKTATA DE DONGFENG-FABRIKO DE AERREGULIGAJ APARATOJ

Alte tenante la grandan ruĝan standardon de la penso de Maŭ Zedong, la revoluciaj oficistoj kaj laboristoj de la Tiangin-a Dongfeng-fabriko de Aerreguligaj Aparatoj sukcesis fabriki radiometron per siaj simplaj ekipaĵoj, kaj komencis amasan produkton. Laŭ ekspertizo, la produktataj instrumentoj atingas relative altan nivelon en stabileco kaj sentemo, kaj la produktokosto estas malalta.

Fremdlandaj Amikoj Laŭdas Daĝaj-brigadon

GJUNĜI kaj ĜONGBU

LETERO DE IU USONA AMIKETO

En la akceptejo de Daĝaj-brigado troviĝas letero skribita, je la 23-a de aprilo, 1964, de usona amiketo al Ĉen Jongguj, kiu tekstas kiel jene:

Mi estas usona knabo. Mi amas Prezidanton Maŭ kaj ankaŭ la ĉinan popolon. Same kiel la ĉinaj knaboj, mi volas legi la verkojn de Prezidanto Maŭ, aŭskulti liajn vortojn kaj fariĝi lia bona lernanto. Mi vidis en Pekino bildojn kaj filmon pri Daĝaj. Mi tre estimas la diligentecon kaj kuraĝon de la onklinoj kaj onkloj de Daĝaj, kaj mi aŭdis ankaŭ multon pri vi kaj vidis vin en la filmo.

Ĉifoje, mia panjo venas al Daĝaj por lerni de vi. Kiom mi deziras viziti vin kune kun ŝi, sed mi ne povas, ĉar mi devas viziti la lernejon. Mi petas mian panjon transdoni al vi unu insignon kun portreto de Prezidanto Maŭ kiel memoraĵon kaj petas vin doni vian subskribon sur mian ekzempleron de *Vortoj de Prezidanto Maŭ Zedong*.

Nun ni kune deziru al la granda gvidanto Prezidanto Maŭ senlime longan vivon!

Vivu, vivu, vivu longe Prezidanto Maŭ, la plej plej ruĝa suno en nia koro!

Tra lia eleganta manskribo, varmaj vortoj kaj sincera revolucia sento, ni povas vidi lian ardan koron. Lia voĉo spegulas la koron de la tutmonda revolucia popolo. Lia deziro estas tiu de multaj fremdlandaj amikoj.



Kamarado Ĉen Jongguj, sekretario de la partia filio de Daĝaj-brigado en Hijang-gubernio, Ŝanhi-provinco, donacas broditan flagon al albana ŝtata ensemblo kiu vizitas la brigadon.

Kiel sonora nomo estas Daĝaj! Same kiel multaj aliaj heroaj kolektivoj de la socialisma Ĉinio, ĝi sonas en la koroj de la tutmondaj revoluciaj popoloj. Kiel fajrosemo de batalo ĝi brulas en iliaj brustoj. Homoj iras tra kokosarbaroj en Afriko, kulturejoj de kaŭĉukarboj en Ameriko kaj rizkampoj en Sudorienta Azio, trarompas la obstaklojn amasigitajn de reakciaj registaroj kaj persekutadon de spionoj kaj ĉashundoj, kaj fine venas al Ĉinio trans Pacifiko aŭ Atlantiko furioze ondantaj. Ili sopiras al Pekino, al Prezidanto Maŭ. Kaj vidinte Prezidanton Maŭ, ili ekdeziras viziti Daĝaj, la ruĝan standardon starigitan persone de Prezidanto Maŭ.

Veninte al Daĝaj, iu indonezia amiko diris fervore al Daĝaj-anoj: "Mi bone sciis la nomon Daĝaj jam antaŭ mia vojaĝo. Tiam mi pensis, kiam mi povos viziti Daĝaj-brigadon por ĝin vidi propraokule! Ĉifoje, veninte al Ĉinio, mi pensis ĉiutage, kie estas Daĝaj? Kiam mi povos veni al ĝi? Kaj hodiaŭ, efektiviĝis fine mia deziro!"

Ekde 1964, amikoj el pli ol 80 landoj vizitis Daĝaj. Niaj intimaj batalamikoj, albanaj kamaradoj, jam venis al Daĝaj 15 fojojn. Multaj fremdlandaj amikoj rigardas viziton al Daĝaj kiel sian feliĉon en la tuta vivo!

DAĜAJ-ANOJ KREIS MIRAKLON

Amikoj, kiuj venas el imperiismaj, reviziismaj, koloniaj aŭ duonkoloniaj landoj, tuj sentas sin veni en tute alian mondon, kiam ili surpaŝas la teron de Daĝaj. Kiam ili vidas poste la ŝtuparajn kampojn konstruitajn sur la krutaj montoj kaj valoj kaj la ore brilantajn grenamasegojn monte leviĝantajn sur la draŝejo, ili nereteneble laŭdas: "miraklo!" "miraklo!" Kaj ilia laŭdado fariĝas ankoraŭ pli granda kaj nehaltigebla, kiam ili informiĝas pri la prezentado kun la alta ideologia nivelo, kiun atingis la Daĝaj-anoj.

Prezidanto Maŭ diris: **"Distingi eblas nur, kiam estas komparo."** Nur kiu gustumis galon, povas pritaksi plej bone la dolĉecon de mielo. Iu amiko el Sudorienta Azio diris en profunde kortuŝita tono: "Nia lando situas en la subtropika zono kun multe pli favoraj naturkondiĉoj kaj rikoltas trifoje en unu jaro, sed la kamparanoj vi-

vas tre mizere post diligenta laborado dum la tuta jaro kaj ĉiutage baraktas sur malsata linio. El tio mi komprenas, ke nur kun popola regpotenco la popolo povas havi ĉion sian. Kiam mi revenos al mia hejmloko, mi nepre propagandos la Daĝaj-an spiriton, vekos la popolon per la penso de Maŭ Zedong por faligi la imperiismon kaj reakciularon kaj reprenos al ni la regpotencon por ke la spirito de Daĝaj floru kaj donu fruktojn en nia lando." Iu japana amiko diris: "Vidinte per la propraj okuloj Daĝaj-brigadon, mi trovas, ke ĝi estas eĉ pli bona ol ĝi estas prezentata en dokumenta filmo aŭ imago."

La amikoj, kiuj multe aŭdis la trompan propagandon de imperiismaj mensogistoj, ne povas ne indigni kaj fari riproĉojn al la burĝara gazetaro de sia lando, kiam ili vidas la realon de Daĝaj: "Mensogo! Mensogo! Pura mensogo!" Iu ekvadora amiko diris: "La burĝara gazetaro de nia lando klaĉas kontraŭ Ĉinio, sed la faktoj donas al la imperiismaj kaj reviziismaj mensogistoj fortan vangfrapon! Se la popolo de la tuta mondo agus same kiel la Daĝaj-anoj, la tagoj de la bienulaj kaj burĝaraj sinjoroj en la tuta mondo estus finitaj!"

Post sia vizitado, multaj fremdlandaj amikoj emocie murmuris: **"La popolo, nur la popolo, estas la movforto kreanta la mondan historion."** Per la plej belaj vortoj kaj la plej vivaj metaforoj ili laŭdas Daĝaj-brigadon kaj la Daĝajanojn: "Vi pentris la plej novan kaj plej belan bildon laŭ la instrukcio de Prezidanto Maŭ Zedong." (japana) "Vi estas mitologiaj gigantoj, kiuj kapablas translokigi montojn kaj plenigi marojn. Vi efektivigis kion mitoj rakontas." (itala) "La Malsaĝa Avo translokigis montojn, tio estas nur fablo, kaj neniu tion vidis. Sed, la farojn de nuntempaj Malsaĝaj Avoj mi vidis en Daĝaj." (kongolanda [K.]) "El la antikveco postrestas la Granda Muro. Kaj vi konstruis novan Grandan Muron refoje." (indonezia)

KUN LA PENSO DE MAŬ ZEDONG, NI HAVOS ĈION

La fremdlandaj amikoj, kiuj vizitas Daĝaj-brigadon, ĉiam emas demandi: Kiel vi kreive studas kaj aplikas verkojn de Prezidanto Maŭ? Kiel vi kontraŭbatalas la egoismon kaj kritikas la reviziismon per la penso de Maŭ Zedong? Kiel vi faras la grandan proletaran kulturan revolucion? La eminenta respondo de la Daĝaj-anoj kaj ilia alta nivelo atingita en ideologio profunde impresis la demandintojn.

Demandinte pri la lernado de verkoj de Prezidanto Maŭ, iu amiko el Sudorienta Azio diris: "La Daĝaj-anoj estas novaj socialismaj kamparanoj armitaj per la penso de Maŭ Zedong. La Daĝaj-spirito estas sinapogo sur la propraj fortoj kaj energia strebado al prosperiĝo, spirito rekomendata de Prezidanto Maŭ, kiu diris: **'Ni pledas por sinapogo sur la propraj fortoj. Ni esperas ricevi eksterajn helpojn, sed ni ne devas dependi de ili. Ni apogas nin sur niaj propraj klopodoj kaj sur la kreivo de nia tuta armeo kaj nia tuta popolo.'** Dank' al la vizito al Daĝaj mi komprenas, ke tiel en la batalo kontraŭ la naturo, kiel en la batalo kontraŭ la klasa malamiko, oni devas disvolvi la spiriton de sinapogo sur la propraj fortoj kaj energia strebado al leviĝo. Ni devas lerni tian spiriton de la Daĝaj-anoj."

Iu kameruna amiko diris: "Vi estas vere feliĉaj, ĉar vi estas edukataj ĉiutage per la penso de Prezidanto Maŭ. Viaj atingoj estas la fruktoj de kreiva studo kaj apliko de verkoj de Prezidanto Maŭ. Post la liberiĝo de nia lando, same kiel vi, ni nepre konstruos novajn vilaĝojn similajn al Daĝaj per la penso de Maŭ Zedong.

Kamarado Ĉen Jongguj intime parolas kun kamaradino Fuĝikaŭa Nacuko, estrino de la japana dramtrupo "Dentrado" kiu vizitas la brigadon.



Iu japana amiko diris: "La granda sukceso de la Daĝaj-anoj de ŝanĝado de la natura fizionomio ja estas granda venko de la penso de Maŭ Zedong, kiu jam unuigis la Daĝaj-anojn kaj nepre unuigos ankaŭ la popolon de la tuta mondo."

En la lasta jaro, kiam kamarado Ramiz Alia, la vicestro de la Partia kaj Registara Delegacio de Albanio, vizitis Daĝaj-brigadon, li entuziasme diris: "La glora Daĝaj estas Daĝaj de la penso de Maŭ Zedong kaj ĝia standardo. En sia agado kaj laboro la Daĝaj-anoj konkrete manifestas la penson de Maŭ Zedong. La heroaj Daĝaj-anoj armis sian kapon per la penso de Maŭ Zedong, sekve ili havas feran volon por venki multnombrajn malfacilojn kaj kreis mirindaĵojn kiujn mi neniam vidis nek aŭdis antaŭe. Tio montras, ke la penso de Maŭ Zedong estas glora kaj grandioza. Tio estas venko de la revolucia linio de Prezidanto Maŭ kaj signifas bankroton de la burĝara reakcia linio de la ĉina Ĥruŝĉov."

Daĝaj estas fornego de revolucio. Multaj fremdlandaj amikoj pli amas nian grandan gvidanton Prezidanto Maŭ post sia vizito al Daĝaj. Ili varme laŭdas Prezidanton Maŭ kiel la "Lenin en la nuna tempo". Ili diras, ke "la penso de Maŭ Zedong estas la leviĝanta ruĝa suno por Azio, Afriko kaj Latinameriko", ke "Ĉinio estas la centro de la monda revolucio", ke "Daĝaj estas la modelo por revolucio en la kamparo de la tuta mondo", kaj ke "Daĝaj estas la ruĝa standardo ne nur de la ĉina popolo, sed ankaŭ de la popolo de la tuta mondo".

PORTI LA REVOLUCIAN FAJROSEMON


Estas la plej emocia kaj neforgesebla momento, kiam la fremdlandaj amikoj devas adiaŭi Daĝaj kun bedaŭro. La senfina fluo de vortoj kaj larme malsekaj okuloj pro kortuŝiteco montras la interplektitajn internaciismajn sentojn de la gastoj kaj gastigantoj.

Ofte la sekretario de la partia filio Ĉen Jongguj kaj Daĝaj-anoj uzas la lastan momenton por demandi ilin pri la situacio en ilia patrolando, deziri al ili sukcesojn en la revolucio kaj inviti ilin refoje gasti ĉe la brigado en nemalproksima estonteco.

Foje, filipina amiko emocie diris al kamarado Ĉen Jongguj: "Mi vidis la senkomparan potencon de la penso de Maŭ Zedong en Daĝaj! Mi kredas, ke vi akiros ankoraŭ pli grandajn sukcesojn sub la gvido de la penso de Maŭ Zedong." Ĉen Jongguj tiam diris sian inviton al li: "Bonvolu reviziti nin do post kvin jaroj." La filipina amiko diris: "Ni tre volas reviziti vin. Sed eble mi ne povos

En la bonega situacio de akiro de decida venko en la granda proletara kultura revolucio, 1967, Daĝaj-brigado refoje akiris abundan rikolton.





Literaturaj kaj artaj batalamikoj el Japanio rigardas la akvujon konstruitan sur monto de Daĝaj-brigado

tion fari, se nia revolucio ne sukcesos ĝis la tempo." Firme manpremante kun li, Ĉen Jongguj decideme diris: "Vi nepre venkos! La venko nepre apartenas al la popolo!"

Adiaŭante la Daĝaj-anojn, la fremdlandaj amikoj ĉiam garantias, ke ili nepre portos al sia patrolando la profundan klasan amon de Daĝaj-anoj kaj la revolucian spiriton de Daĝaj.

Iu sendito de la heroa Albanio diris: "El via prezentado mi jam scias kiel fari la grandan kulturan revolucion en la kamparo. En nia patrolando ni nun faras revolucion en ideologio kaj kulturo. Ni prenos vin kiel nian ekzemplon kaj lernos de vi!"

Iu amiko el Birmo diris: "La spirito de sinapogo sur la propraj fortoj kaj la revolucia, ribela spirito de la Daĝaj-anoj estas tre utila por nia armita batalo. Reveninte hejmen mi nepre propagandos pri tio, por ke la birmanoj iru la vojon de Daĝaj."

Iu japana amiko diris: "La japanaj kamparanoj havas flamantan malamon en sia koro kontraŭ la usonaj kaj japanaj reakciuloj, se ni transdonos al ili ĉion, kion ni vidis kaj lernis en Ĉinio, precipe en Daĝaj, ilia flamanta malamo certe forbruligos la usonajn kaj japanajn reakciulojn kaj reviziisman klikon de Mijamoto."

Komuna penso formas profundan revolucian amikecon, kiu siavice densiĝas en ardaj versoj. La *Himno de Daĝaj* skribita de iu indonezia kompartiano estas unu inter la sennombraj:

Gigante staras la Brigado Daĝaj kun inspiro.


Ĝi estas por la land' fier' kaj por la mond' admiro.

Kiel miraklo l' Granda Muro kvankam daŭre gloras,

Malsaĝaj Avoj de l' nuntempo tamen pli valoras.

Post la Kurso

Neordinara Donacaĵo



Kuracistoj de la Ĉina Kuractrupo faras por Salum mezuradon kaj gipsan modlilon.

EN iu tago, estis granda ĝojo en la koro de kriplulo Seif Salum Said en Zanzibaro de Tanzanio. Li metis sur sin novajn vestaĵojn post sinbano kaj venis kun bonega humoro al la loĝejo de ĉinaj teknikistoj helpe de lambastono. Salum ne povis superregi sian ĝojon kaj ekscitiĝon, kiam li ricevis tie neordinaran donacaĵon — artefaritan gambon delikate faritan kaj alportitan el Ŝanhajo. Premante ĝin al la sino, Salum karesis kaj karesis. Poste li surportis ĝin kaj ekprovis paŝi ĉiuflanken sen lambastono.

DANKO AL PREZIDANTO MAŬ

La provado montris la plenan taŭgecon de la artefarita gambo, kiun zorge faris ĉinaj laboristoj dank' al ekzakta mezurado, modelpreno kaj produktado kaj poste alportis al Afriko transe de pli ol dek mil lioj pere de la helpemaj manoj de multaj ĉinaj amikoj. La ĝojo por Salum estis eksteratenda, kaj li petis la ĉinajn teknikistojn transdoni lian koran dankon al la granda gvidanto Prezidanto Maŭ.

Salum diris: "Mi zorge gardos tiun ĉi artefaritan gambon kiel mian veran, ĉar ĝi estas donacita de la ĉina popolo, kiu estas sub la gvido de Prezidanto Maŭ."

Salum, filo de kamparano, havas 32 jarojn. Kiam li estis trijara, li havis antrakson en la dekstra piedo, kaj poste lia dekstra kruro devis esti amputita pro fuŝa kuracado fare de angla kuracisto. Li tiel fariĝis kriplulo. Sub la koloniisma regado, la kripleco portis al li grandan malfeliĉon kaj longa senlaboreco suferegis lin. Ĉiufoje, parolante pri la malfeliĉa okazaĵo, li ne povas reteni sian grandan indignon kontraŭ la abomeninda koloniismo.

Antaŭ kvar jaroj la zanzibara popolo forpelis el sia patrolando la koloniistojn. Salum trovis laboron en traktora stacio. Kiom li sopiris havi artefaritan gambon por pli multe labori por sia popolo!

PROFUNDA ZORGEMO

En marto, pasintjare, nombro da ĉinaj teknikistoj, kiuj laboras en Zanzibaro por helpi la starigon de riparejo de agrikulturaj instrumentoj, venis al la traktora stacio por kontroli kaj ripari traktorojn. En kuna laborado ili starigis intiman amikecon kun Salum kaj samtempe eksciis lian multjaran deziron, por kies efektivigo li soife atendis helpon de ĉinaj amikoj.

En tiu tempo la ĉinaj teknikistoj estis ŝarĝitaj de la peza tasko de preparado de la starigo de la riparejo kaj trejnado de traktoristoj por Zanzibaro. Tamen, laŭ la instruo de Prezidanto Maŭ **"zorgu la amasojn kaj helpu ilin solvi malfacilojn"**, ili diskutis la deziron de Salum en sia grupa kunsido, kaj unuanime konkludis, ke ili devas zorgi tiun zanzibaran amikon por forigi lian suferon kaj helpi lin solvi tiun malfacilon.

Kun varma koro ili skribis al sia supera instanco en Pekino, ke ili pretas ŝpari siajn elspezojn por mendi artefaritan gambon el Ĉinio por tiu afrika klasa frato. Tiu iniciato ricevis aprobon de la supera instanco, kiu tuj transsendis la leteron al la Ŝanhaja Fabriko de Artefaritaj Membroj.

VARMA SUBTENO DE LA ĈINA LABORISTA KLASO

La revoluciaj laboristoj kaj oficistoj de tiu fabriko, kiuj troviĝis en la alta tajdo de la granda proletara kultura revolucio, rigardis la taskon kiel sian internaciisman devon al la afrika frato. Por alfari artefaritan gambon estas necese ĝenerale, ke kriplulo persone iru al la fabriko por mezuri, modelpreni kaj provadi. Sed la afrika amiko estas fore trans sennombraj montoj kaj maroj. Tial ili skribis pri la postuloj koncernantaj mezuradon kaj modelprenadon kaj sendis konsildonajn materialojn al Zanzibaro.

Tre ĝojis la ĉinaj teknikistoj en Zanzibaro, kiam ili ricevis la varman leteron kaj alsenditajn materialojn. Sed malfacila estis por ili la tasko



Tre Bona Libro

Karaj amikoj:

Mi bone ricevis vian leteron de la 24-a de aŭgusto kaj ankaŭ du numerojn de via bonega revuo *El Popola Ĉinio*. Tre kore mi dankas vin pro via bonvolo al mi.

Kun granda intereso mi nun tralegis la libron de via ŝatata Prezidanto Maŭ *Vortoj de Prezidanto Maŭ Zedong*. Estas tre bona libro, kie la subpremata proletaro en la tuta mondo povas ĉerpi instruitecon por sia liberiga batalo kontraŭ ĉiu burĝa kaj imperiista subpremanto.

Mi ankaŭ legis pri la sukceso, ke la ĉina popolo nun povas konstrui kaj eksplodigi hidrogenajn bombojn por sia defendo kontraŭ la imperiista rabistaro. Tre bone estas, ke via popolo posedas tian rimedon por "regali" la usonajn kaj aliajn imperiistajn diablojn, se ili kuraĝus ataki vian landon. Tio donas esperon kaj kuraĝigon al ĉiu subpremato en la mondo.

K.J.
Svedio

plenumi la pli ol dudek punktojn en rigore ekzakta mezurado de la stumpo de la amputita gambo kaj preni gipsan modelon. Ĝuste en tiu momento, la Kuraca Grupo de Ĉinio laboranta en Zanzibaro fervore donis sian helpon. Ili plenumis la tutan taskon kaj sendis la gipsan modelon al Ŝanhajo pere de ĉinaj kamaradoj, kiuj revenis al la patrolando.

La revoluciaj laboristoj kaj oficistoj de la Ŝanhaja Fabriko de Artefaritaj Membroj post detala studo pri la gipsa modelo kaj aldonita desegno, fine elfaris artefaritan gambon longan je pli ol du futoj per plej bonkvalitaj materialoj kaj lakitan en koloro simila al la haŭto de afrikanoj. Ĝin oni sendis unue al Pekino, kaj de tie ĝin kunportis al Zanzibaro ĉinaj kamaradoj, kiuj iris al tiu lando. En la pakaĵo estis aldonita ankaŭ letero, per kiu la laboristoj de la fabriko de artefaritaj membroj esprimis sian varman saluton al la uzonto.

Salum, kiu malfacile travivis pli ol dudek jarojn kun helpo de lambastono, nun jam komencis novan laboran vivon kun tiu artefarita gambo. Li scias, ke tiu ĉi neordinara donacaĵo malfacile alvenigita simbolas profundan amikecon de la ĉina popolo al la afrikaj fratoj. Li konservos tiun amikecon por ĉiam en la koro.

Kun ĝojo kaj emocio, Salum surportas la artefaritan gambon venigitan el Ŝanhajo de trans miloj de kilometroj kun la profunda frateco de la ĉina popolo al la afrika.





Studi por la Revolucio

Al P. J.
Kara amiko,

El via letero mi informiĝis, ke vi nun studas la penson de Maŭ Zedong kaj konigas viajn lernitaĵojn al viaj amikoj. El tio ni vidas, kiel varme vi amas Prezidanton Maŭ, la grandan gvidanton de la ĉina popolo kaj la revolucia popolo de la tuta mondo, kiel diligente vi studas lian penson, kaj kiel vi amas la revolucian veron kaj dediĉas vin al ĝi. Pro tio ni esprimas al vi nian altan estimon!

Ni bone komprenas vian brulantan deziron, ke ni prezentu al vi spertojn de la ĉina popolo pri kreiva studo kaj kreiva apliko de verkoj de Prezidanto Maŭ por helpi vin en via studo. Efektive, la vastaj amasoj de laboristoj, kamparanoj kaj soldatoj de nia lando havas riĉajn spertojn tiurilate. Ĉi-sube ni prezentas al vi la sperton de kamarado Liaŭ Ĉugiang, aktivulo en studo de verkoj de Prezidanto Maŭ el la Ĉina Popola Liberiga Armeo. Li ja kreive studas kaj kreive aplikas verkojn de Prezidanto Maŭ por la revolucio. Tiu lia celo estas tute klara. En tiu ĉi mallonga respondo ni citos nur kelkajn ekzemplojn por konigi al vi, kiel Liaŭ Ĉugiang starigis en si la penson de studado por la revolucio.

Liaŭ Ĉugiang devenas de tre mizera familio. El la ok membroj de lia familio, kvin forpereis en la malnova socio. Nur post la Liberiĝo lia familio suprenturniĝis kaj ekhavis feliĉan vivon. Li senlime amas Prezidanton Maŭ kaj la Komunistan Partion de Ĉinio kaj havas decidon fari revolucion dum la tuta vivo sekvante Prezidanton Maŭ. Sed, antaŭ lia aliĝo al PLA, li ankoraŭ ne povis klare kompreni la kaŭzon de sia mizero en la malnova socio. En lia cerbo, tiam estis nesolvita la demando: Kial la malriĉuloj estis tiel mizeraj, dum la riĉuloj tiel riĉaj en la malnova socio? Kial la bienuloj estis tiel kruelaj, kaj la japanaj imperiistoj tiel ferocaj? Li eĉ kredis ke ĉio ĉi tio estas destinita de la sorto.

Post kiam li eniris en PLA, grandan lernejon, li unue studis la brilan verkon de Prezidanto Maŭ *Analizo de la Klasoj en la Ĉina Socio*. En tiu ĉi verko Prezidanto Maŭ montris en la unuaj frazoj: **"Kiuj estas niaj malamikoj? Kiuj estas niaj amikoj? Tio estas demando kun primara graveco por la revolucio."** La instruo de Prezidanto Maŭ komprenigis al Liaŭ Ĉugiang, ke por fari revolucion, antaŭ ĉio, estas necese solvi la gravan principan problemon distingi kiuj estas la malamikoj, niaj kamaradoj aŭ la amikoj. En la artikolo, Prezidanto Maŭ faris poste analizon al la ekonomia situacio de ĉiuj klasoj de la ĉina socio kaj ilia sinteno al revolucio. Li montris: **"... niaj malamikoj estas ĉiuj kiuj estas en ligo kun imperiismo — la militaristoj, burokratoj, kompradora kaj grandbienula klasoj kaj la reakcia sektoro de la intelektuloj de ili dependantaj. La gvida forto de nia revolucio estas la industria proletaro. Ĉiuj duonproletoj kaj etburĝoj estas niaj plej proksimaj amikoj. Rilate al la ŝanceliĝema mezburĝaro, ĝia dekstra alo povas fariĝi nia malamiko kaj ĝia maldekstra alo nia amiko..."** Ju pli legis Liaŭ Ĉugiang, des pli klariĝis lia menso, kaj la demando fine estis solvita: Tion kaŭzis tute ne la destino de la sorto sed la ekzisto de klasoj kaj klasa subpremado, ke la malriĉuloj estis tretataj en la malnova socio. Imperiismo, feŭdismo kaj burokrata kapitalismo ja estis tri grandaj montoj pezantaj sur la dorso de la ĉina popolo. Estis Prezidanto Maŭ, kiu gvidis la ĉinan popolon renversi tiujn tri montegojn kaj tiel liberigi sin. Ju pli li studis, des pli li konvinkiĝis, ke "la verkoj de Prezidanto Maŭ ja estas libroj, kiuj estas destinitaj al la malriĉuloj por fari revolucion, kaj por fari revolucion estas nepre necese studi verkojn de Prezidanto Maŭ."

El sia persona sperto en klasbatalo, Liaŭ Ĉugiang pli profunde konvinkiĝis, ke nur dank' al studo de verkoj de Prezidanto Maŭ, oni povas scii kiel revolucii. Somere de 1957, la burĝaraj dekstruloj lanĉis atakon kontraŭ la Partio, dirante ke "La nuntempo ne estas tiom bona kiel la pasinteco". Rememorante la amaron de la laboranta popolo en la malnova socio kaj pripensante la feliĉon en la nova socio, Liaŭ Ĉugiang sentis en si grandan indignon pro la mensogoj kaj kalumnioj faritaj de la dekstruloj. Tamen en la kunveno por akuzi la dekstrulojn, li ne povis bone rezoni por refuti ilin kaj diris nur: "La dekstruloj estas blinduloj. Ili ne havas konsciencon sed nur koron de lupo kaj pulmon de hundo." Tiam li profunde sentis, ke por esti revolucia batalanto ne sufiĉas sole la kapablo pafi, sed necesas ankaŭ bone studi verkojn de Prezidanto Maŭ kaj posedi la penson de Maŭ Zedong, kaj nur tiam li povos faligi la malamikon komplete. Ekde tiam li ankoraŭ pli aktive studas verkojn de Prezidanto Maŭ.

En studado Liaŭ Ĉugiang plie komprenis ke "armi la cerbon per

Iom pri la Eduka Revolucio en Tonggi-universitato

TONGGI-UNIVERSITATO de Ŝanhajo estas sinteza politekniko pri konstruado, arkitekturo kaj konstrua inĝenierado. Antaŭ la granda proletara kultura revolucio, la plenmano da enpartiaj potenctenantoj de la universitato irantaj la kapitalisman vojon lojale praktikis la kontraŭrevolucian reviziisman linion de edukado kaj lasis "profesorojn mastrumi la universitaton". Multaj burĝaraj reakciaj akademiaj "aŭtoritatuloj" kaj ne sufiĉe remulditaj burĝaraj intelektuloj uzurpis ĝiajn gvidajn postenojn, senskrupule kolportis nigrajn varojn de feŭdismo, kapitalismo kaj reviziismo, distrumpetis al la junaj studentoj pri renomĉasado por ilin veneni kaj degenerigi tiamaniere.

La 7-an de majo en 1966, nia granda gvidanto Prezidanto Maŭ instrukciis dirante: **"Tiel same estas ankaŭ por la lernantoj. Kun lernado kiel sia ĉefa tasko, ili devas samtempe lerni ankaŭ aliajn aferojn, tio estas, aldone al siaj lernejaj studoj, ili devas lerni ankaŭ industriajn, agrikulturajn kaj militajn aferojn. Ili devas ankaŭ kritiki la burĝaron. La lernotempo devas esti mallongigita, revolucio devas esti farita en edukado, kaj la regado de burĝaraj intelektuloj super niaj lernejoj nepre ne devas daŭri plue."**

Laŭ la spirito de la instrukcio de Prezidanto Maŭ, la revoluciaj instruistoj kaj studentoj de Tonggi-universitato forte atakis la reviziisman edukan linion. Ili sendis pli ol cent homojn en formo de enkettaĉmentoj al diversaj fabrikoj kaj konstruejoj por fari esploron pri pedagogia reformo kaj faris kuraĝajn supozojn pri novigo de la lerneja sistemo.

Ili elmetis la rudimentan projekton por reformi Tonggi-universitaton en Maj-sepan Komunumon: La komunumo estos kombinaĵo el la triopo de instruado, konstruado kaj projektado. Per tio oni likvidos la fenomenon estigitan de la malnova eduka sistemo, ke eduko apartiĝas de la proletara politiko, de la realo kaj de la amasoj, kaj certigos, ke povo pri edukado estu firme tenata en la manoj de la proletaraj revoluciuloj.

Elmetinte tiun projekton, ili ĝin metis en praktikon por ekzameni kaj riĉigi, kaj jam akiris unuajn sukcesojn.

La revoluciaj instruistoj kaj studentoj de la dua- kaj tria-jaraj klasoj pri akvoprovizado kaj drenado en la fakultato de urba konstruado, iris en olerafinejon kaj akvoprovizan centralon, vivis, laboris, kompilis novajn lernolibrojn, donis lecionojn kaj kritikis la burĝaron kune kun la laboristoj. La studentoj ligiĝis kun la laboristoj kaj lernis de ili en praktiko. Foje, laboristoj kritikis la antaŭajn projektistojn dirante, ke tiuj estis homoj "kun

---

la penso de Maŭ Zedong estas fundamenta garantio por bone fari ĉiujn laborojn." Kiam li aliĝis al PLA, li deziris fariĝi tankisto, ĉar li pensis, ke kiel tankisto li povos ne nur defendi patrolandon, sed ankaŭ partopreni la konstruadon de la patrolando kiel traktoristo post militservo. Sed, li estis asignita servi kiel infanteriano. Pro tio li havis tuberon en sia penso, kaj do ankaŭ la trejna rezulto ne estis tre bona ĉe li. Sub la helpo de la kamaradoj, li ripetade studis la brilajn verkojn de Prezidanto Maŭ *Servu al la Popolo* kaj *Memore al Norman Bethune*. Li pensis en si: kiel fremdulo, Bethune vojaĝis al Ĉinio malgraŭ la distanco de miloj da mejloj por helpi la ĉinan popolon batali kontraŭ la japanaj agresantoj kaj laboris tutanime kaj diligente, ĝis li oferis sian vivon. Estas hontinde, ke li kiel ĉino en juna aĝo, kiu aliĝis al PLA por defendi patrolandon, ankoraŭ konsideras personajn interesojn. Samtempe li pensis pri la revoluciaj antaŭuloj, kiuj verŝis sian sangon kaj oferis sian vivon por la revolucio kaj konkludis ke ili estas ja por li imitinda modelo. Tial li firme decidis diligente legi la librojn de Prezidanto Maŭ, ĝisfunde reformi sian mondkoncepton, fariĝi homo utila al la popolo kaj "fari ĉion, kion postulas la Partio".

Kiam Liaŭ Ĉugiang fariĝis politika direktanto de la roto, li estis tre okupita. Li ne nur mem studis verkojn de Prezidanto Maŭ, sed ankaŭ devis organizi la tutan roton por tio. Iufoje la roto faris ekzercon de longa marŝo preskaŭ je cent kilometroj. Kiam ili atingis kampadejon, jam estis noktmezo. Kvankam Liaŭ Ĉugiang sentis sin tre laca kaj dormema, tamen li ekkuŝis nur post finstudo de la verko de Prezidanto Maŭ *Pri la Popola Demokratia Diktaturo* kaj faro de skizo de parolo por propagandi al batalantoj tiun ĉi brilan verkon. Laŭ la instruo de Prezidanto Maŭ **"tutkore kaj tutanime servi al la popolo"**, Liaŭ Ĉugiang daŭre tenas en si la naturon de ordinara batalanto, post kiam li fariĝis kadro. Al produktaj brigadoj, kiuj troviĝas proksimaj al la garnizonejo de la trupo kaj havas



Lekcio donata sub libera ĉielo al gestudentoj de la Fako de Cementaj Produktoj de la Konstrumateriala Fakultato.

ledteko en unu mano, ombrelo en la alia kaj ledŝuoj sur la piedoj". Tiuj arbitre projektadis en sia oficejo post fermita pordo frapetante al si la kapon, spitante la opiniojn de la laboristoj garantiis pri ĉio dum la konstruado frapante al si la bruston kaj forglitis frapante al si la postaĵon post la konstruado tute sen zorgo pri la kvalito de la laboro. Aŭdinte la kritikon kontraŭ tiuj, la revoluciaj instruistoj kaj studentoj akiris pli bonan konon pri la burĝara ideologio en sia kapo kaj decidis likvidi sian fieran sintenon, esti humilaj lernantoj de la laboristaro, lerni de ĝi la altan respondecemon al la popola afero kaj remuldi sin en proletarajn intelektulojn ekskluzive kaj senrezerve servantajn al la popolo.

La revoluciaj instruistoj kaj studentoj de la fako pri centrala hejtado kaj ventolado de la fakultato pri elektraj kaj mekanikaj ekipaĵoj trovis, dum sia esplorado en fabriko, ke urĝe solvendaj problemoj ekzistas koncerne la senpolvigon, malaltigon de temperaturo, ventoladon k. a. en la laborejoj. Sed en la pasinteco, la burĝaraj reakciaj akademiaj "aŭtoritatuloj" ĉiamaniere kondukis la studentojn al la t. n. "plej progresinta" aerreguligo,

---

malpli bonajn kondiĉojn, Liaŭ Ĉugiang ofte alkondukas la batalantojn por doni helpon. En laborado li konkursas kun la batalantoj kaj plenenergie laboras eĉ kiam aperas sangaj vezikoj sur liaj manoj. En trajno li helpas vagonajn servistojn en balaado kaj alportado de akvo, kaj dum en- kaj el-vagoniĝo li helpas pasaĝerojn en portado de infanoj kaj pakaĵoj. Krome li preparas manĝaĵojn kaj reformas fornon por ŝpari karbon kune kun kuiristoj. Li plenkore faras ĉion, kio estas utila al la revolucio, tute egale, ĉu ĝi estas afero granda aŭ malgranda, kaj ĉu ĝi estas lia devo aŭ ne.

Ĉar Liaŭ Ĉugiang vere starigis al si klaran celon studi por la revolucio kaj laboro, li studas kun bonaj rezultoj kaj progresas rapide, tiel ke li kreskis en mallonga tempo el ordinara juna batalanto en elstaran politikan direktanton de la roto kaj fariĝis la ruĝa standardo de la tuta armeo en kreiva studo kaj kreiva apliko de verkoj de Prezidanto Maŭ.


Kara amiko, nun la vastaj amasoj de laboristoj, kamparanoj kaj soldatoj de nia lando aktive penas studi verkojn de Prezidanto Maŭ por la revolucio, prenante Liaŭ Ĉugiang kaj aliajn progresemajn personojn kiel modelojn en kreiva studo kaj kreiva apliko de verkoj de Prezidanto Maŭ. En la senprecedenca, granda proletara kultura revolucio, ili antaŭenpuŝas la amasan movadon de kreiva studo kaj kreiva apliko de verkoj de Prezidanto Maŭ al tute nova etapo. Nun en la kamparo, fabrikoj, institucioj kaj lernejoj tra la tuta lando, oni ĉie establas studrondojn de la penso de Maŭ Zedong, la penso de Maŭ Zedong estas disvastigata en senprecedenca granda skalo, kaj la tuta lando jam fariĝis granda lernejo por kreive studi kaj kreive apliki verkojn de Prezidanto Maŭ.

Kara amiko, permesu al mi fini ĉi tie mian nunan skribon.

Mi deziras al vi bonan progreson en via studado.

Amike via,
Ĝong Vej

Kune kun laboristoj en konstruejo profesoroj kaj studentoj de la Arkitektura Fakultato faras samtempe studojn kaj reformojn.



gvidante la studon pri centrala hejtado kaj ventolado sur la herezan vojon reviziisman. Pro la misgvido de la burĝaraj akademiaj "aŭtoritatuloj", iu studento de la kvinajara klaso de la fako pri centrala hejtado kaj ventolado ĉiam opiniis, ke lia fako servas al "alta, preciza, pinta" tekniko, kvankam lia onklo suferis de silika pulmo. Per la esploro li trovis, ke la laboristoj urĝe bezonas solvi la problemon de senpolvigo kaj ventolado. Li sentis doloron en la koro, ke li nenion sciis pri la suferoj de la laboristoj, kvankam li studis la teknikon de ventolado kaj centrala hejtado. Li forte ekindignis kontraŭ la burĝaraj akademiaj "aŭtoritatuloj" kiuj krime kondukis la studentojn for de la laboristoj kaj kamparanoj al ĉasado de renomo kaj profito. Esplorinte pri la pontoj en la kamparo de Baŭŝan, studentoj de la ponta fako de la fakultato pri vojoj kaj pontoj vidis, ke tio kion la kamparanoj urĝe bezonas ne estas pontoj kelkcent metrojn longaj, pri kiuj distrumpetis la burĝaraj reakciaj akademiaj "aŭtoritatuloj", sed konstrui kaj ripari ordinarajn pontojn. Dank' al la esplorado, la revoluciaj instruistoj kaj studentoj pli bone komprenis la gravan signifon, ke eduko nepre devas servi al la proletara politiko kaj kombiniĝi kun produktado kaj laboro, kaj elmetis utilajn aranĝojn por perfektigi la projekton de eduka revolucio.

Dum la esplorado, ili ankaŭ klopodis laŭplane kaj paŝpostpaŝe altigi la teorian scion de la laboristoj por ke ĉi tiuj partoprenu la vicon de instruistoj. Studentoj kaj instruistoj de la domkonstrua fako de la fakultato pri konstrua inĝenierado kune kun la konstruaj teknikistoj malfermis postlaboran lernejon por laboristoj ĉe konstruejo. Pli ol 30 eminentaj laboristoj de tiu konstruejo jam suriris la instruistan podion, donis vivecajn lecionojn de klasa eduko al la studentoj per rakontoj pri siaj propraj spertoj pri la amara pasinteco kaj la dolĉaj tagoj en la nova socio, transdonante al la juna generacio siajn riĉajn sciojn akumulitajn en praktikado dum produkta batalado kaj scienca eksperimentado. Prenante la grandan aferon de eduka revolucio kiel plenumendan devon de la laboristaro multaj laboristoj iniciative elmetis multajn valorajn opiniojn pri instruaj planoj kaj metodoj. Sub la helpo de instruistoj ili sistemigis siajn praktikajn spertojn kaj pretigis instruajn projektojn kun zorgemo. Ili diris varme: "Ja estas devo de ni laboristaro elkulturi daŭrigantojn de la revolucio."

La revoluciaj instruistoj kaj studentoj de Tonggi-universitato nun brave marŝas antaŭen sur la larĝa vojo de la proletara eduka revolucio montrita de Prezidanto Maŭ!

Frakaso de la Okjara Sistemo

Revoluciaj studentoj de la sepa klaso de la Ĉina Medicina Universitato

EN la jaro 1966, la granda gvidanto Prezidanto Maŭ montris: **"La lernotempo devas esti mallongigita, la edukado devas esti revoluciigita, kaj ne devas daŭri plu la stato, ke intelektuloj de la burĝaro regas en niaj lernejoj."** Sed, por kulturi daŭrigantojn de la afero de la burĝaro, la plenmano da plej grandaj enpartiaj potenctenantoj irantaj la kapitalisman vojon energie distrumpetis pri sistemo de longa lernotempo, multa legado kaj "alta kvalito". La ĉina Ĥruŝĉov diris: "Oni povas starigi speciale unu aŭ du universitatojn por aparte eduki elstarajn studentojn." "La lernotempo devas esti difinita laŭ la bezono, kaj, ĉiuokaze, la kvalito ne devas esti malalta." La tiel nomata "turpinto" elbakita sub tia gvidpenso, la Ĉina Medicina Universitato fariĝis tipa lernejo de la ĉina Ĥruŝĉov por detrui junajn talentojn.

Ĝia lernotempo daŭras ok jarojn. Tio estas tre malofta eĉ en multaj kapitalismaj landoj. De elementa lernejo ĝis finstudo en la Ĉina Medicina Universitato oni bezonas dudek jarojn. Fininte la studadon, la studentoj jam estas proksimaj al la aĝo de 30 jaroj. La tiom valora juneco de la homa vivo, en kiu la homo estas plej plena de energio kaj plej vigla en pensado, estas foruzita por studi la tiel nomatajn teoriajn konojn, fermite tuttage en lernoĉambro kaj sin izolinte de la laboranta popolo. Kiel la studentoj elkulturitaj per tia metodo povas kontentigi la bezonojn de la laboranta popolo? Kiel povas ne naskiĝi el tio reviziistoj?

Prezidanto Maŭ instruas al ni: **"Manko de ĝustaj vidpunktoj politikaj egalas al manko de animo."** Sed, la plenmano da enpartiaj potenctenantoj irantaj la kapitalisman vojon en la universitato ne disvolvis la movadon por studi verkojn de Prezidanto Maŭ, ne donis atenton al ideolcgia eduko kaj forpuŝis la proletaran politikon per pezaj fakaj studoj, tiel ke la studentoj tre malmulte partoprenis politikajn movadojn. Iuj studentoj estis venenitaj de la ĉina Ĥruŝĉov, ke iliaj oreloj aŭdis nenion pri aferoj ekster ilia ĉambro kaj donis la tutan animon al legado de fakaj libroj. La proletara politiko, la sorto de la patrolando kaj la estonteco de la homaro — ĉio tia estis forjetita ekster la mondon.

La plenmano da enpartiaj potenctenantoj irantaj la kapitalisman vojon kaj la burĝaraj intelektuloj en la universitato praktikis diktaturon super la studentoj kaj aplikis altpreman politikon al ili en ilia studado. Por tiu universitato estis maloftaĵo, ke studentoj ne faras noktan studadon. La burĝaraj intelektuloj limigis la studentojn en la kampo de fakaj studoj per poentoj. La studentoj ofte estis urĝemaj eĉ dum manĝoj pro la pezaj taskoj. Ĝia centpoenta sistemo estas precizigita ĝis dua cifero post punkto, kaj por tio eĉ kalkulmaŝino estis uzata. Ilia celo estis fari la studentojn sklavoj de poentoj kaj libroj kaj daŭrigantoj de la afero de la burĝaro. En la ok longaj jaroj, la studentoj studis multajn tiel nomatajn "vastajn kaj bazajn konojn de naturscienco", kiuj neniom koncernas medicinon kaj baldaŭ estis tute forgesitaj.

En la universitato, la tasko por la studentoj estis treege peza, kaj samtempe la universitato ekstreme neglektis la sportan aktivadon kaj ne establis por ĝi specialan sekcion. Kaj la malgranda sportejo estis konstruita de la studentoj mem dum ferio post ripetada postulo.

"Neglekto de eduko pri la proletara moralo, elstarigo de intelekta eduko de la burĝaro kaj foresto de elementa korpoeduko", jen estas opinio de la revoluciaj studentoj pri la okjara sistemo de tiu universitato. La Deksespunkta Decido montris: "Reformo de la malnova eduka sistemo kaj reformo de la malnovaj principoj kaj metodoj de instruado estas ekstreme grava tasko de la granda proletara kultura revolucio." Estas necese ĝisfunde kritiki kaj reformi tiun okjaran sistemon, kiu detruas diversflanke junajn studentojn!

Iru al la Kamparo

Taĉmento por Instruo kaj Lerno de la Kvara Klaso de la Ĉina Medicina Universitato

Delonge, la ĉina Ĥruŝĉov obstine oponis la grandan alvokon de nia granda gvidanto Prezidanto Maŭ pri translokigo de gravita punkto de la medicina kaj sanprotekta laboro al la kamparo. Sub la preteksto, ke oni unue "devas bone fari en urboj la medicinan kaj sanprotektan laboron" kaj nur tiel povos "solvi la problemon turni la sanprotektan laboron al la kamparo", li kontraŭstaris la servigon de la medicina kaj sanprotekta laboro al la kamparanaro, kiu okupas absolutan plejmulton de la tuta loĝantaro de nia lando. Etendante sian nigran manon en la sferon de medicina eduko, li ĉiarimede malhelpis la studentojn suriri la vojon de kombino de intelektuloj kun laboristoj kaj kamparanoj. La Ĉina Medicina Universitato kun okjara lernotempo estas ĝuste tipo por elbaki burĝarajn intelektulojn servantajn nur por malplimulto en urboj. Observante la dekreton de la ĉina Ĥruŝĉov, la plenmano da enpartiaj potenctenantoj irantaj la kapitalisman vojon en nia universitato beligis la absurdaĵon de servado nur por urboj sed ne por kamparo per tia tualeto "nerekta servado al la 500-miliona kamparanaro".

Sub la direktado de tia "teorio", la instrua metodo de nia universitato celis elkulturi kuracistojn nur por urbaj hospitalegoj. Ĝi tute ignoris la oftajn malsanojn en la kamparo sed plenenergie strebis al la t. n. "medicina modernigo". La kuracarto lernita de la studentoj taŭgas nur por grandaj hospitaloj en urbegoj sed ne estas aplikebla en kamparo. Krome, la kamparanoj tute ne ŝatas la skolastikan ekzamenon kaj burĝaran kuracmanieron. Tiaj kuracistoj povas esti titolitaj nur "laboratoriaj kuracistoj", "kuracistoj dependantaj de X-radio" aŭ "kuracistoj en teorio".

Sub la direktado de tia "teorio", la universitato plenenergie praktikis la principojn "meti intelektan edukadon" kaj "fremdajn lingvojn super ĉiuj aliaj lernoobjektoj". Ĝi forpuŝis proletaran politikon en ĉiuj sferoj, apartigis la studentojn for de la tri grandaj revoluciaj movadoj (t. e., la klasbatalo, la porprodukta batalo kaj la scienca eksperimento) kaj lasis la burĝarajn intelektulojn libere korupti la junulojn por ŝanĝi ilin en idojn de reviziismo.

Sub la direktado de tia "teorio", ekde la fondiĝo de la universitato, neniu diplomito estas asignita al la kamparo. Revoluciaj studentoj montris sian volon iri al la kamparo por servi la 500-milionan kamparanaron, sed la plenmano da enpartiaj potenctenantoj irantaj la kapitalisman vojon en nia universitato insultis ilin kiel senidealulojn, dirante: "Ĉu ni kulturis vin ok jarojn nur por ke vi iru al la kamparo?" Krome ili ankaŭ devigis la studentojn legi la nigran *Memkulturon* kaj ĉiarimede apartigis ilin de la vastaj amasoj de laboranta popolo, kiu nutras ilin.

En analizo ĝis la fino, la teorio pri "nerekta servado al la 500-miliona kamparanaro" estas esence tiu pri "rekta servado al la burĝaro", kaj la teorio "unue por la urboj kaj poste por la kamparo" signifas rifuzon de servado al la malriĉkamparanoj kaj malsuperaj mezkamparanoj. Flirtigante sian reviziisman flagon, ili intencis bredi aron da burĝaraj intelektaj aristokratoj por servigi ĝin al la plenmano da plej grandaj enpartiaj potenctenantoj irantaj la kapitalisman vojon por restaŭro de kapitalismo en Ĉinio.



Prezidanto Maŭ instruas nin: **"La problemo al kiuj servi estas problemo fundamenta, problemo de principo."** Al la diabloj la teorio de "nerekta servado"! Kun firma decido, ni nepre iru al la kamparo longtempe, senkondiĉe, tutkore kaj plenanime por **"senrezerve"** kaj **"ekskluzive"** servi al la vastaj amasoj de malriĉkamparanoj kaj malsuperaj mezkamparanoj.

Centjara Jubileo de la Naskiĝo de D-ro W. E. B. Du Bois

LA Konstanta Buroo de Aziaj kaj Afrikaj Verkistoj okazigis kunvenon en Pekino por festi la ĉentan datrevenon de la naskiĝtago de D-ro W.E.B.Du Bois.

La kunvenon partoprenis vicĉefministro de la Ŝtata Konsilantaro Ĉen Ji kaj vicprezidanto de la Konstanta Komitato de la Tutlanda Kongreso de Popolaj Reprezentantoj Guo Moĵuo k.a.

La kunvenon ĉeestis ankaŭ s-rino Shirley Graham Du Bois, la ĝenerala sekretario de la Konstanta Buroo de Aziaj kaj Afrikaj Verkistoj Rathe Deshapriya Senanayake, la reprezentantoj de membroj-landoj de la nomita buroo Ahmed Mohammed Kheir de Sudano, Kinkazu Saionĝi de Japanio kaj Afif de Indonezio, la ĝenerala sekretario de Azi-Afrika Ĵurnalista Asocio Djawoto, gvidanto de usonaj nigruloj Robert Williams kaj reprezentantoj de internaciaj organizoj kaj naciliberigaj organizoj, troviĝantaj en Pekino.

En sia kondolenca telegramo al s-rino Du Bois en aŭgusto de 1963, nia granda gvidanto Prezidanto Maŭ diris: **"D-ro Du Bois estis granda homo de nia tempo. Liaj faroj en heroa batalo por la liberigo de la nigruloj kaj la tuta homaro, liaj elstaraj atingoj en sciencaj kampoj kaj lia sincera amikeco al la ĉina popolo restos por ĉiam en la memoro de la ĉina popolo."**

La diverslandaj amikoj ĉeestintaj la kunvenon rememoris tiun ĉi takson de Prezidanto Maŭ pri D-ro Du Bois.

D-ro Du Bois estis fama gvidanto de la usonaj nigruloj, kontraŭimperiisma batalanto, verkisto kaj instruitulo. Lia tuta vivo estis vivo de batalo. Li firme kaj heroe batalis por la libereco, egaleco kaj emancipiĝo de la usonaj nigruloj. En 1959, kiam D-ro Du Bois aĝis 91 jarojn, li vizitis Ĉinion trans maroj, kaj estis honore akceptita de la granda gvidanto Prezidanto Maŭ. Kvazaŭ plantaĵoj ricevintaj pluvon kaj roson, el la vivo de D-ro Du Bois elradiis de tiam nova brilo, kaj li decidis sin dediĉi en siaj lastaj jaroj al la afero de kompleta liberigo de la tuta homaro kaj suriris la vojon de batalo por komunismo. Li diligente studis la verkojn de Prezidanto Maŭ. Kaj en sia parolado li energie vokis al la afrika popolo: "Leviĝu, Afriko, vizaĝe al la leviĝanta suno!" "Ĉinio estas karno de via karno kaj sango de via sango."

K-do Guo Moĵuo faris paroladon en la kunveno. Li diris, ke la batalo de la usonaj subpremataj nigruloj venke antaŭenmarŝas hodiaŭ sub la brilo de la penso de Maŭ Zedong. Ni devas kontinue disvolvi la nesubigeblan spiriton de D-ro Du Bois en la revolucia batalo kontraŭ imperiismo kaj unuiĝi kun la usonaj nigruloj kaj ĉiuj subpremataj nacioj kaj popoloj por forigi imperiismon estratan de Usono kaj novan kaj malnovan koloniismojn.

Li daŭrigis, ke la *Deklaro por Subteni la Usonajn Nigrulojn en Ilia Justa Batalo kontraŭ Rasdiferencigo de la Usona Imperiismo*, kiun Prezidanto Maŭ publikigis en aŭgusto de 1963, montris kvazaŭ disradianta lampo la vojon de liberigo por la usonaj nigruloj kaj ĉiuj subpremataj popoloj, kaj provizis teorian armilon por la revolucia batalo de la usonaj nigruloj. Post la publikigo de tiu ĉi granda dokumento, la usonaj nigruloj plikonsciiĝis. Ili disrompis la katenojn de "ne-perforteco" kaj vigle disvolvas armitan batalon kontraŭ la perfortaĵoj de la reakcio. En sia deklaro nia granda gvidanto Prezidanto Maŭ montris: **"La krima koloniisma kaj imperiisma sistemo leviĝis kaj prosperis kun la sklavigo de kaj komerco pri nigruloj, kaj ĝi nepre venos al sia fino kun la kompleta emancipiĝo de la nigra popolo."** Tiu ĉi granda antaŭdiro de Prezidanto Maŭ certe fariĝos brila realo.

En sia parolado, s-rino Du Bois prezentis la vivon de D-ro Du Bois. Kaj ŝi ankaŭ rememoris, kiel Prezidanto Maŭ akceptis D-ron Du Bois kaj ŝin dum ilia vizito al Ĉinio. Ŝi diris, ke en Ĉinio li vidis la ruĝan sunon leviĝantan en oriento kaj trovis la veron, kio revigligis lian junecon por daŭre batali sen malstreĉiĝo por la revolucio.

S-rino Du Bois diris: "En la tago kiam ni celebras la centan datrevenon de la naskiĝtago de D-ro Du Bois, mi salutas al la usonaj nigruloj, kiuj kun la slogano 'Nigra Forto' movas la proletaran amasan movadon de Usono al revolucio." Ŝi daŭrigis, ke la usona agreso estos haltigita de la vekiĝintaj popolamasoj de la mondo, kaj imperiismo estas destinita al morto.

Ŝi diris plie, ke la granda proletara kultura revolucio, armita per la penso de Maŭ Zedong, puŝas hodiaŭ la revolucion al neniam atingita alteco. Tio ĝojigas kaj kuraĝigas ŝin ke oni celebras la datrevenon de la naskiĝo de D-ro Du Bois en la tempo, kiam iras la granda proletara kultura revolucio de Ĉinio. Je la fino, ŝi patose recitis unu el la poemoj de Prezidanto Maŭ, ŝatitaj de Du Bois:

Ne diru ke la iro fruas,
En oriento baldaŭ elrompiĝos jam aŭroro.
Ni restas ne maljunaj trairinte ĉiujn verdajn montojn.
Aparte ravas la pejzaĝ' ĉi tie.
.....

GUO HINGBING:

"Blindulo", "Surdulo" kaj "Frenezulo"

JUN dimanĉon en suda Vjetnamio, la "observaj gardstarantoj" de la usona agresanta armeo proksime de Gon Tien subite "trovis trupon" de la sudvjetnama liberiga armeo "kun ne tre multaj anoj". Tial la "marinfanterio" haste "sendis du rotojn por postkuri ĝin". Ili tute ne imagis, ke "tiu trupo nur servis kiel logilo por grandskala embusko". Sekve katastrofo falis sur ilin: "Unu roto de la marinfanterio trafis embuskon kaj estis tranĉita en tri partojn kaj fakte ekstermita; ankaŭ multaj el la alia roto estis mortigitaj kaj vunditaj."

Jen estas konciza priskribo pri la ekstermo de parto de la usona armeo agresanta Vjetnamion fare de raportisto el *Associated Press* antaŭ nelonge. Tio estas nur tre ordinara ekzemplo el la miloj da bataloj sur la batalkampo de suda Vjetnamio.

Sur la batalkampo en suda Vjetnamio la usonaj banditoj ĉiam kun pli kaj pli granda malfacileco baraktas en la maro de la popola milito. La reakciaj gazetoj de Usono senrimede lamentis pri tio, ke la popolaj armitaj fortoj de suda Vjetnamio "kunordigas la militajn agadojn" sur la tuta batalkampo kaj povas "translokigi la usonajn trupojn laŭ sia plaĉo", dum la usona agresanta armeo "estas devigata" nur rondiri "laŭ la 360-grada cirkonferenco" kaj ĉie ricevas batojn. Ili ĉagrenite konfesis, ke "tiu ĉi milito estas tre mistera", "ŝajnas, ke oni pugnoluktas kun rivalo, kiu kaŝas sin malantaŭ la kurteno". Ili multe suferas, sed ili "ne scias, kia aspektas" la rivalo, kaj ilia reatako ofte estas "maltrafa". La supraj asertoj tute spegulas la embarason de la usonaj agresantoj troviĝantaj en senelira situacio.


Traktante la batalan principon de la longdaŭra milito, nia granda gvidanto Prezidanto Maŭ vive kaj figure diris: **"Ni devas fari ĉiun eblon kovri la okulojn kaj ŝtopi la orelojn de la malamikoj, por ke ili fariĝu blinduloj kaj surduloj, kaj ni devas fari ĉiun eblon konfuzi la menson de iliaj komandantoj, por ke ili fariĝu frenezuloj, kaj tiamanitere ni akiru por ni venkon."** La heroa popolo de suda Vjetnamio agas ĝuste laŭ tiu maniero. Ili kreive praktikas la strategion kaj taktikon de la popola milito, moviĝas de iu loko al alia, jen aperas, jen malaperas, firme tenas la iniciativon sur la batalkampo, lerte kaj elaste batalas kun la usonaj agresantoj nomataj la plej "fortaj" en la nuntempo, farante ilin "blindaj", "surdaj" kaj "frenezaj", kaj senĉese akiras venkojn unu post alia. Aliflanke, tuj kiam la usona agresanta armeo surpaŝas la teritorion de suda Vjetnamio, ili sin trovas en la sieĝo de la popolanoj kaj armeanoj de suda Vjetnamio nombrantaj dek kvar milionojn. Ili rigardas kaj aŭskultas sed kaptas nenion, dronas en konfuzo, blinde ĵetas sin tien kaj reen, kaj pasive restas nur batataj. La usonaj banditoj provas savi sin el la senelirejo, tial ili sin turnas al sovaĝa bombado kaj kruela "balaado", sed ju pli ili freneziĝas, des pli grandan malvenkon ili suferas.

Pro sia "blindeco" kaj "surdeco" la usona agresanta armeo intencas apogi sin sur tiuj "sciencaj okuloj kaj oreloj", kiaj "elektrona maŝino", "fotobservado" kaj "ultraruĝa instalaĵo", por kolekti la bezonatajn informojn. Tio plene montras, ke ili jam venis al la fino de sia saĝo kaj trovas sin en ega konsterniĝo. Historio pruvis kaj pruvos, ke la mizera situacio de la usonaj agresantoj ne povas esti ŝanĝita per iu ajn moderna instrumento.

En la majesta, grandioza kaj kolor-riĉa teatraĵo de popola milito sub la direktado de la heroa sud-vjetnama popolo sur la vasta batal-scenejo de suda Vjetnamio, la usona imperiisto ludas la kompatindan rolon de "blindulo", "surdulo" kaj "frenezulo". Se la vjetnama popolo daŭre persistos kaj kondukos longdaŭran militon, estas sendube, ke tiu ĉi teatraĵo finiĝos per la venko de la vjetnama popolo kaj la malvenko de la usona "blindulo", "surdulo" kaj "frenezulo".

Senanayake kondamnis en sia parolado la sovetunian reviziismon kaj ĝiajn sekvantojn, kiuj servas kiel kunkrimuloj de la usona imperiismo, distordas la politikan starpunkton de D-ro Du Bois batali kontraŭ imperiismo kaj koloniismo estrata de Usono kaj ĉiulandaj reakciuloj, kaj intencis prezenti D-ron Du Bois kiel pasivan pacifiston por tiel subfosi la revolucian batalon de la usonaj kaj alilandaj subpremataj popoloj kontraŭ imperiismo. Li diris, ke la Konstanta Buroo de Aziaj kaj Afrikaj Verkistoj alvokas ĉiujn revoluciajn kaj progresemajn usonajn nigrulojn kaj aliajn popolojn al persista batalado kontraŭ imperiismo estrata de Usono, moderna reviziismo kun sovetunia reviziisma gvidanta kliko kiel ĝia centro kaj ĉiuj reakciuloj de la mondo.

La varma amo de Du Bois al la granda gvidanto Prezidanto Maŭ kaj lia batala spirito stimulas ĉiun homon, kaj en la kunveno ĉiuj paroloj vekis varmajn manklakadojn.



JEMENA POPOLO REBATAS LA ARMITAN RENVERSAN AGADON DE LA USONA IMPERIISMO

Dank' al la subtenado kaj kunagado de la vastaj popolamasoj, la jemenaj armitaj fortoj kaj popolaj memdefendaj trupoj denove akiris grandajn venkojn en sia batalo kontraŭ la renversa aktivado farata de la usona imperiismo kaj la reakciularo de Saŭdiarabio kontraŭ la Jemena Respubliko, per armitaj fortoj.

La armitaj fortoj de Jemeno akiris venkojn en la bataloj sur ĉiuj frontoj okcidente kaj sudokcidente de la ĉefurbo Sana. En la komenco de februaro, ili mortigis kaj vundis centojn da malamikaj soldatoj kaj militakiris multe da pafiloj kaj municio fabrikitaj de Usono. Sub la energia apogo de la jemena popolo, ĝiaj armitaj fortoj liberigis la ŝoseon inter Sana kaj Hodeida kaj frakasis la kriman intrigon de la usona imperiismo kaj la saŭdiarabia reakciularo blokadi la urbon Sana per fermo de tiu ŝoseo.

Informiĝinte pri tiu venko, miloj kaj miloj da popolanoj svarmiĝis sur la stratoj por varme festi la venkon. Kiam ĉinaj amikoj esprimis ĝian gratulon al la jemenaj popolanoj, ĉi tiuj ĉirkaŭis la ĉinajn amikojn kun varma koro, firme premis iliajn manojn kaj laŭte kriis kun levitaj brakoj: "Vivu la amikeco inter la jemena kaj ĉina popoloj!" "Vivu Prezidanto Maŭ!" "La usona imperiismo certe malvenkos, kaj Jemeno certe triumfos!" Iu batalanto diris emocie al ĉina ĵurnalisto: "Ĉia ajn malamiko estas venkebla por la jemena popolo, se tiu ĉi nur unuiĝas kaj persistas ĉe batalo."

PLI OL 30 AFRIKAJ LANDOJ BOJKOTAS LA OLIMPIADON

La Plej Alta Sporta Komisiono de Afriko, kiun partoprenis pli ol 30 afrikaj ŝtatoj, decidis bojkoti la 19-an Olimpiadon okazontan en Meksikio en oktobro de la kuranta jaro, por protesti ke la Internacia Olimpia Komitato manipulata de la usona imperiismo malamike sintenas kontraŭ la afrikaj popoloj kaj kontraŭleĝe decidis akcepti kiel partoprenanton al la Olimpiado la Respublikon de Suda Afriko, kiu praktikas rasdiferencigan politikon.

La nepravigebla decido pri akcepto de la Respubliko de Suda Afriko estas farita sub la persona direktado de Avery Brundage, la usona imperiisto kaj prezidanto de Internacia Olimpia Komitato. La decido de la Plej Alta Sporta Komisiono de Afriko estas forta bato al la intrigo de la usona imperiismo, kiu provas subfosi la batalon de la afrikaj landoj kontraŭ la rasismo de la Respubliko de Suda Afriko.

KOLUZIO DE USONO, SOVETUNIO KAJ HINDIO EN MILITAJ AFEROJ

La usona imperiismo, sovetunia reviziismo kaj hinda reakciularo nun faras inter si novan militan koluzion por lanĉi sputnikojn kaj utiligi sputnikojn kiel komunikilon en Hindio. Ĉiuj tiuj intrigoj estas farataj sub la kamuflo de la t. n. "paca utiligo de la spaco".

En novembro de 1963, la usona imperiismo, sovetunia reviziismo kaj hinda reakciularo jam kune starigis la t. n. "ekvatoran raket-lanĉan stacion" en Trombay, Kerala, Hindio kaj faris multajn sekretajn kaj nekonfeseblajn aferojn sub la preteksto de "scienca eksperimentado". En aŭgusto de 1967, raporto en la usona ĵurnalo *Washington Post* malkaŝis la militan celon de tiu fondaĵo, dirante ke ĝi estas utila por la efektivigo de nuklea armado de Hindio.

Vijram Ambalal Sarabhai, prezidanto de la Ŝtata Komitato por Spaca Esplorado de Hindio ellasis la informon, ke oni jam konstruis en Ahmedabad teran stacion por komunikado per sputniko per mono speciale asignita de UNO. Kaj tiu stacio jam havis spacan telekomunikon kun Usono en aŭgusto de la pasinta jaro. Krome, sputnika lanĉstacio estos konstruita sur la marbordo de Andhra de Hindio.

La vera celo de la supre diritaj aktivadoj en Hindio fare de UNO, kiu estas instrumento sub komuna manipulo de la usona imperiismo kaj sovetunia reviziismo, estas kontentigi la bezonojn de ilia komuna intriga plano kontraŭ Ĉinio.

INTENSA KRESKO DE SENLABORECO EN KAPITALISMAJ LANDOJ

Iu "internacia laborista organizo" kontrolata de la usona imperiismo konfesis en raporto publikigita antaŭ nelonge, ke la regreso kaj stagnado de la industria produkto en plejparto de la kapitalismaj landoj kun progresinta industrio "jam kaŭzis malmultiĝon de la laborhavantoj kaj plimultiĝon de la senlaboruloj". Tio montras, ke la ekonomio de la tuta kapitalisma mondo alfrontas neeviteblan krizon.

La raporto diris, ke senlaboreco "altiĝis preskaŭ en ĉiuj (kapitalismaj) industriaj landoj, ofte ĝis nivelo ne atingita en la lastaj kelkaj jaroj, kaj iukaze ĝis nivelo neniam atingita post la fino de la Dua Mondmilito."

La raporto montris, ke en la pasinta jaro, la nombro de senlaboruloj en pli ol 30 kapitalismaj landoj multe kreskis. Interalie, tiu de Okcidenta Germanio, Danlando, Finlando, Luksenburgo kaj Novzelando pligrandiĝis je pli ol unu oblo kompare kun tiu en la antaŭlasta jaro. La senlaborula nombro de Francio, Belgio, Norvegio, Nederlando, Svedio kaj Grekio kreskis je pli ol 30 pocentoj.

Sur la kovrilo

Sciencaj laborantoj esploras ĉe loko 6,300 metrojn super la marnivelo.

Sur la dorskovrilo

Sciencaj laborantoj marŝas al Ĝolmo-lungma.

KOREKTOJ

No. 1, 1968, p. 5:

(*La supra bildklarigo*) Legu *Lenin* anstataŭ *Linin*.

(*La malsupra bildklarigo*) Legu *1917* anstataŭ *1817*.

No. 4, 1968, p. 8-9:

La du bildklarigoj estas erare interŝanĝitaj.

EL POPOLA ĈINIO

人民中國報道

Monata gazeto eldonata de ĈINA ESPERANTO-LIGO

P. O. Kesto 77, Pekino, Ĉinio

N-ro 5 (119) 1968

Ĉefa Enhavo

Interparolo kun Usona Ĵurnalistino Anna Louise Strong

La Papertigreco de la Usona Imperiismo Vidita en la Brilaj Venkoj de la Sudvjetnama Popolo dum la Printempa Festo

Solida Batado al la Papertigra Usona Imperiismo sur Sangkamriong

Naskiĝo kaj Kresko en Batalado

Brila Tezo, Giganta Potenco

La Potenco de la Penso de Maŭ Zedong en la Ĉielo

Ho Ŝaŭŝan, Maŭ Zedong (*poemo*)

La Vjetnama Popolo Amas Prezidanton Maŭ

Naskiĝo de la Dekmil-tonela Oceana Varŝipo "Orienta Vento"

Novaj Moroj en Minhang

Sonorilaj Sonoj ĉe Huangpu-rivero

Marŝo sur la Vojo de Socialismo

Tagnokte Sopiras Niaj Tajvanaj Samlandanoj al Prezidanto Maŭ

Fremdlandaj Amikoj Laŭdas Daĝaj-brigadon

Iom pri la Eduka Revolucio en Tonggi-universitato

Frakaso de la Okjara Sistemo

Iru al la Kamparo

Centjara Jubileo de la Naskiĝo de D-ro W. E. B. Du Bois

"Blindulo", "Surdulo" kaj "Frenezulo"



Lerni la “tri popularajn artikolojn” en ĉiu tago






(*maldekstre*) Firme tenante revolucion kaj forte stimulante produkton, la vastaj amasoj lanĉis la unuan printempan produktobatalon, kun la penso de Maŭ Zedong en komando. Jen traktorista grupo lernas la plej novajn instrukciojn de Prezidanto Maŭ antaŭ komenco de sia dejorado

(*meze*) Decideme respondante al la alvoko de la granda ĉefkomandanto Prezidanto Maŭ, la Popola Liberiga Armeo faris valoregajn kontribuojn en sia subtenado al industrio, agrokulturo kaj la maldekstruloj kaj en milita kontrolo kaj milita-politika trejnado. PLA-anoj kaj propagandas la plej novajn instrukciojn de Prezidanto Maŭ kaj helpas produktajn brigadojn en riparo de agrokulturaj instrumentoj por la printempa plugado.

"Akvoutiligo estas la aorto de agrokulturo." Post revolucia amasa kritikado, rimarkinde altiĝis la politika konscio de la vastaj amasoj de la malriĉkamparanoj kaj malsuperaj mezkamparanoj kaj la penso de Maŭ Zedong ankoraŭ pli profundiĝis en ilian koron. Jen konstruado de akvokonservejo komenciĝis sub la gvido de gubernia revolucia komitato por plene bonigi la agrokulturan kondiĉon en monteta regiono.




Fervora Laboro en Nia Printempa Kamparo



"Bona estas la popola komunumo!" Prospere disvolviĝas la kolektiva ekonomio de Liuĝuang-brigado kun homoj plenaj de energio kaj ŝarĝobrutoj plenaj de forto. Jen ĝiaj membroj plugas teron por teni grundohumidecon kaj tiel pretigi firman bazon pro riĉrikolto en la kuranta jaro.







世界語《人民中国》摄遣月刊一九六八年第五期（本刊代号二二—九一五）